HUNGARA VIVO

9011 · 20,– Ft

OLVASOTEREM

NORD-TRANSDANUBIA
BRIK- kaj
TEGOLFABRIKA
ENTREPRENO

FABRIKADO DE BRIKOJ KAJ TEGOLOJ

H-9022 GYŐR
Türr I. u. 5.

Telefono: 06-96 11-333
Telekso: 025.262
Telefakso: 06-96 19-068

NORD-TRANSDANUBIA ENTERPRENO PRI BRIKO- KAJ TEGOLFABRIKADO

La naturaj ceramikaj konstrumaterialoj konvinke pruvis dum la jarmiloj, ke ili konvenas al la medio kaj taŭgas al la homaro por ĝiaj konstruaĵoj. Dek fabrikoj de la Entrepreno klopodas kontentigi la konstruigantojn per produktaĵoj bone uzeblaj por muroj, murotegadoj, plafonoj kaj tegmentoj. La fabrikadon multe favoras la bonkvalita argilo kun alta feroksido-enhavo, pri kies grandega amaso ni disponas apud vilaĝoj Beled kaj Csorna.

Tiu materialo prezentas la eblon fabriki niajn tre popularajn, nature ruĝecajn varojn, multe bezonatajn de la merkato. Tiaj estas:

— ruĝaj tegaĵoj kaj profilbrikoj por bariloj — el fabriko Beled,
— ruĝa ceramika tegolo kaj kompletigaĵoj al la tegmentokomplekso
— el fabriko Csorna; *krome*
— kastorvostaj kaj foldaj tegoloj — el fabriko Tata 3a,
— termizolaj brikegoj HB-38, THERMOPOR, B 30 kaj UNIFORM por muroj el fabriko Kisbér,
— malgrandaj brikoj — el fabrikoj Pannonhalma, Tata la, Sopron 2a, Fertőszéplak, Győr 2a,
— brikoj por interaj muroj, B 30.

HUNGARA VIVO

ENHAVO

Hungara politika kalejdoskopo 2
Künzli, Andy E.: Reago al HV-artikolo 8
De Kock, Edwin: Knoso, 1985 9
Klubo de Nemere-legantoj 13
Nádas, Péter: Fabelo pri la fajro kaj la scio (*István Ertl*) 14
Oravecz, Imre: Kiel vi memoras (*István Takács*) 17
Rossetti, Reto: La eternaj angloj 18
Ĉinaj bildlibroj — hungarlingve 20
Fenyvesi, Ervin: Revuo de revuoj 23
Sekretaj Sonetoj 24
Stepanov, Nikolao: La vivo kaj morto de Vladimir Varankin (1902-1938) 25
Nervi Mauro: La legendo pri Marko Keller 33
Recenzoj 35
Fenyvesi, Ervin: Gaja paĝo 38
Krucenigmo, Ekzameno sen risko 39
Korespondi deziras, Leterkesto 40

Sur la frontpaĝo foto de Zoltán Fejér

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso:
Budapest, I. Szentháromság tér 6.
Telefono: 156-0244
Poŝta adreso:
Pf. 193, H-1368 Budapest
Aperas dumonate
XXXa jaro, 1990 n-ro 1.
(149)



Ĉapitroj el la historio de la Esperanto-movado

En mia lando — Sovetio — nun okazas vera revolucio. Enkadre de tio perestrojko *kaj* glasnost *iom post iom malfermas la arkivojn kaj* specĥranojn *en bibliotekoj. El nia landa historio estas malaperantaj „blankaj makuloj", kaj la popolo finfine ekscias pri siaj herooj — kiuj fariĝis fine* viktimoj *— kaj ankaŭ pri tiuj sangaj krimuloj, kiuj en la nomo de „glora" ideo neniigis milojn kaj milionojn da siaj samlandanoj.*

Ankaŭ la Esperanto-movado de Sovetio perdis multege en tiu funebra procezo. La morto de miloj da esperantistoj povas aspekti nur kiel modestaj „riveretoj" sur la fono de kruela ekstermado de milionoj. Sed ĉu oni povas aserti, ke unu *morto estas malpli ol* miliono *da mortoj? Vivon ja ĉiu el ni havas nur* unu.

La reĝimo de Stalin unue celis ekstermi tiujn, kiuj pensis *alie ol la reĝimo, poste tiujn kiuj povis esti* suspektataj pensi *alie, en la sekva etapo tiujn, kiuj entute* kapablus pensi *alie — kaj fine la ekstermado fariĝis* mem la celo, *ĝi ĉesis esti rimedo.*

Esperantistoj estis ĉiam homoj, kiuj havis pli larĝan idean kaj intelektan horizonton, ol la aliaj. Ne mirinde do, ke ili fariĝis jam frue viktimoj de la persekutoj — ja la totalisma reĝimo ne povis toleri tiajn homojn.

Kaj ĝis nun persistas la postrestaĵoj de tiu reĝimo, ĝis nun super la esperantistaro de mia lando pendas la ombro de suspekto, ĝis nun multaj rilatas al esperantistoj kiel al spionoj, teroristoj, malamikoj de la popolo. Kompreneble, oficiale neniu malpermesas Esperanton kaj la agadon de esperantistoj. Tamen, kvazaŭ ĝis nun efikas la jam delonge nuligita malpermeso uzi en la gazetaro la vortojn „karateo" kaj „Esperanto". Iuj redaktoroj ne scias pri la nuligo, aliaj ne volas scii pri ĝi, kaj la plej multaj simple ne volas riski, ĉar eble... tamen... Do, kvankam la oficiala cenzuro malaperis(?), la cenzuro neoficiala ĝis nun regas, almenaŭ en la centra gazetaro.

Necesas forpeli tiun ombron de suspekto, antaŭ ĉio per la elserĉo, malkovro kaj disvastigo de la vero *pri la martiroj de la Sovetia Esperanto-movado. Ja inter ili troviĝis pluraj internacie gravaj figuroj, kaj la Esperanto-komunumo eĉ ilian mortodaton ne scias. Pluraj homoj — pro nekonataj motivoj — asertas, ke ili estis ekzekutitaj ne pro Esperanto-agado. Ankaŭ pri tio jam estas tempo certiĝi. Dum la lastaj jaroj mi dediĉis min al tiu laboro. Persiste mi kolektis informojn: serĉis la ankoraŭ vivantajn parencojn kaj geamikojn, fosis en arkivoj kaj bibliotekoj, korespondis kun oficialaj instancoj — kaj ŝajne mi sukcesis meti almenaŭ la unuajn ŝtonojn por la monumento, kiun tiuj homoj nepre meritas.*

En tiu ĉi numero de Hungara Vivo malfermas la vicon biografia skizo pri Vladimir Valentinoviĉ Varankin, *aŭtoro de la romano „Metropolitano".*

Nikolao Stepanov

HUNGARA POLITIKA KALEJDOSKOPO

La vivo (sen epiteto) estas pli rapida, ol Hungara Vivo... En la n-ro 1989/6. kiu atingis eĉ la Eŭropajn legantojn nur en majo de 1990, iom ironie ni riproĉis al FRG, ke ĝi ne pretas subskribi kontrakton kun Hungario pri senvizaj turismaj vojaĝoj. Ni ĝoje informas, ke intertempe tia kontrakto estis subskribita; depost la unua de majo 1990 hungaroj kaj FRG-anoj povas viziti senvize FRG, respektive Hungarion.

Estas senprecendence en la Esperanta gazetaro, kiel fortan influon povas havi HV-artikoloj — eĉ antaŭ sia apero...

Ĉu Hungario postrestas en la revolucia procezo?

Post la aŭtunaj revolucioj en Berlino-Prago-Bukureŝto-Sofio ĉiam pli ofte leviĝas la supra demando en Budapeŝto, kiu estis (ĉu ne plu estas?) la sparkilo de la Orient-Eŭropaj sociaj ŝanĝoj. Pluraj gvidantoj de opoziciaj partioj trovas, ke Hungario postrestas en la revolucia procezo, kaj laŭ ili tiu postresto rezultigas almenaŭ du negativajn konsekvencojn.

La *unua* estas la malkresko de la interesiĝo pri Hungario en Okcidenta Eŭropo kaj en Usono, sekve de kio nia lando povos kalkuli pri malpli intensa ekonomia subteno. La *dua* negativa konsekvenco estas esence socipsikologia — oni diras —, ĉar la fakto, ke la politika reĝimŝanĝo okazas en Hungario sen centmilaj surstrataj demonstracioj, per parlamenta akcepto de nova konstitucio, efektive senigas la popolon disde la katarkta travivaĵo de revolucio. Iuj eĉ riproĉas pro tio la reforman alon de la iama ŝtatpartio, dirante, ke per la reformleĝoj ĝi volis forsaboti vere „purigan" revolucion. Laŭ tiu ĉi koncepto la nune sentebla socia letargio en Hungario estas la postsekvo de la manko de animkarese entuziasmaj momentoj.

La kontestantoj de la supraj opinioj — inter ili kompreneble la gvidantoj de la Socialista Partio — pledas por tio, ke la hungara nacio travivis jam tro multajn drastajn — kaj ofte sangajn — abruptajn reĝimŝanĝojn, kaj tiujn akompanis ĉiam fizika kaj spirita perforto, kiu blokis la evoluon por longaj jaroj. Hungario bezonas politike organikan *evoluon* anstataŭ *revolucio*, evoluon, kiu havas konstituci-jure formulitajn instituciajn kadrojn kaj garantiojn.

La Ĉeĥoslovakia prezidento, Václav Havel antaŭ kelka tempo diris, ke Ĉeĥoslovakio plenumis dum du semajnoj ĉion tion, por kio Hungario bezonis du jarojn. La demando estas nur, ĉu ĝi vere plenumis ĉion tion? Dubinde, ja dank' al la „malrapideco" en Hungario la partia strukturiĝo de la loĝantaro estas preskaŭ plena — la partioj funkcias eĉ en malgrandaj vilaĝoj. La kreitaj juraj institucioj aliflanke donas certajn garantiojn ankaŭ por la malvenkintoj de la nunaj politikaj ŝanĝoj, do la paca karaktero de la procezo ŝajnas esti pli certigita. Samtempe en Ĉeĥoslovakio regas vasta popola eŭforio, sed ĝi nutras sin nur el entuziasmo, kaj ne el efektivaj politikaj faktoj.

Ekzamenante la ofte tre jakobenajn opiniojn de kelkaj partioj en Hungario, oni povas konstati virulentan pluvivadon de la bolŝevika teorio pri revolucio, kiu implicas fundan malŝaton al la organika evoluo, kaj al la evoluo entute. Kun surprizo oni rimarkas, kiom profunden penetris la instruoj de marksismo-leninismo, ja estas strange — amuze kaj malesperige — vidi, ke politikaj fortoj, agantaj por la demokratio, utiligas la tezojn de la kontraŭbatalata doktrino.

La 15a de marto — libera festo duafoje

La 15a de marto en Hungario estas rigardata kiel la plej granda nacia festo, kiun la partia ŝtato dum la pasintaj jardekoj ĉiam alrigardis iom oblikve kaj malŝate. La hungara popolo povis festi tiun tagon vere libere la unuan fojon nur en 1989 — pri tio vaste informis ankaŭ nia revuo. Kontraste al la festado de similaj naciaj memortagoj pasintjare okazis du paralelaj manifestacioj en Budapeŝto: tiu de la tiam reginta Hungara Socialisma Laborista Partio, kaj alia, kiun organizis kune la opoziciaj partioj.

En tiu ĉi jaro la nombro de la manifestacioj multobliĝis, ĉar ankaŭ la opoziciaj partioj festis aparte, ĉar tiu nacia festo — malgraŭ la malaj deklaroj de la partioj — fakte eniris la balotkampanjon. Tio estas bedaŭrinda afero, sed nepre ne mirinda, ja nur dek tagojn antaŭ la balot-tago estus malfacile imagi alie. Eble tiu partia karaktero kaŭzis, ke grave malpli da homoj partoprenis la manifestaciojn, ol antaŭ unu jaro.

Estis agrabla novaĵo ĉijare, ke ankaŭ hungaroj en Rumanio, Sovetio kaj Ĉeĥoslovakio povis organizi manifestaciojn okaze de tiu ĉi tago, eĉ se en Rumanio kaj Ĉeĥoslovakio la loka naciismo klopodis ĝeni la festadon — ne ĉiam sensukcese.

En Jugoslavio tiaj manifestacioj ne okazis. La kaŭzo estas minimume duaspekta: unue, tie la naciaj rajtoj de la hungararo povis disvolviĝi multe pli libere, ol en Rumanio, Ĉeĥoslovakio kaj Sovetio, kaj pro tio mankis la erupcia deziro por la festado, kaj due, pro tio, ĉar eĉ en la Jugoslaviaj hungarlingvaj lernejoj oni ne primemoris tiun tagon.

La situacio en Aŭstrio — kie en apudlimaj vilaĝoj vivas ĉ. 60 mil hungaroj — estas plene kurioza. Oni devas scii, ke la 15an de marto 1848 la hungara popolo ribelis kontraŭ la Habsburga imperio. Tial en Aŭstrio ĝis nun es-

tas malpermesite primemori tiun tagon, kaj por la hungara minoritato tie malpermesitas kantado de la du ĉefaj hungaraj naciaj kantoj — de la Himno kaj Proklamo... Iom anakronisme.

Lastaj balotprognozoj

La lastaj balotprognozoj aperis en la tagĵurnaloj la 15an de marto, ja la balotleĝo permesas publikigi rezultojn de opinisondoj nur ĝis la oka tago antaŭ la balotoj. Kiam tiu ĉi numero de HV aperos, niaj legantoj jam certe estos informiĝintaj pri la *finaj rezultoj* de la balotoj el sia nacilingva gazetaro, tamen eble estos interese kompari la rezultojn kun la prognozoj de la hungaraj fakuloj, kiuj ja la unuan fojon havas la eblon prognozi pri *liberaj* balotoj.

Laŭ tiuj prognozoj nur 7 partioj transpasos la 4-procentan limon (minimumo necesa por eniri la parlamenton) el tiuj 12 pli fortaj partioj, kiuj ĉe la kandidatigo sukcesis akiri la rajton kompili nacian liston, kaj el la ĉ. 50 partioj entute konkurantaj. Ili estas la jenaj (informojn pri ili vidu en nia n-ro 1989/6):

Hungara Demokrata Forumo 21 %
Asocio de Liberaj Demokratoj 19 %
Sendependa Partio de Etbienuloj, Terlaboristoj kaj Burĝoj 16 %
Asocio de Junaj Demokratoj 9 %
Hungara Socialista Partio 9 %
Hungarlanda Socialdemokrata Partio 6 %
Kristandemokrata Popolpartio 5 %

Antaŭ la balotoj neniu partio pretas eldiri ajnan opinion pri eblaj koalicioj — oni insistas, ke por tio necesas unue koni la verajn balotrezultojn, t.e. koni la propran socian subtenon. Nur sola afero ŝajnas esti certa — ke neniu partio volos koalicii kun Hungara Socialista Partio. Cetere, la ŝrumpanta populareco de tiu partio logike motivas la rifuzan sintenon.

Aliflanke, certe kreos iom skizofrenan situacion la fakto, ke laŭ la plej freŝaj opinisondoj pri la popularęco de unuopaj personoj la unuajn tri-kvar lokojn okupas politikistoj, kiuj membras ĝuste en Hungara Socialista Partio — ili estas la provizora prezidento Mátyás *Szűrös*, la ministro pri eksteraj rilatoj Gyula *Horn* kaj la nuna ĉefministro Miklós *Németh*. Imre *Pozsgay*, kiu antaŭ nur kelkaj monatoj estis stelo de tiu listo, nun malsuprenglitis al la sepa-oka loko.

La kerna problemo de la koaliciaj intertraktoj certe estos tio, ĉu Hungara Demokrata Forumo kaj Asocio de Liberaj Demokratoj sukcesos veni al interkonsento. La principaj kaj ideologiaj diferencoj inter tiuj du partioj estas sufiĉe granda, sed ne maleblas, ke pro taktikaj kialoj ili tamen formetos tiujn — almenaŭ por kelkaj monatoj...

Bilanco de la Németh-registaro

Miklós *Németh*, la plej juna ĉefministro de Hungario enoficiĝis novembre de 1988. Kvankam pli frue li estis gvida ekonomia funkciulo de Hungara Socialisma Laborista Partio, kaj kiel tia, nepre respondeca pro la ekonomiaj fuŝaĵoj — kiel ĉefministro, kompare al siaj kolegoj dum la lastaj 40 jaroj li estis sendube la plej suverena supera ŝtatoficisto.

Relative rapide li sukcesis sendependigi sin disde la rekta partia direktado, kaj elbatalis por si la rajton mem elekti siajn ministrojn. Ĝenerale li elektis bone, kaj oni povas diri, ke la unuaj liberaj balotoj faligas la plej bonan registaron, kiun Hungario havis dum la lastaj kvar jardekoj. La *plej bonan*, sed ne nepre *bonan*.

Kion plenumis tiu ĉi registaro? Oni ne povas fornei de ĝi la konstaton, ke ĝi *ludis historian rolon*. Ĝi preparis amason da historiaj leĝprojektoj, kaj akceptigis ilin en la parlamento. Tiuj leĝoj nur dum unu jaro formis el Hungario juran ŝtaton, ili kreis la jurajn kadrojn de efektiva demokratio. Dum nur 14 monatoj la Németh-registaro malkonstruis grandan parton de la stalinisma superstrukturo. (Kompreneble, en tiu laboro emfaze partoprenis la reformaj fortoj de Hungara Socialisma Laborista Partio, kaj post oktobro de 1989 Hungara Socialista Partio. Kaj evidente rapidige helpis tiun procezon ankaŭ la premo, kiun faris al la registaro la opoziciaj partioj.) Eminentan rolon ludis en la registara laboro krom la ĉefministro la senpostena ministro Imre *Pozsgay*, la ministro pri eksteraj rilatoj Gyula *Horn*, la ministro pri internaj aferoj István *Horváth*, kaj la ministro pri klerigo Ferenc *Glatz*. Verŝajne ne estas troigo diri, ke la politiko de tiu registaro grave kontribuis al la procezo, kiu disvolviĝis en Ĉeĥoslovakio, GDR kaj Rumanio.

Kie do estis la malfortaj punktoj de tiu registaro? Certe ne en la grandaj, historiaj faroj, sed en la ĉiutaga laboro, en la aperigo de dekretoj ne bone pripensitaj, kiuj povis de tempo al tempo ĉagreni, kolerigi la civitanojn, foje-foje kaŭzi eĉ gravajn damaĝojn al la ekonomio de la lando, kiel ekzemple la diversaj — plurfoje improvize ŝanĝitaj — valut- kaj dogandekretoj.

La ĉefa malhelpo por tiu ĉi registaro estis la fakto, ke ĝi laboris *sen efika kontrolo*. Sonas iom paradokse, sed tion kaŭzis la forskuo de la partia kontrolo. Ja pli frue, ministro antaŭ ol fari iun dekreton, devis konsultiĝi kun la adekvata faka departemento de la partia centro, kie ekzistis kompetenta faka aparato, kiu kapablis ekzameni la dekretprojekton, kaj kiu havis la potencon influi la ministron. (Estas alia demando, ĉu tiuj influoj estis ĝustaj aŭ ne.) Ĉiukaze, tiu kontrolo *hazarde* malbonajn dekretojn sukcesis elimini.

Post la ĉeso de la partia kontrolado devus ekfunkcii la parlamento kiel kontrola organo. Sed la parlamento kunsidis nur du-tri tagojn dum monato, la deputitoj laboris honorofice, do ili ne povis efike kontroli la registaron — ili ne kapablis kompetente diskuti pri leĝprojektoj, kiujn digesti ili disponis eble nur horeton. La registaro de Németh do laboris konsterne memstare, praktike neniu havis la forton influi ĝin.

Certe la novaj registaroj ankoraŭ longe kulpigos la registaron de Németh pri problemoj premontaj nin estonte. Sed la historio verŝajne estos pli grandanima al ĝi — post jardekoj probable oni skribos pri ĝi, kiel pri registaro kondukinta Hungarion al la demokratio.

Stopo al la rubla eksporto

Ĝis nun ĉ. duono de la hungara eksporto iris al la landoj de la t.n. rubla zono (Eŭropaj soclandoj plus Mongolio, Vjetnamio, Norda Koreio kaj Kubo) — kaj duono de tiu duono al Sovetio.

Tiuj komercaj rilatoj esence ne estis komercaj — interŝtataj kontraktoj difinis, kiom da aŭtobusoj (maŝinoj, virinaj kalsonoj, ktp.) Hungario dum unu jaro liveros al Sovetio, kaj kiom da tunoj da nafto, kiom da aŭtomobiloj ktp. ĝi ricevos rekompence. La eksporto kaj importo ĉiam estis — almenaŭ principe — egalaj, do mono funkciis en

tiu komerco nur kiel kalkulunuo. La prezoj ankaŭ estis primarĉanditaj sur interŝtata nivelo, sen partopreno de tiuj entreprenoj, pri kies produktoj temis, kaj sen konsidero al la efektive ekzistantaj mondmerkataj prezoj.

Tiuj prezoj do havis nenion komunan kun la produktoprezoj. Iuj el ili estis konsterne altaj, aliaj fantazie malaltaj. La hungara ŝtato ekzemple devis forte — ĉ. 300 procente! — subvencii la hungaran nutraĵeksporton al Sovetio, dum la importitajn aŭtomobilojn ĝi impostis proksimume samalte.

Se iu lando ne plenumis siajn kontraktajn devojn, la alia praktike havis neniujn ekonomiajn sankcieblojn, ĉar estis difinite, ke eventuale kreiĝanta monpostulo devas esti foruzita en tiu lando, kie ĝi kreiĝis. Kaj se tie troviĝis nenio aĉetinda kaj aĉetebla — do la alia partio kredite sendadis plu siajn liveraĵojn...

Tiel okazis dum la pasinta jaro inter Hungario kaj aliaj soclandoj, ĉefe rilate Sovetion. Fine de 1989 en la hungara-soveta komerco kreiĝis enorma kredita saldo por Hungario: entute 800 milionoj da rubloj. La kaŭzo estis tio, ke Sovetio ne plenumis siajn kontraktajn devojn (ĝi liveris malpli da nafto kaj celulozo ol promesite), dum hungaraj entreprenoj eĉ superplenumis tiujn. (Pro tio hungaraj entreprenoj ne meritas apartan laŭdon: ili eksportas al Sovetio ĉefe tiajn varojn, kiuj simple ne estus vendeblaj en aliaj merkatoj.)

La afero estis trioble prema por la hungara registaro. Unue, ĝi devis krediti tiun sumon al Sovetio, ja mem la entreprenoj tuj ricevis la pagon el la hungara ŝtata buĝeto: due, pro la pli alta hungara eksporto la pagoj por eksportsubvencioj kreskis; trie, por eviti mankon en la hungara merkato, pro la nealveno de la soveta nafto kaj celulozo Hungario devis aĉeti la mankantajn kvantojn en aliaj landoj.

(La aferon plikomplikas la fakto, ke aliflanke Hungario ŝuldas al Sovetio ĉ. 650 milionojn da rubloj — tio devenas el pli frua kredito, kiun laŭ interŝtata interkonsento Hungario devus repagi nur en malgrandaj partopagoj. Nun fulmas la diskutoj pri la eventuala kunigeblo de la pasintjara soveta deficito kaj la ĉisupra hungara ŝuldo.)

Post tiuj antecendentoj la hungara registaro en januaro draste limigis la hungaran eksporton al Sovetio kaj al la aliaj soclandoj. Tamen, tio jam nur post kelkaj semajnoj puŝis al la rando de abismo plurajn hungarajn entreprenojn, antaŭ ĉio la aŭtobusfabrikon Ikarus. En Sovetio oni ŝatas tiujn busojn (ankaŭ en aliaj soclandoj), sed en la valuta merkato ili ne estas normale vendeblaj. Tiamaniere minacas senlaboreco ĉ. 5000 laboristojn de Ikarus, kaj ankaŭ plurajn milojn en tiuj fabrikoj, kiuj liveras pecojn al tiu aŭtobusfabriko.

La limigo de la eksporto koncernas ne nur la aŭtobusojn, sed eĉ la t.n. kulturan eksporton, kiu fakte estas nur 0,8 % de la tuta eksporto, liverata al la soclandoj. El tio povos kreiĝi eĉ politika problemo, ĉar la stopo malhelpos la libroeksportadon al la najbaraj landoj, kie vivas milionoj da hungaroj — ĝuste nun, kiam la tieaj registaroj ne plu malpermesas eniron de hungaraj libroj. La eksportstopo povos katastrofe influi ankaŭ nian Esperanto-eldonejon: jam dum 1989 ni ne povis eksporti al Sovetio, verŝajne ĉijare estos same. Pri Hungara Vivo la afero por la kuranta jaro ankoraŭ estas en ordo, ja la hungara eksporta firmao kolektis la abonpagojn antaŭ la eksportstopo, sed ĝi povos bankroti, se la registaro ĉe la efektiva liverado rifuzos pagi. Kaj tiam en la sekva jaro HV certe ne povos iri al Sovetio. (Kompreneble la eksporta entrepreno bankrotos ne pro HV, sed pro ĉiuj revuoj, liverataj al Sovetio.) Tamen, oni esperas premi la registaron por likvidi la stopon pri kulturaj varoj, kies volumeno en la tuta komerco proporcie estas tre malalta.

Oni demandas, kial hungaraj importistoj ne trovas utilajn varojn en Sovetio, por likvidi la hungaran kreditan saldon. Nu, simple pro tio, ĉar la sovetaj aŭtoritatoj ne donas eksportpermeson por tiaj varoj, kiajn Hungario bezonas.

Ekde la venonta jaro verŝajne sekvos nova etapo en la hungara-soveta komerco. Nome, oni transiros al nova sistemo: oni ĉesigos interŝanĝ-kontingentojn, kaj la reciproka pagado okazos per dolaroj. De tiu nova sistemo la fakuloj esperas pliraciiĝon de la komercaj kontaktoj.

Sed la afero estas ne tiel rozkolora. Dum en la nuna komerco Hungario lastatempe ĉiam havis kreditan saldon, sur dolara bazo kreiĝos enorma hungara deficito de ĉ. 1,2-1,5 miliardoj da dolaroj! — ĉio ĉi kalkulate per la nunaj kvanto kaj konsisto de la eksportataj kaj importataj varoj. Tamen, kiel eblas difini la dolaran prezon de tiaj aŭtobusoj aŭ aŭtomobiloj, kiuj kontraŭ dolaroj simple ne estus vendeblaj...? Skeptikuloj atentigas: la varoj ne pliboniĝos nur pro tio, ĉar oni kalkulos ilian prezon per dolaroj...

La problemoj verŝajne daŭros — kaj pesimistoj jam antaŭvidas en Hungario benzinmankon, papermankon kaj aliajn mankojn, por ne paroli pri la prezaltigaj efikoj de la dolarbazaj kalkuloj...

Sovetaj taĉmentoj hejmeniros

La 10an marto la hungara ministro pri eksteraj rilatoj Gyula *Horn* kaj lia soveta kolego *Ŝevardnadze* en Moskvo subskribis interkonsenton pri tio, ke ĉiuj sovetaj taĉmentoj forlasos Hungarion ĝis la 30a de junio 1991. Tiu interkonsento estis eksprese — nur dum kelkaj semajnoj — ellaborita. Oni ne dubas, ke la hasteco ŝuldiĝas al tio, ke la Socialista Partio du semajnojn antaŭ la balotoj volis gajni poentojn per la realigo de plurjardekaj revoj de multaj hungaroj.

Ne eblas scii, ĉu tio alportos voĉojn al la Socialista Partio, sed improvizita privata opinisondado montras, ke tute *ne*. La plimulto de la hungaroj estas tre malkontenta, ke la retiro de 50 mil soldatoj devos daŭri 16 monatojn. „Ili povis enmarŝi ĉi tien en 1956 nur dum kelkaj tagoj, kial ili bezonas pli ol jaron por retiriĝi?" — argumentas la simplaj homoj, kaj ankaŭ la opoziciaj partioj. Ĉi lastaj tuj laŭte promesis, ke post la balotoj — en kiuj ili nepre venkos — ili tuj rekomencos la interraktojn kun Sovetio, kaj ili nepre atingos, ke la taĉmentoj foriru plej malfrue ĝis la 15a de marto 1991. Tiamaniere do la subskribo de la interkonsento verŝajne alportis voĉojn por la opoziciaj partioj...

Sovetianoj citas teknikajn problemojn, kiam oni demandas ilin, kial necesas 16 monatoj por la retiriĝo. La unua malhelpo estas la kapacito de la fervojo — ja krom la 50 mil soldatoj kaj samtion da civiluloj necesas hejmenigi ankaŭ ĉ. 500 mil tunojn da diversaj materialoj. Publikajn vojojn oni ne volas uzi, ĉar tio multe ĝenus la loĝantaron, kaj krome la pezaj armeaj veturiloj kaj tankoj tute detruus la ŝoseojn.

La partioj principe konsentas pri tio, ke la retiro de la sovetaj taĉmentoj ne devas servi kiel temo de la balotkampanjo — tamen senescepte ĉiuj opoziciaj partioj vaste utiligas ĝin. Hungara Demokrata Forumo eĉ presigis grandan ruslingvan afiŝon kun la surskribo: *„Tovariŝĉi — konjec!"* La partioj konsentas ankaŭ pri tio, ke oni devas zorgi, ke la retiriĝantaj sovetianoj ne sentu sin malvenkintoj — sed samtempe gvidaj funkciuloj de pluraj partioj postulas, ke Sovetio publike deklaru, ke la ĉeesto de la sovetaj taĉmentoj en Hungario estis afero kontraŭleĝa.

Oni povas nur esperi, ke post kelkaj semajnoj, kiam ĉesos la konkurado por la voĉoj, la etoso fariĝos pli sobra. Ja nia ekonomia dependeco de Sovetio estas sufiĉe granda — kaj ne rapide malkonstruebla — por tio, ke la

konservado de normalaj hungaraj-sovetaj rilatoj ankaŭ post la retiriĝo restu kerna vidpunkto por Hungario. Kaj ĉiel ajn, Sovetio ne estas translokebla, ĝi daŭre restos ĉe nia nordorienta limo — kaj la hungara historio montras, ke niaj politikistoj estas tradicie malfortaj en la geografiaj sciencoj...

(Nur interkrampe: se eble ĉe nia nordorienta limo post kelka tempo troviĝos ne Sovetio, sed sendependa Ukrajno, tio verŝajne nur faros la tutan problemon eĉ pli komplika...)

Ĉu sekvos persekutoj kontraŭ komunistoj?

Oni ne ektimu, ĉiuj opoziciaj partioj — kiuj ĉe la apero de tiuj ĉi linioj jam ne plu estos opoziciaj — diras, ke *ne*. Tamen ili ĉiuj aldonas „sed"-on, kaj sekvas iom diversaj, tamen esence similaj argumentaroj. Mi provu resumi ilin. Oni ne persekutos la gvidajn funkciulojn de la antaŭaj reĝimoj, sed kompreneble tiuj devos forlasi la gvidajn politikajn postenojn favore al la adeptoj de la venkintaj partioj. (Tio estas tute normala afero.) La antaŭaj gvidantoj de la Kádár-reĝimo devos perdi siajn diversajn privilegiojn (altajn pensiojn ktp.), kaj ili devos doni kalkulon pri sia agado antaŭ specialaj komisionoj. La diversaj partioj kaj diversaj funkciuloj ŝajne ne havas unuecan opinion pri tio, kiom da personoj devos „doni kalkulon" — mi legis argumentadon ankaŭ por tio, ke ĉiuj iamaj membroj de Hungara Socialisma Laborista Partio (do entute ĉ. 800 mil homoj!). Iuj ankaŭ lanĉis la eblon, ke tiuj homoj mem devu pruvi sian senkulpecon...

Estas vere, ke la plimulto de la supraj deziroj venas de ekstremaj minipartioj, sed multaj pasintjaraj deziroj de minipartioj intertempe fariĝis parto de la programo de signifaj politikaj fortoj. Do, oni ne povas scii, ĉu post kelkaj monatoj... Ĉiukaze, la ideo komencis hejmiĝi en la Hungarlanda politika pensado. Tiom, ke jam en decembro la hungara parlamento — kun fakta aprobo de la Socialista Partio — akceptis decidon pri tio, ke ĉiuj personoj, kiuj okupis difinitajn altajn postenojn depost 1980 (la opoziciaj deputitoj insistis pri la jaro 1968) devu fari formalan deklaron pri sia posedaĵo kaj pri ties origino. Parton de tiuj iamaj gvidantoj ankaŭ persone pridemandis parlamenta komisiono. La publiko entuziasme jesis al la postulo de tiaj deklaroj kaj al la pridemandado, postulante pli energiajn paŝojn.

Tiuj pridemandadoj povus alporti eĉ utilon, se per ili oni volus malkovri la mismekanismon de la partia ŝtato, por ekscii, kia mekanismo puŝis la landon en la nunan senesperan situacion. Sed la demandoj direktiĝis al la privata posedaĵo de la iamaj gvidantoj, kvankam montriĝis, ke — krom kelkaj esceptoj — neniu el ili havas okulfrape grandan privatan posedaĵon.

La procezo komenciĝinta estas danĝera pro du vidpunktoj. Unue, ĝi povas nutri politikan venĝemon, kaj tio facile povas konduki al atenco kontraŭ la juro — tute laŭ la iama bolŝevika modelo. La alia postsekvo povas esti eĉ pli danĝera, ĉar tiuj „kalkul-donoj" povas veki nekontentigeblajn ekonomiajn esperojn en la loĝantaro. Nome, tiuj milionoj, kiuj nun en Hungario suferas pro malriĉeco, povos atendi el la senmaskigo de la iamaj gvidantoj la signifan pliboniĝon de sia ekonomia situacio — supozante la kontraŭleĝe akiritan kaj konfiskeblan posedaĵon miloble pli granda, ol ĝi estas efektive. Multaj ja kredas, ke tiuj 20 miliardoj da eksterlanda prunto, kiuj venis al Hungario, iris en la poŝon de la koruptaj gvidantoj.

Sed tio — ĉu bedaŭrinde? — ne estis tiel. La iamaj gvidantoj ne *ŝtelis*, sed *disipis* tiun monon, injektis en deficitan produktadon, en fuŝajn investojn, eĉ, foje-foje elspezis por salajroaltigoj kun la intenco gajni la favoron de la popolo. Ĉiukaze, eĉ milono de tiu sumo ne estas retrovebla kaj forprenebla de ili.

Ĝis nun temis nur pri altaj gvidantoj. Sed popolismaj politikaj oratoroj jam volas vastigi la rondon, eĉ ĝis ĉiuj iamaj partianoj. Tio tuŝus 800 mil homojn plus ties familianojn. (Mi nur menciu, ke ne malmultaj el la gvidaj funkciuloj de la novaj partioj antaŭ kelkaj jaroj aŭ jardekoj membris en Hungara Socialisma Laborista Partio...)

La logiko diktas, ke post la balotkonkuroj ekstremismaj ideoj malaperos, kaj la supre skizita procezo restos inter normalaj, t.e. *juraj* kadroj. Do, koruptajn gvidantojn oni punos adekvate, sed politikaj persekutoj ne okazos. Tamen, logika rezonado ne eksludas ankaŭ alian eblon. La vasta publiko esperas pri drasta pliboniĝo de sia ekonomia situacio post la enoficiĝo de la nova registaro, antaŭ ĉio dank' al alfluontaj okcidentaj subtenoj. Sed oni scias, ke tia pliboniĝo ne povos okazi, eĉ... Kaj en tia situacio la nova registaro eble ne povos kontraŭstari la tenton oferti al la popolo anstataŭ pli granda peco da pano la dolĉan guston de venĝo.

Ĉu Hungario povos eviti tiun danĝeran socian kaptilon? Certe tio estos la unua serioza provo por la juna hungara demokratio.

Kio estas Meza Eŭropo?

Lastatempe ofte lanĉiĝas tiu ĉi demando en Hungario, tiom pli, ke la unuiĝo de FRG kaj GDR fariĝis baldaŭa realaĵo. La aliroj estas la plej diversaj, sed en ĉiuj konstateblas timoj pri la estonteco de tiu ĉi malfacile difinebla regiono.

Geografie la afero estas klara — Meza Eŭropo situas ie en Ukrajno... Tamen evidente temas ne pri geografia difino, sed pri politika. Oni cerbumas pri la estonteco de Aŭstrio, Hungario, Ĉeĥoslovakio, kaj eventuale de Jugoslavio kaj Rumanio. Kiel tiuj landoj vivos post la unuiĝo de la du germanaj ŝtatoj, en la ombro de Sovetio kaj de la granda Germanio?

Iuj pledas por kreo de speciale intensa kunlaborado ekonomia kaj politika inter tiuj landoj, kiuj iam konsistigis la Aŭstran-Hungaran Monarkion. La pledantoj argumentas, ke tiuj landoj kune povus kontraŭpesi la duflankan — germanan kaj sovetan — superpezon. Tiujn argumentojn subtenas la historia sperto, ke dum sufiĉe longa tempo tia politika aranĝo esence bone funkciis en tiu ĉi regiono, kiu dank' al la integriĝo povis ludi signifan politikan kaj ekonomian rolon en Eŭropo.

Tamen, ekzistas ankaŭ duboj pri la realigeblo de ia ajn formo de integriĝo. La duba punkto estas ĝuste Aŭstrio, kiu — estante ekonomie pli evoluinta, ol la ceteraj landoj — ne nepre volos kunligi sian sorton kun tiu ĉi subevoluinta regiono, sekvinta dum 40 jaroj tute alian historian vojon. Krome — asertas multaj — oni ne tute povas ekskludi la eblon, ke Aŭstrio deziros iam plenumi iaspecan „propravolan Anschluss", t.e. iamaniere ligiĝi al la unuiĝinta Germanio. Tiu ŝanco ne estas nepre malreala, se oni konstatas la jamajn fortajn ligojn inter la ekonomio de Aŭstrio kaj FRG. En tiu kazo — ĉe realiĝo de la t.n. „granda germana unueco", t.e. kunfandiĝo de Aŭstrio kaj la du Germanioj — al Meza Eŭropo restus eĉ ne minimumaj ŝancoj por konservi sian memstarecon.

Aliaj prognozas, ke Meza Eŭropo povas elekti nur inter du malbonoj: ĉu funkcii kiel satelito de Germanio, ĉu kiel tiu de Sovetio. Ekonomie estas nepre pli avantaĝe ligiĝi al

Germanio, do oni elektu prefere tion, sed konsciu pri la maleblo konservi sian egalrajtecon. Ne tre serena perspektivo, sed la lastaj sesdek jaroj ŝajnas konfirmi la ekziston de tiu dolora alternativo.

Laŭ tria opinio Germanio ne deziros religi specialajn kontaktojn kun la Mez-Eŭropaj landoj, ĝi daŭre ligiĝos al Okcidenta Eŭropo, kiel tion faris FRG dum la lastaj 40 jaroj. Al niaj landoj do ne ekzistos ia specifa germana rilato, sed nur komune Eŭropa sinteno. Kaj Okcidenta Eŭropo plej evidente traktos nin kiel periferian limregionon, kies rolon oni vidos en tio, ke ĝi ŝirmu per sia korpo la okcidentan civilizon. Ekonomian kaj ceteran helpon Meza Eŭropo povos esperi nur ĝis tiu grado, ke ĝi povu adekvate ludi tiun rolon. Laŭ tiu koncepto ni povos fariĝi en la Eŭropa Domo ne loĝantoj, sed nur pordogardistoj. Eĉ malpli serena perspektivo, ol la antaŭa.

Logika rezonado evidentigas, ke Meza Eŭropo povus iom plibonigi sian pozicion nur per firma kunigo de la fortoj kaj per unueca agado. Sed dum la nuna situacio estas minimumaj ŝancoj por tio — la landoj de la regiono konkuras unuope por ricevi laŭeble pli da okcidenta helpo, ol la najbaro. Kaj Okcidento certe eluzos tiun konkuradon, ja ĝi tute ne estas interesita en la troa fortiĝo de tiuj ĉi bufroŝtatoj, ja tiukaze ili aperus kiel memstaraj faktoroj en la internacia politiko.

Same procedis post la dua mondmilito Stalin, kiam li energie subpremis la federaciajn ideojn de Dimitrov. Ŝajne por tiu ĉi regiono sekvos ne facilaj jaroj.

Ĉu naciismo renaskiĝas en Meza Eŭropo?

Naciismo estis ĉiam signifa politika faktoro en Meza Eŭropo. Tio havas tre multajn kaŭzojn, mi vicigu ĉi tie nur kelkajn. 1. Sur relative malgranda teriotorio vivas multaj malgrandaj popoloj, el kiuj pluraj estas tiel malgrandaj, ke kreo de propra nacia ŝtato el ekonomia vidpunkto estus malracia. 2. La geografia lokiĝo de tiuj popoloj estas tre kaprica, kun multaj etnaj enklavoj. 3. Ili akiris ŝtatan suverenecon nur antaŭ 70 jaroj, sed eĉ tiu suvereneco ne estis plena. Mankas do matura politika kulturo. 4. Pro la ekonomia subevoluinteco mankas la bonfara mildiga efiko de la materiala bonstato. 5. Post la unua mondmilito la limoj de la novaj ŝtatoj estis difinitaj arbitre, sen konsidero al la etnaj limoj. Tiamaniere unu triono de la hungararo restis ekster la ŝtataj limoj de Hungario. Tiu situacio ne lasis velki la iredentismajn pensojn en Hungario, dum la grandaj hungaraj minoritatoj aperis kiel politike malstabiliga faktoro en la najbaraj landoj.

Oni povus ankoraŭ longe vicigi la kaŭzojn de la ekzisto de naciismo en Meza Eŭropo, sed ŝajne la supraj jam sufiĉas klarigi multajn fenomenojn.

Dum la pasintaj 40 jaroj la Mez-Eŭropa naciismo travivis kuriozan metamorfozon. Dum tiuj jardekoj la landoj de la regiono vivis sub de ekstere trudita ideologio, kiu proklamis internaciismon, do tiu forte persekutis naciisman *frazeologion,* sed ne la praktikon. Ja la trudanto de tiu ideologio — Sovetio — fakte mem praktikis grandrusan naciismon; krome ĝi estis interesita pri ekzisto de iuj kverel-punktoj inter la Mez-Eŭropaj landoj. Do, dum nia regiono per vortoj proklamis internaciismon, en la praktiko disvolviĝis senhelpe la naciismo de la unuopaj ŝtatoj, kondiĉe, ke tio ne endanĝerigis la interesojn de Sovetio. Tiu aspekto de la opaj landaj politikoj pli-malpli trovis akcepton fare de la popoloj. La unua fendo montriĝis en Hungario pro la fakto, ke ĝi estas la sola lando en la regiono, kiu havas signifan nombron da samgentanoj ekster siaj limoj. La situacio de hungaraj minoritatoj en la najbaraj landoj dum la lasta jardeko fariĝis ĉiam pli akuta problemo de la hungara interna politiko.

La falo da la post-stalinismaj reĝimoj fine de la pasinta jaro vekis nepravigeble grandajn esperojn en Hungario. Hungaroj ja atribuis la subpreman politikon kontraŭ la hungaraj minoritatoj al tiuj reĝimoj — evidente tute malprave. Nun la hungara publiko dolore konstatas, ke la situacio eĉ „malboniĝas", okazas manifestacioj kontraŭ hungarlingva instruado, kaj entute kontraŭ hungaroj. Hungaroj kompreneble denove eraras, la situacio *ne malboniĝas*, eĉ certagrade *pliboniĝas*, kaj nepre *ŝanĝiĝas*.

Pri kio temas? Dum la lastaj jardekoj en la najbaraj landoj funkciis stalinismaj reĝimoj, kiuj sub la signo de la internaciisma ideologio ne permesis *vortumi* naciismajn pensojn. La naciisman subpremadon efektivigis la ŝtato, tiel same, kiel la ceterajn formojn de la subpremado — kaj oni *neniam parolis* pri tio. Nun, en la naskiĝanta demokratio ĉiuj ideoj povas esti vortumataj — do ankaŭ naciismaj ideoj. Ja demokratio estas esence la regado de la plimulto — kaj naciaj minoritatoj ĉiam ja estas *minoritataj*. Nur plene disvolviĝintaj, firmaj demokratioj kapablas tiamaniere certigi regadon por la plimulto, ke ankaŭ ĉiaspecaj — do ne nur naciaj — minoritatoj havu plenan liberecon kaj sekuran ekzistorajton. Sed ŝajne tia firma, matura demokratio ankoraŭ ne ekzistas en Meza Eŭropo.

Hungario mem klopodas fari la maksimumon por siaj etnaj minoritatoj — germanoj, slovakoj, kroatoj, slovenoj kaj rumanoj. Tamen, ĝi ŝuldas ankoraŭ multon al ili. Ĉiukaze, la Hungarlanda problemo pri minoritatoj ne estas komparebla al tiu en la najbaraj landoj, ja en Hungario 97 % de la loĝantaro — estas hungaroj.

La problemo de naciismo en Hungario aperas ĉefe en formo de iredentismaj pensoj, kiuj ja nutras la najbarlandajn naciismojn, kaj reciproke, tiuj naciismoj fortigas la iredentismajn pensojn de hungaroj. Tiuj pensoj supozas trovi pravigon ankaŭ en la fakto, ke dum la lastaj monatoj evidentiĝis, ke la Eŭropaj landlimoj ne nepre estas tiel definitivaj, kiel oni kredis dum kvardek kvin jaroj.

Unu el la gvidaj politikaj partioj de Hungario — la Asocio de Liberaj Demokratoj — tre simpatie formulis sian sintenon pri la problemo: „Ni laboras ne por la reviziado de la landlimoj — ili diras — sed por tio, ke tiuj limoj perdu sian signifon." Bela penso, sed ĝia realigo ne ŝajnas esti tre proksima, ja la Mez-Eŭropan naciismon povos likvidi nur enradikiĝinta, matura demokratio, kiu siavice povos elkreski nur el la grundo de ekonomia bonstato.

Ĉu antisemitismo en Hungario?

En la nuna momento ne eblas diri precize, kiom da judoj vivas en Hungario. Ĉiukaze, dum la dua mondmilito sisteme estis deportita la judaro el ĉiuj provincaj urboj kaj vilaĝoj — tion atestas la amaso da forlasitaj kaj ruiniĝintaj sinagogoj dise en la tuta lando. Pri la ĉefurba judaro la nazioj faris „duonan" laboron — en Budapeŝto saviĝis almenaŭ kelkaj dekmiloj da judoj.

Plia bato por la hungara judaro estis la Rákosi-reĝimo inter 1949-1956 — malgraŭ la fakto, ke li mem estis judo, kiel ankaŭ pluraj liaj kunlaborantoj —; tiutempe multaj judaj butikistoj ktp. estis deportitaj kiel *kapitalistoj*.

Ĝis la faŝismaj tempoj la hungara ŝtato montris relative liberalan sintenon al judoj, sed popolismaj politikaj

tendencoj ĉiam uzis certan antisemitan frazeologion. En Hungario dum la intermilita periodo judoj ludis gravan rolon en la ekonomio — krom en la agrikulturo —, kaj signifa nombro de la intelektularo rekrutiĝis el ili. En la politiko judoj aperis ĉefe inter la socialdemokratoj kaj komunistoj.

Certe nutris la Hungarlandan antisemitismon la regnado de Rákosi. Post 1956 el la supra gvidantaro de la komunista partio kaj de la ŝtato judoj — krom tre malmultaj esceptoj — fakte malaperis. (Tio verŝajne estis rezulto de konscia strebado de Kádár.) Tamen, en la mezaj postenoj la nombro de judoj restis relative granda.

La diktaturo dum la pasintaj jardekoj — konforme al la proklamataj internaciismaj ideoj — rezolute persekutis antisemitismajn manifestiĝojn, tamen antisemitismo latente ekzistis. Dum la lastaj jaroj — eble nur monatoj — tiuj malpermesoj degelis, kaj kelkaj tiaj pensoj estis vortumitaj. La vortumoj kaŭzis surpriziĝon ne nur ĉe judoj, sed ankaŭ ĉe aliaj tavoloj, ĉar simple ĉia traktado de la juda temo estis tabua, kaj oni ne scias kiel alfronti al fenomenon. Konstateblas ankaŭ la fakto, ke iuj politikaj fortoj uzas antisemitecajn argumentojn por kolekti voĉojn en la balotkampanjo.

Komplikas la situacion, ke inter la gvidantoj de du partioj, cetere la plej antikomunistaj — Asocio de Liberaj Demokratoj kaj Asocio de Junaj Demokratoj — troviĝas pluraj judoj, dum la nacia-popola idearo de Hungara Demokrata Forumo povas altiri tiajn tavolojn de la hungara socio, al kiuj antisemitismaj pensoj ne estas fremdaj. Pro tio Hungara Demokrata Forumo plurfoje publike estis akuzita pri antisemitismo, kiun ĝi kompreneble rifuzis. Iam kaj tiam ŝajnas tiel, ke la problemo de antisemitismo fariĝas ero de la partia batalo inter Hungara Demokrata Forumo kaj Asocio de Liberaj Demokratoj.

Ĉu antisemitismo estas ideo aparte karakteriza por Hungario? Oni povas diri, ke nepre *ne*. Antisemitismo en Hungario certe ne estas pli forta, ol en la najbaraj landoj, kaj nekompareble malpli forta ol en la katolika Pollando(kie oni sukcesas havi antisemitismon sen judoj) kaj en Sovetio. Tamen, tio ne signifas, ke senrespondecaj politikaj fortoj ne povus plifortigi ĝin, ja la atendeblaj ekonomiaj malfacilaĵoj emigos la popolon serĉi propekan kapron — kaj judoj tiom ofte ludis jam tiun rolon dum la historio.

Antisemitismaj manifestiĝoj nun en Hungario estas infanmalsano de la demokratio. Ekvilibrita politika spektro en la nova parlamento — firma centro, memfida kaj forta maldekstra opozicio — povos krei tian politikan klimaton en la lando, en kiu antisemitaj opinioj kalkuliĝos ekstremismaj. Sed se rezulte de la 40-jara komunista regado la politika centro glitos dekstren — tiam antisemitismo povos fortiĝi, kaj tio certe ne utilos al la internacia reputacio de Hungario.

Por kompletigi la bildon, oni devas diri, ke similaj manifestiĝoj de kontraŭciganaj opinioj ankaŭ okazas, eĉ, en gazeto de iu hungara partieto — kies gvidantoj loĝas en Usono(!) — aperis artikolo, kiu strebas ŝirmi la puran hungaran sangon kontraŭ fremdaj elementoj, do ankaŭ kontraŭ germanoj kaj slavoj. Ridinda afero en lando, kie almenaŭ unu triono de la homoj havas german- aŭ slavdevenan familian nomon...

Sindikataj ŝancoj

Sindikatoj dum la lastaj jardekoj preskaŭ seninterrompe funkciis kiel la plej konservativa elemento de la hungara politika spektro. Sindikataj gvidantoj — ĉekape kun Sándor Gáspár — estis membroj de la gvidaj politikaj organoj, kaj ankaŭ tie ili apartenis al la konservativa alo. Oni diras, ke la efikan transformadon de la hungara ekonomia strukturo malhelpis ĝuste la grandpotencaj sidikatestroj.

Post la disfalo de la ŝtatpartio, kaj la malkonstruiĝo de la partia ŝtato, spite la enkondukiĝon de la plurpartia sistemo, la iamaj sindikatoj ĝis nun konservis sian hegemonion. Fondiĝis kelkaj liberaj sindikatoj, sed ties membraro apenaŭ superas unu procenton de la membraro de la iamaj „oficialaj" sindikatoj. Tiuj kun malmultaj personŝanĝoj en la gvidantaro sukcesis konservi sian kvarmilionan membraron — verŝajne pro la fakto, ke la politike pli aktivaj membroj estis okupitaj pri partia organiziĝo. En marto ĉijare tiu enorma sindikata centro iom reformis kaj demokratiigis sian strukturon.

Nomi ĝin „oficiala" sindikato estas malĝuste, ĉar dum la lastaj monatoj ĝi plurfoje akre polemikis kun la registaro, kelkfoje eĉ proklamis strikon. Grandajn demonstraciojn ĝi ne kapablis organizi, sed ĝi ankaŭ ne disfalis, kiel preskaŭ ĉiuj ceteraj kreaĵoj de la partia ŝtato.

La opoziciaj partioj — kiuj ĉe la apero de tiuj ĉi linioj ne plu estos opoziciaj, sed registaraj — vidas en la sidikata centro la lastan bastionon de la partia ŝtato, kaj certe ili uzos ĉiujn eblajn registarajn rimedojn por kontraŭbatali ĝin. (Estas notinde, ke la socialdemokrata partio — sub forta malaprobo de la ceteraj — kreis kontaktojn kun la sindikata centro.)

Kio okazos post la balotoj? La sindikata centro — se ĝi lertos —, povos altigi sian popularecon, ja la nova registaro devos enkonduki pli-malpli drastajn disponojn por transformi la hungaran ekonomian strukturon, kaj tiuj disponoj certe kondukos al la kresko de senlaboreco. En tiu procezo la sindikatoj povos ludi gravan rolon, protektante la interesojn de la laboruloj, sed daŭre ilin embuskos la kaptilo aperi en la rolo de la malhelpanto de la ekonomia strukturŝanĝo. La nova registaro — sendepende de ĝia partia konsisto — certe estos rezoluta pri la ekonomia strukturŝanĝo — kaj la sindikatojn atendos la malfacilega tasko akordigi la interesojn de siaj laborantaj membroj (kiuj ja profitos el la strukturŝanĝo) kun tiuj de la senlaboruloj (kiuj evidente estos la viktimoj de tiu sama strukturŝanĝo).

La nova registaro verŝajne provos stimuli la fondiĝon de pliaj „liberaj" sindikatoj, sed tiam jam tiuj kalkuliĝos „oficialaj", do ĝi verŝajne ne sukcesos likvidi la ĝis nun konserviĝintan centron. Ĉiukaze, oni antaŭvidas duran batalon, kaj verŝajne ankaŭ „varman aŭtunon".

Prognozoj pri senlaboreco

Hungario dum jardekoj ne konis senlaborecon — almenaŭ oficiale. En la vilaĝoj ĉiam ekzistis senlaboreco: precipe por virinoj tie mankis postenoj. Tamen, en landa skalo la malraciaj ekonomiaj preskriboj stimulis la ŝtatajn entreprenojn dungi kiel eble plej multajn homojn — kun malalta salajro. Tiel naskiĝis la ŝerca konstato, ke en Hungario ekzistas ja senlaboruloj — sed ili estas *en* la fabrikoj, ne *ekster* tiuj.

Dum la lastaj du-tri jaroj aperis en Hungario efektiva senlaboreco. Jam ne plu temas pri tio, ke fake ne edukitaj junaj knabinoj ne trovas postenon — sed perdas laboron plenaĝaj viroj, kiuj devus nutri familion. En la nuna momento la nombro de senlaboruloj estas ĉ. 30 mil homoj — tio konsistigas ĉ. 0,7 % de ĉiuj dungitoj.

La programo de la Németh-registaro por la fino de 1990 antaŭvidas — iom elaste — 50-100 mil senlaborulojn. Tamen, la paŝoj, kiujn tiu registaro volas fari cele al la ekonomia strukturŝanĝo, promesas minimume 150 mil maldungojn.

Sed la Németh-registaro transdonos la potencon al alia registaro, kiu certe faros pli drastajn paŝojn por ŝanĝi la ekonomian strukturon. La ĉesigo de la deficitaj minejoj kaj metalurgiaj uzinoj promesas almenaŭ 100 mil maldungojn, la fermo de deficitaj prilaboraj entreprenoj almenaŭ samtiom. Apartan problemon signifas tiuj entreprenoj, kiuj produktas por Sovetia eksporto.

Hungara Demokrata Forumo antaŭvidas nur iompost-ioman strukturŝanĝon — ĝia enregistariĝo do verŝajne signifus malpli amaran pilolon por la laboruloj koncerne senlaborecon. La Asocio de Liberaj Demokratoj volas fari pli drastajn paŝojn, kiuj povus sekvigi eĉ 400-500 mil senlaborulojn (kvankam en ilia programo aperas nur centmila prognozo; verŝajne ili esperas alvenon de signifa eksterlanda mono por kreado de novaj postenoj).

Generos sufiĉe multajn senlaborulojn ankaŭ la privatiga procezo, ja la novaj posedantoj certe ne volos havi superfluajn dungitojn. La re-enpostenigon de senlaboruloj certe malrapidigos la malalta edukiteco de la hungara laborforto — ja probable maldungiĝos ĉefe la malplej bone instruitaj laboruloj.

La ŝtato jam komencis krei la necesajn socialajn instituciojn por trakti la problemon de senlaboreco. Ankoraŭ ne estas klare, de kie oni prenos la necesan monon, tamen la financaj fontoj verŝajne estos troveblaj. Pli maltrankviliga aspekto estas la socipsikologia: kiel la hungara socio alfrontos amasan — aŭ relative grandnombran — senlaborecon. Estas timinde, ke komence la socio emos ekskomuniki senlaborulojn, ne havante modelon kiel trakti ilin, kaj tiamaniere lasi ilin prede al ekstremismaj politikaj tendencoj.



La panoramo de la urbo ĉiam estis bela. Sed kion diri pri la politika panoramo...?

Reago al HV-artikolo

Tre estimata redakcio,

en via revuo HUNGARA VIVO, 89/1, pp. 16-17, mi legis la raporton de I.A. Ĉerkasova pri la Davidova Biblioteko en Saratovo. Pri tio mi ŝatus komuniki al vi jenon kun peto publikigi.

Kadre de miaj esploroj pri la frua periodo de la esperanto-movado en Ruslando (1887-1921), diplomverkaĵo ĉe la Instituto pri Slavistiko de la universitato Zürich, Svislando, mi restadis dum 9 monatoj en Sovetunio. Okaze de tiu restado mi vojaĝis al Saratovo kaj havis la eblon konatiĝi kun la restaĵoj de la Biblioteko de G. Davidov. Restintaj dokumentoj de tiu librokolekto troviĝas en la regiona teknika biblioteko. Bedaŭrinde mi renkontis tiun materialon en tre malbona stato neglektitan kaj de la lokaj esperantistoj (kiuj nuntempe estas malorganizitaj) kaj de la bibliotekistoj (kiuj postlasis ĉe mi impreson de indiferenteco kaj nekomprenemo pri la materialo, kiu cetere ne estas tre valora). Bedaŭrinde, pro denunco fare de la bibliotekistino mi estis kontrolita de la lokaj aŭtoritatoj, kvazaŭ arestita kaj forpelita de la urbo Saratov. Malgraŭ petoj en Moskvo, la administrejo por vizoj kaj registriĝoj (UVIR) rifuzis al mi doni permeson kun vizo por veturi al Saratovo, klarigante ke tiu urbo estas fermita por eksterlandanoj. Proprariske mi vojaĝis al Saratovo, ĉar mi volis konatiĝi kun la esperanto-biblioteko. Pro tiu ĉi bedaŭrinda kaj ridinda incidento kun la saratova polico mi ne povis fini la antaŭviditan sciencan laboron.

Aldonendas diri, ke pli interesaj dokumentoj pri la siatempa saratova esperanto-agado eldonitaj ĉefe de G. Davidov hodiaŭ troviĝas en ŝtataj bibliotekoj de Moskvo kaj Leningrado (kaj supozeble en aliaj ŝtataj aŭ privataj bibliotekoj ne nur de Sovetunio, sed ankaŭ en eksterlando). Mia ĝenerala impreso pri la disponigeblaj fontoj pri la frua esperanto-movado en Ruslando estas, ke la ekzistanta materialo ne kapablas doni profundajn historiajn informojn. Multaj dokumentoj estas ofte malaltkvalitaj propagandaĵoj, lernolibroj kaj tradukaĵoj el nacilingvaj literaturoj. La plej fidindaj fontoj el la esplorata tempo restas la revuoj Ruslanda Esperantisto, Ondo de Esperanto kaj kompreneble ankaŭ (La) Esperantisto kaj Lingvo Internacia (ambaŭ estis eldonitaj ekster Ruslando, sed raportis pri eventoj en tiu lando). Mia tasko estas kolekti kaj sistemigi la kolektitan materialon kun la celo havigi superrigardon pri la ruslanda esperanto-movado en la indikita tempo. Per mia laboro mi volas trafi interesitajn slavistojn, historiistojn pri esperanto kaj interlingvistojn.

Andy E. *Künzli,* Svislando

Edwin de Kock

Knoso, 1985

I

Lastan vesperon sur monteto,
ĉambre, eble nur ducent metrojn for
de Knoso:
ombramaso el masonaĵo kaj memoroj.
Post la varmo, en mi Minoan tagon
prikomentis plu la cikadoj
per la seka, kaj ne tute agrabla
lingvo de antaŭ la Helenoj,
maldeĉifrebla Linia A.

Sola, oldiĝanta viro kun si parolas,
tial mi aŭdas min murmuri:
„Morgaŭ mi ŝipos el ĉi horoj".
Flanke de la malhejma muro senportreta.
Per memoroj mi anticipis
enkajutiĝon tagon poste,
kiam la pluvagonta kor'
relevos sian ankron.

La krepusko dikiĝos preter Iráklion,
estingante vinruĝon de l' multlarma maro.
Sub mi ferdeko
kaj helice subtila akvokanto.
Ŝvele spirados, re kaj re, la lula
Mediteraneo, brusto eterna
kiun ekscitas la hidrarga luno.
Al Pireo kaj tiu Ateno brua, ne tre bela,
kie la ĉiutaga, malpraksitela sun'
marteletadas
lastajn ĉarmojn de l' Akropolo
por ĉiam for.

II

Super ruinoj el pli olda tago
mi repensis Aŭgustan posttagmezon:
fresko de brunaj sklavoj nudabrustaj.
Pleto por sinjorino, blanka
en tiu supereco sekura
kaj eterna kiel la farbmakul'
kontraŭ suna aŭ pripluvata muro.
Foje mastroj de l' maro kaj insuloj
kaj ĉi malprofunda glorkavo
inter montetoj —
sinfidaj kiel la cikadoj
tro sekuraj en sia somero.
Tiam fremduloj el la blanka nordo,
kiuj post jarmiloj ankoraŭ
subpremas idojn de Ĥam.

III

Lite en ĉipa ĉambro, dum la steloj
unu post la alia trapikis.
Miaj pensoj eksaltis trans amarajn hulojn
ree en tiun posttagmezon
ĉe Mikeno.

Longe mi ĉirkaŭgrimpis
la konuson de citadela monto,

apud ingvena valo jam sterila,
malplenigita je siaj homoj specialaj.
Brizo inter ŝtondentoj
super la tomboj.

IV

Unue ĝentilaj salutoj, tradukitaj,
dum la maten' rozfingre
tuŝis la fremdan velon.
Tiam, kelkjare, la negocoj bonaj.
Fine ili alvenis tie ĉi la lastan fojon,
ne forironte,
plia mastropopolo,
post — aŭ eble mem — la tertremo.

Kiomfoje antaŭ mia korsalto
oni sin ĝenis pri ĉi postesignoj
de la antikva honto?
Eble alia turisto, jen kaj jen,
pezpaŝe kiel mi hodiaŭ
sub la enigma Fajsta disko de la suno
aŭ — en frida sezon' — kurante el la pluvo,
ne komplete indiferentos
aŭ per la tempspegul' rekonos,

Kial ĉiĉerono mensogis
al fraŭlin' en Parize ŝika robo,
floranta kiel ŝi,
kvazaŭ marŝinta el inter freskulinoj?
„Brunas la viroj, ĉiuj.
Vi observos, ke blankaj estas nur la inoj.
Arta stiligo, vi komprenas!"

(Sed mi memoris ĉirkaŭ la angulo,
ĝuste de tiu masonaĵo kien mi —
pro la sunŝarĝo — laca, ŝvitante,
la dorson premis,
princon kun la lilioj, blankan!)

Tiajn haŭtojn kun historio tro konata
tuj mi rekonis.

Filoj de Kaftor, nepoj de Micraim,
iam fro la suda, proksima kontinento,
kiu el sia polvo
poste ekmodlis ankaŭ min.

ke la paseo estas la nuno.
Neforgesintoj en Afriko
daŭre kolera pri ĉi nordo
kien ili ĉiam returnos la okulojn.

Laŭ tiu Libro kiun Eŭropanoj
duonkrede tiom dementis,
vazoportantoj de Knoso
kun siaj samrasanoj — ĉi-insule
kaj sur ĉirkaŭaj bordoj —
ĉendis unue
civilizojn kiujn ni poste sorbe aneksis
kiel blankulan gloron,
memorante nur pri Grekoj kaj Romianoj,
dum la ŝtonoj silentas.



V

Mi komencis forŝvebi
en la grizan pradormon de la loko.
Tiam moviĝis la kurteno.

Malvualis sin
diin' majesta, kiu ne mortas
sed, madonigite, estas kultata
en la antikva sango de la kamparanoj,
gepiuloj vilaĝaj
kaj la maristoj el granda haveno —
trans popoloj, malgraŭ ĉi tridek kvin jarcentoj,
dum al sentempa humo korpoj kaj folioj
faladis.
En la palaj matenoj de kalkitaj kirkoj,
vespere apud katedralaj muroj.

VI

Abrupte,
veke, ekŝiris min muziko:
instrumentoj kiuj de tiam ne plu ĉesis.
Horon post horo
la lokuloj fordancis.
Ĉe la unua mi komprenis,
ke ĉi turmento sin eltrenos
ĝis eksangos l' aŭroro.

Deĵetante litaĵojn,
jam hatanto de Kretaj melodioj

senhonte laŭtaj, sonpoluo,
fine mi sobmarŝis laŭ la deklivo
kaj turniĝis dekstren, por senombriĝi
preter la lasta stratlumilo,
apud vinberĝardeno.
Nigraj, somerpezaj uvoj jam ne videblaj.
Tie la voj' serpentabrupte
liven svingiĝis kaj plugrimpis laŭ konturoj
neŝanĝiĝintaj dum la tuta sovaĝeco
de tiu historioŝtormo kiu estis ni,
blovaĵoj
trans la mondon el ĉi Eŭropaj bordoj.

Unu-du aŭtoj preskaŭ forbalais min,
ĉar ĉe la malĝusta flanko de l' streta vojo.
Pli profunden en la tenebron,
ĉirkaŭ monteton ekster miajn jarojn for.

Fine mi haltis treme kie la silento
sur mian ŝultron metis
Ĥamidan manon.

Tie, l' unuan fojon kiel miadome
en la lando duonmalplena,
por mi burĝonis atentindaj steloj,
konstelacioj de ĉi tero fremda,
kiujn — krom la Sapfa Plejado —
mi ne rekonis,
kvankam gvidintaj ŝipojn de l' komenco,
antaŭ triremoj.

Lumoj alte super la branĉoj,
ĉielsignoj post tiom da popoloj,
tiom da ni — okuloj post okuloj —
konservantaj la figuraĵojn de la koro.

VII

Poste mi devis, lanta, deturniĝi,
piedpinte repalpetante blindan vojon —
dum en la kapo ĉio brilis —
reen al kie lumflaketoj kaj orkestro
makulaĉe mian nokton profanis.
Sed, pasante unuloke, mi sciis,

ke proksimas dekstre, kaŭra en ombroj,
la silentamaso de la fragmenta Knoso.

El la palacruin' kun ĝiaj multaj ĉambroj,
de tiel longe sensonigitaj,
al mi leviĝis melodi' subita,
fremda sed jam dum horoj tre konata.
Stonaj plankoj kie nude frapetis
plandoj de iamuloj
dum ilia ordinaro, kiel ĉi Grekoj,
en kies sangon
transbordiĝe kunfluis la muziko
el distancoj kaj la neimageblaj jaroj.

Dume super ni ĉiuj —
korpoj de l' nuno,
polvo kiu pludancis en ruinoj
kaj oldiĝanta turist' nerimarkita
preter la rando de ilia *nokto —*
lante, rapide,
disdrivante, giris la galaksioj.

Honto pri mi, ekzalto
pro la obstino de fragila karno
super siluetoj, kiujn la koro restaŭris,
kaj la falintaj ŝtonoj.

1986. 09. 21

Edwin de Kock — en Aŭgsburgo (1985)

Daniel Skagen havas danĝeran metion: li estas estro de soldulaj taĉmentoj, pretaj akcepti ajnan taskon, kondiĉe ke la „laboro" estu bone pagata.

Foje li ricevas neatenditan kaj surprizan vizitanton: la ĉefprokuroron de la Franca Respubliko. La altranga sinjoro komisias lin pri forrabo de iama franca militkrimulo el fora Kariba insulo.

Skagen akceptas la taskon, ĉar en tiu momento li ankoraŭ ne scias, ke ĉiuj liaj pli fruaj aventuroj estis feinaj fabeloj kompare al tio, kion li alfrontas kun siaj kamaradoj...



Nemere, István: Vivi estas danĝere. Aventura romano. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1988.21 cm, 160 paĝoj. Kun kolora kovrilpaĝo. Prezo: 21,- gld. (Por Hungario: 90,- forintoj.)

En tiu ĉi romano — daŭrigo de „Vivi estas danĝere" — Daniel Skagen reaperas kun novaj nomo kaj vizaĝo, por venĝi al la franca ministro pri internaj aferoj pro siaj murditaj kamaradoj. Li trovas riĉan aliancanon, pli ĝuste aliancaninon por sia entrepreno: sinjorinon Gerradi, kiu perdis siajn filon kaj nepon pro la senskrupula ministro.

Daniel Skagen ekagas... kaj ĉio okazas surprize kaj intereskapte, kiel ordinare en Nemere-romanoj...



Nemere, István: Vi povas morti nur dufoje. Aventura romano. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1989. 21 cm, 184 p. Prezo: 21,- gld. (Por Hungario: 90,- forintoj.)

KLUBO DE NEMERE-LEGANTOJ

Sub la egido de la Eldonejo de Hungara Esperanto-Asocio en Hungario funkcias tute unika libroklubo de la legantoj de la populara prozisto István *Nemere:* ĝiaj membroj devigas sin aĉeti ĉiujn aperantajn verkojn de sia ŝatata aŭtoro, dum la Eldonejo nepre havigas tiujn librojn al ili. En la momento, kiam tiuj ĉi linioj estas tajpataj, la klubo nombras pli ol 3500 membrojn, kvankam ĝi estas apenaŭ okmonata — ĝi kreiĝis en majo de 1989.

La ideon pri la klubo naskis tiu amaso da leteraj mendoj, kiuj post reklamo en hungarlingva gazeto atingis nian libroservon precipe el provincaj urboj kaj vilaĝoj. Tio montris, ke la nacia librodistribua reto funkcias tute ne perfekte: al vilaĝoj kaj malgrandaj urboj ofte entute ne iras libroj, aŭ ne tiuj libroj, kiujn la homoj vivantaj tie preferus legi.

Rapide ni konstatis, ke la plej multaj homoj mendis ĉe ni Nemere-librojn. Niaj kunlaborantoj do sendis al ili diligente la librojn — dum la kalendara jaro 1989 nia libroservo dissendis al Hungarlandaj individuaj mendintoj ĉ. 70 mil libropakaĵojn! (la cifero ne estas erara, vere temas pri *sepdek miloj...*)

Kaj estis multaj, kiuj demandis nin, ĉu ni povus sendi al ili ankaŭ Nemere-librojn, aperigitajn far aliaj eldonejoj. Tiam naskiĝis la ideo pri Nemere-klubo. Ni rapide skizis la planon: difinis nealtan membrokotizon pagendan nur ĉe la aliĝo, kreis membrokarton, kaj al la aliĝintoj ni donacis bibliografion de la ĝisnuna verkaro de István Nemere. (Tiu bibliografio enhavas kompreneble ankaŭ liajn esperantlingvajn verkojn — jen eta plia paŝo por la popularigo de Esperanto.)

La regularon de la klubo ni publikigis la unuan fojon en la libro *UFO a láthatáron* („Nifoj sur la horizonto"), aperinta en 115 mil ekzempleroj, kiu cetere enhavis ankaŭ koncizan Esperantan gramatikon kaj bazan vortareton sur 12 paĝoj, plus la leteron de István Nemere al siaj legantoj, en kiu li rekomendis al ili lerni Esperanton.

Baldaŭ post la apero de la libroj inundis nin leteroj de aliĝantoj. La membraro rapide kreskis, kaj tiamaniere ni povas aĉeti la Nemere-librojn eldonitajn far aliaj eldonejoj kun favora rabato, kiu kompreneble ne nur kovras la kostojn de la administrado, sed eĉ kreas ioman profiton.

De tempo al tempo ni dissendas al la membroj cirkulerojn kun teknikaj sciindaĵoj, informoj pri aperontaj Nemere-libroj, kaj tiam ni profitas la okazon oferti al ili niajn ceterajn eldonaĵojn, interalie ankaŭ la esperantlingvajn librojn de Nemere. Surprize multaj Nemere-ŝatantoj volis posedi sur sia librobreto ankaŭ la esperantlingvajn verkojn de sia preferata aŭtoro. Probable ili almenaŭ trafoliumis tiujn librojn...

Dum la aŭtuno de 1989 en Budapeŝto ni organizis la unuan kunvenon de la klubo — ĝin partoprenis 350 homoj el ĉiuj anguloj de Hungario. Unu el la programeroj estis konkurso pri la kono de Nemere-libroj. La unupersonan ĵurion kompreneble konsistigis mem István Nemere — kiu ja pli funde konus la Nemere-romanojn...? Nu, montriĝis, ke foje-foje iuj ĉarmaj junulinoj posedis pli precizajn konojn pri ili...

Tiu unika libroklubo daŭre kreskas. Se nur la ekonomiaj malfacilaĵoj ne plene nokaŭtos la hungaran loĝantaron, la atingo de la cifero *kvin miloj* dum la jaro 1990 ne ŝajnas esti fantaziaĵo...

Kompreneble, ne ĉiuj nepre raviĝas pri tia klubo, ja la opinioj pri la verkaro de Nemere estas malsamaj. Tamen tia *klubo por vivanta verkisto* ankoraŭ neniam ekzistis en Hungario — por liaj libroj do ekzistas forta kaj klara bezono. Kaj la Eldonejo de HEA kontentigas tiun bezonon, *servas* al la homoj — kaj per tio plej efike informas ilin pri la ekzisto de Esperanto, samtempe ĉerpante financaajn rimedojn por la Movado el ekstermovadaj fontoj.

„Nek vojo, nek pado" — nova romano de Nemere

Péter Nádas
(1942 –)

Fabelo pri la fajro kaj la scio

Hungario, dum varmega somera nokto, estis incendiata je siaj kvar anguloj, de nekonataj farantoj, pro nekonata motivo kaj en nekonataj cirkonstancoj. Ni scias nur, ke la fajro ekflamis okcidente ĉe Ágfalva, oriente ĉe Tiszabecs, norde ĉe Nógrádszakáll, sude ĉe Kübekháza. Brulis la stoplejo, brulis la kampoj aridaj pro senpluveco, kaj, iom post noktomezo, la fajro atingis la unuajn domojn de la komunumoj. Plej milda kaj plej senkulpa venteto, kiu trablovetis la limon de okcidente ĉe Ágfalva, de oriente ĉe Tiszabecs, de norde ĉe Nógrádszakáll, de sude ĉe Kübekháza, klinis la flamojn internen de la lando. Budapest dormadis senkonjekte.

Oni anoncis, fakte, kiel sepan informon de la matena kroniko, ke en la orientaj, okcidentaj, nordaj kaj sudaj departementoj okazas ekde la frumatenaj horoj ĉionampleksaj fajristaj ekzercoj, sed tiu sensignifa radio-informo sciigis al ĉiuj hungaroj, ke la evento estas grandsignifa.

Kvankam ĉiu sciis, ke la informo ne signifas, kion ĝi signifas, komune ĉiuj ŝajnigis ne scii, kion ĝi signifas. En la hungara lingvo de tiu tempo „grandsignifa" signifis ekzemple „sensignifa" kaj „sensignifa" signifis „grandsignifa", kvankam ĉi vortoj ankoraŭ ne tute perdis sian originan signifon, kaj tial ankaŭ komuna konsento ne povis ekzisti koncerne ilian signifon. Silenta konsento ekzistis nur koncerne tion, kion ne povas signifi neekzistanta komuna konsento.

Se pro iu bonŝanca hazardo la vortoj estus povintaj perdi sian originan signifon, tiam ili akirintus novan signifon, kio siavice ne estis imagebla sen komunigo de la individuaj scioj, sen nova komuna konsento. Pro tio preskaŭ ĉiu vorto en la lingvo de la hungaroj signifis – jen laŭ iliaj individuaj scioj, jen laŭ ilia komuna nescio – ion alian ol kion ĝi signifis, kaj ili devis serĉi la signifon de ĉiu vorto jen laŭ la situacio de la parolanto, jen laŭ la rilato inter la originala kaj la nova sencoj de la vorto. Kaj se la vorto ŝajne perdis sian signifon, ĉar ĝi montriĝis nekonsiderebla kaj laŭsence kaj laŭ la situacio de la parolanto, tiam ili atribuis pli profundan signifon al tiu ĉi absurdaĵo ol se ĝi ion signifus. La hungarlingvaj vortoj kun nekonsiderebla signifo aludis al tiu profunda homa komuneco, pri kiu cetere ili tute ne rajtis pensi. Kiuj pensas en aliaj lingvoj, tiuj neeviteble ekideas ion pensante pri la nenio; male, kiuj pensas en la hungara lingvo, tiuj devis solvi ŝajne neplenumeblan historian taskon: nek ekidei ion pensante pri la nenio, nek, pensante pri la io, ekidei ion tian, kio povus konduki ilian pensadon al io.

Ĉi stranga metodo de lingvouzado ja ne simpligis ilian interkomunikadon, sed la baza regulo de ilia interkomunikado estis ĝuste: ne igi komuna scio ilian individuan scion, kaj pri tio ilia sperto longdatis. La lasta unu kaj duona jarcentoj instruis al ili la konvinkon, ke ekskluzive la komuna senscieco povas ilin ŝirmi de ĉiaj individuaj stultaĵoj; do se ili ne interdividas siajn individuajn sciojn, tiam ankaŭ komune ili ne faros tian stultaĵon, kiu povus kontraŭmeti ilin inter si aŭ kontraŭ aliaj. Tiel ili rezonis. Kaj kiel ajn pene sekvebla ŝajnas ilia logiko, ĝi tamen ne pruviĝis erara en la direktado de iliaj individua kaj komuna sortoj, ĉar ili restis hungaroj dank' al la komuneco de ilia logiko ekskludi komunecon de iliaj scioj, kaj tiel, vidpunkte de ilia pluvivado, ilia logiko ne nur ne pruviĝis senutila, sed ĝi fariĝis ties unusola kaj ekskluziva kondiĉo. Tamen, kio pruviĝas utila helpilo dum tempesto, tio ne nepre utilas helpile en kazo de incendio.

Se ŝipon trafas ŝtormo, ĝenerale oni ferlas la velojn, sed foje la vento povas krei tiajn kondiĉojn, ke pli taŭgas malferli ĉiujn velojn. Sed se surŝipe ekas incendio, tiam vidpunkte de la lukto kontraŭ la detruaj flamoj nek ferli nek malferli la velojn havas aparte grandan signifon.

La logiko de iliaj konduto, pensado kaj lingvouzo havis do trajton, kiun ni apenaŭ povus nomi falsa aŭ erara, sed pli ĝuste negativaĵo tia, kiu ecas en ĉiu ambigua afero. Se baza regulo de ilia interkomunikado fariĝis ne igi komuna ilian individuan scion, ĉar ili povis gardi sian nacian komunecon ekskluzive per obseda persisto je ĉi silenta interkonsento, tiam por individuo la konsekvenco de tio devis esti, ke ĉiu hungaro supozis: la alia sambone scias tion, kion li mem scias, kvankam nek por unu nek por la alia ekzistas eblo difini ĉu tion, kion ili scias, ĉu tion, kion ili ne scias. Sed ĉar ili deviĝas konfidi sin je konstantaj, reciprokaj supozoj, kiuj serĉas la signifon de la vortoj evitante ilian signifon, komune ili povas scii finfine nur tion, ke ili ĉiuj deviĝas konfidi sin je supozado de tiaĵoj, pri kiuj ankaŭ individue Ili ne scias, respektive pri kiuj ankaŭ individue ili ne povas scii: kion ili ne scias pri tiuj komune.

En ĉi delikata situacio la loĝantaro de la lando tamen restis unueca je tio, ke neniu iris estingi la fajron. Per ilia ne-ago, kiu koncernis unusence la fajron, ili konservis sian komunecon tiel, ke ili ĉiuj pripensadis la signifon de la fajro, kaj kiu ne konsiderus pensadon kiel ago? Pri la demando, kion signifas la fajro, la opinioj kompreneble variis, sed interŝanĝo de ili ne povis okazi almenaŭ pro tio, ke ĉiu supozis rajte, ke la alia scias minimume samtiome, ke ĝi signifas ne tion, kion ĝi signifas. Do, se la fajro ne signifas fajron, tiam aŭ superfluas okupiĝi pri ĝi, ja povas temi nur pri fajro, kiu ne brulas, aŭ necesas okupiĝi pri tiu brule urĝa problemo, ĉu ĝi ne signifas akvon. Kiuj traktis, la demandon laŭ la senco de la vorto, tiuj devis pensi nepre pri akvo; kiuj traktis la demandon laŭ la situacio de la parolanto, maldevis pensi pri fajro. Dum la unuaj pensis, ke la landon minacas en vero inundo senprecedente granda, la lastaj pensis, ke, anstataŭ estingi verajn fajrojn, la fajristoj nun ekbruligas pseŭdajn. Ĉar se povas temi pri fajro, kiu ne bruligas, tiam samrajte eblas paroli pri pseŭdofajro, kiu bruligas, kaj la ĉi-lasta ne malpli danĝeras ol incendio signifanta en vero inundon.

Ĉi tiu komuna nescio pri la individua scio pri ĉi grandsignifa danĝero kreis ĝis la posttagmezaj horoj tian atmosferan tension, kiu en aliaj lingvoj ĝis hodiaŭ estas nomata la tensio de respondeco sentata por la sorto de la nacio. Ne en la hungara de tiu tempo. Nome, kiel ajn ili opiniis individue, neniu el ili restis, kiu ne sentis la penetran odoron de fumo; tamen, se ili entute priparolis tiajon inter si, komune ili preferis opinii, ke koviĝas tempesto senkompare potenca, ja la ĉielo tute nigriĝis, kvankam individue ili sciegis, ke fumon povas havi nek inundo nek pseŭdofajro, kaj tial ĝi ne povas antaŭi tempeston. Poste la vesperaj televid-informoj pli detale traktis la eventojn.

Por pli preciza komprenigo de la eventoj ankaŭ ni devas pli detale trakti tiujn bravajn virinojn kaj meritoplenajn virojn, por kiuj iĝis ne simple nur profesio, sed vivmaniero trivanta korpon kaj animon la publika laŭtlegado de informoj ĝenerale utilaj. Ĉar en tiuj jaroj la hungaroj fariĝis tiom egalaj en pensado, konduto kaj sekve aspekto, ke eĉ ili apenaŭ kapablis diferencigi inter si kaj aliaj. Ekzemple, karakterizis ilin naskiĝi jam adoltoj, kaj ĉar ili ne havis je kio plenkreski, ili restis infanoj. Lernejoj iĝis nenecesaj. Estante adolto, ĉiu povis klerigi ĉiun pri ĉio, ja neniu elkreskis el la infaneco; estante infano, ĉiu povis kleriĝi el ĉio, ja por neniu eblis fariĝi adolto. Kaj se okaze iu havis neniun proksime, tiam li povis utiligi sin mem cele al klerigado, ja ĉiu hungaro havis kiel komunan kaj esence propran econ ne plu konscii kiel infano tion, kion li ankoraŭ sciis adoltaĝe. Ene de tiu egaleco tamen troviĝis sindediĉaj individuoj, kiuj devis — ĝuste por la pli perfekta kaj totala egaleco — resti pli egalaj ol la aliaj.

Ni devas nomi malbonvolaj kaj miskondukaj asertoj tiujn senrespondecajn supozojn, laŭ kiuj tiuj ĉi pli egalaj individuoj estis la regantoj kaj regantinoj de la lando. Laŭ la nuna stato de la esploroj neniu pruvo indikas, ke iu ajn de la regantoj kaj regantinoj de la lando iam ajn dividis sian individuan scion kun iu ajn. Tion ili faris nek inter si nek kun aliaj, sekve inter la landanoj spertaj pri publikaj aferoj kaj tiuj nespertaj la diferenco estis pure formala. Dum la landanoj nespertaj pri publikaj aferoj — elirante ĝuste el la praktiko de sia nesperteco pri publikaj aferoj — persistis obsede je tiu silenta interkonsento, akceptita en sia propra intereso, ke ili neniel rajtu igi komuna scio sian individuan scion pri la aĵoj, la landanoj spertaj pri publikaj aferoj — elirante ĝuste el la ideo de ilia sperteco pri publikaj aferoj — persistis obsede je tiu silenta interkonsento, akceptita en la intereso de la komunumo, ke ekskluzive la komuna nescio pri la aĵoj povas certigi tiun individuan scion, pri kiu neniu rajtas konscii. Dum la unuaj ŝajnigis malhavi individuan scion kaj havi nure komunan nescion pri la aĵoj, la lastaj ŝajnigis, ke la komuna nescio estas ilia individua scio. Kaj fakte, tiel estis logike. Baze de kio rajtus do igi parto de la komuna pensado sian individuan scion tiu, kiu sen propra kulpo ne estas sperta pri publikaj aferoj; kaj baze de kio ne rajtus igi bazo de sia individua pensado la komunan nescion tiu, kiu sen propra kulpo estas sperta pri publikaj aferoj? Ĉi-aspekte do ni certe povas paroli pri esenca egaleco de regantoj kaj regatoj. La regantoj ne povis limigi la regatojn en la libereco de ties individua scio, sed ankaŭ la regatoj ne povis limigi la regantojn en la libereco de ties komuna nescio. En Hungario tiutempe ĉiu rajtis fari, kion li ne scipovis, kaj pri tio publike ĉiu rajtis pensi, kion li ne pensis. Kaj se la hungaroj per tiu nobla kaj alloga senkonscienceco tamen ne puŝis sian landon en definitivan kaoson, tio dankeblas nur al la fakto, ke troviĝis inter ili individuoj pli egalaj ol ili. Nome, tiuj individuoj estis la anoncistoj.

La hungaraj anoncistoj laŭvorte similis ĉiujn aliajn hungarojn, sed laŭ siaj vortoj tamen diferencis de ili en ĉio. Ili similis ĉiujn ceterajn hungarojn, ĉar ankaŭ ili ne povis kunigi en si malpli avantaĝe adolton kaj infanon, sed dum meza hungaro havis la okazon klerigi pri la stato de la mondo maksimume kelkajn hungarojn en la sama tempo, la anoncistoj havis la

okazon klerigi pri tio ĉiujn hungarojn krom sin mem. Ilia didaktika agado ne povis efiki je si mem ankaŭ tial, ke ili tamen diferencis de la ceteraj hungaroj en tio, ke — dum tiuj rajtis interpreti laŭplaĉe la aŭditaĵojn laŭ sia individua scio, — la anoncistoj devis ŝajnigi, malgraŭvole, ke ili komprenas eĉ ne vorton el tio, kion ili diras al la aliaj. Ili entuziasmis pri klerigado, malviglis pri kleriĝo. Ĉar se ili estis tiaj individuoj, kiuj komprenis eĉ ne vorton el kion ili diris, ĉar ili ne estis individuoj, tiam ili povis enkorpigi plej brile tiun komunan nescion, kiun posedis komune ĉiuj hungaroj. Se mi povas reprezenti ion komunan en ĉiuj, ĉu tio ne sufiĉas por igi min entuziasma ankaŭ individue?

Vidpunkte de klerigado neniu povis esti pli adolta ol ili, ja ili klerigadis ĉiujn, sed ankaŭ pli infana ol ili neniu povis esti, ĉar ilin ne klerigis eĉ iliaj propraj vortoj. Nome, se ili estus ŝajnigintaj kompreni kion ili diras, tiam ĉiuj vidus, ke ili estas frenezaj, ĉar ili komprenus laŭŝajne ion tian, kio fakte estas sensenca. Tiel ili do ne povis agi. Pli ol sufiĉa kaŭzo por esti malviglaj.

Sed ilia senkompara populareco restis neŝancelebla ankaŭ pro alia kaŭzo. Tiutempe la hungaroj uzis por paroli nur tri vortojn, kiuj koncernis la bazajn vivfunkciojn, sed tiuj perdis sian originalan signifon. Unu el la vortoj indikis agon, alia la objekton de tiu ago, kaj la tria anstataŭis eblajn adjektivojn kaj adverbojn. Ni ne nur pekus kontraŭ la deviga deco, sed ni ankaŭ rompus la kadrojn de tiu ĉi scienca studo, se ni dirus pli pri tiuj vortoj. Tamen ni ne povas prisilenti la fakton, ke individue ankaŭ la anoncistoj ne uzis aliajn vortojn por la ĉiutaga parolo, kvankam dum publikaj aperoj ili parolis en lingvo, en kiu neniu parolis. Tio konsideriĝis plursignifa cirkonstanco por ĉiuj hungaroj. Precipe ĝi signifis, ke ekzistas komuna lingvo, kiu ne ekzistas; aliflanke ĝi memorigis ilin pri tio, ke io tia ne nur ekzistis, sed — kaze de komuna interkonsento, kiun povus ebligi bonŝanca hazardo — povos ree ekzisti.

Dum tiu varmega somera nokto, kiam pli granda parto de la lando jam flamis, laŭvice deĵoris anoncistino aparte populara, kun patrinece karesa voĉo. Konstateblas sen troigo, ke el la pli egalaj inter la egalaj la plej egala estis ŝi. En la lastaj unu kaj duona jarcentoj de la hungara historio ne okazis eĉ unu sublime ĝojplena aŭ funebre tempesta evento, pri kiu ne ŝi sciigis ilin, kaj tiel la dankemaj landanoj ne povis fari aliel ol fermi ŝin en la koron. Sian escepte grandan popularecon ŝi povis danki al escepta dispozicio, kiun aliaj sopiris arde sed vane, povantaj maksimume nur imiti ĝin. Nome, la skizofrenio disŝiris ŝian personecon ne en du partojn — kiel okazis al ĉiuj ceteraj, ordinaraj hungaroj —, sed en tri, kio ebligis al ŝi ne nur laŭtlegi plej konvinkite kaj kun profunda identiĝo tekston, el kiu ŝi komprenis ŝajne eĉ ne vorton, sed per siaj akcentoj ŝi signalis al la aliaj unue tion, kian sencon devas havi la sensencaj vortoj vidpunkte de la komuna nescio, due tion, kian sencon ne devas havi vidpunkte de ilia individua scio tio, kio fakte neniel havas ian ajn sencon. Neelĉerpebla fonto ŝi estis, orakolo kaj aŭguristino.

Mi devas komenci per drama anonco, ŝi diris tiun vesperon per sennuba voĉo al tiuj, kiuj ankoraŭ povis aŭdi ŝin, kaj dum la nerezistebla ĉarmo de ŝia matura ineco pribrilis ŝian vizaĝon, ŝi perdis la parolon tiel, kvazaŭ ĝi dronus en unu el tiuj ordinaraj vortoj, kiujn ankaŭ ŝia vigla lango kutimis uzi. Ŝi povis scii tre bone, ke ŝiaj sampatrianoj komprenas pli el la neeldiritaj vortoj, ĉar tiam ili ne nur tion komprenas, kion la vorto ne signifas, sed ankaŭ tion, kion ĝi signifas rilate al la situacio. Poste, kvazaŭ antaŭalude, el la vidpunkto de la individua scio, al tiuj vortoj signifantaj komunan nescion, kiuj forflugos de ŝiaj lipoj brilaj pro fajna mokemo, ŝiaj okuloj eksparkis fulmojn. Kvankam disaŭdiĝis misfamoj, ŝi diris, laŭ kiuj la lando brulas, informoj el plej certa fonto rajtigas aserti, ke la vivo pluiras en la tuta lando trankvile kaj senperturbe. Neniu lasis sin erarigi. En la rostejoj ĉiuj preparas sian vesperan viandaĵon, la televida urseto lavas la dentojn kiel dece, kaj baldaŭ ekpulsos la mekanika koro de la diskotekoj. Ĉion ĉi ŝi deklaris per voĉo trempita en la plej teneraj emocioj, kaj veraj larmoj vualis ŝiajn okulojn. Kiu ne kredas, ŝi diris poste, skulevante la kapon kun mortodefia kuraĝo, tiu rigardu ĉirkaŭ sin. Ŝi certis pri sia faro. Imperativo en la tiama hungara lingvo signifis kompreneble indikativon, kaj tial ankaŭ tiuj hungaroj ne ĉirkaŭrigardis, kiuj ankoraŭ havis la eblon entute ĉirkaŭrigardi. En la sekvo la belulino ne menciis la laŭdiran fajristan ekzercon kaj ne klarigis la disvastiĝon de la misfamoj per la kutima propaganda histerio de la malamikaj informagentejoj, sed, kun rideto bagateliganta ĉiujn kredemulojn, ŝi indikis kiel eblan fonton de la famo la aserton, ke en la antaŭaj tagoj, konklude al la ĉiujara inventaro de la Tutlanda Kartografia Instituto, oni fakte ekbruligis je kvar anguloj certajn mapojn.

Ĉi-punkte ŝi faris tamen neripareblan eraron. Ŝia folio tekstis, ke oni ekbruligis delonge malvalidajn mapojn de la lando, sed ŝi diris hazarde, ke oni

ekbruligis mapojn de la delonge malvalida lando. Kio fakte signifis preskaŭ tion, kion ĝi signifis.

Haltis la tranĉiloj, rigidiĝis la forkoj en la manoj de la ankoraŭaj loĝantoj de la brulanta lando. Petroselaj terpomoj, kukumetoj kaj rostitaj kokposta'oj restis nemuelitaj en la faŭkantaj buŝoj. Neniu ne gapis antaŭ sin, ĉiuj malparolis por si. Kaj fariĝis tia silento el tio, ke neniu, kiel ajn li opiniis pri la stato de la aferoj ĝis tiam, povis ne ekkonscii pri ĝi. Ne ekzistas vorto pli potenca ol komuna silento. Ĉiu hungaro devis ekkonscii pri tio samtempe, kaj dank' al tiu bonŝanca hazardo ankaŭ ilia scio pri la silento iĝis komuna. La fenestroj estis malfermitaj.

Ĉiu povis aŭdi sian propran silenton, neniel diferencan de la silento de la najbaro. Silento ne ĝenas silenton. Kaj tial, ke ĉiu havis plurajn najbarojn, ne estis eviteble, ke la najbaroj sentu en si la saman silenton, kiun ili sentis el la aliaj. Silento de unu hungaro fariĝis silento de alia hungaro. La silento fariĝis tiel komuna, ke ne plu eblis distingi, al kiu apartenas kiu silento, dum ĉiu homo plu apartenis senŝanĝe al si mem.

Profunde de sia komuna silento, ili ĉiuj aŭdis la krepitadon de la incendio. Nur sono ĝenas silenton. Sed neniu ekparolis. Ĉar ekde tiam, feliĉe por ni ĉiuj, neniu sciis alion ol kion la aliaj povis pensi.

Dum estos akvo en la putoj.

El la hungara: István *Ertl*

Imre Oravecz:

Kiel vi memoras

Kiel vi memoras, tiunokte, pli ĝuste, tiuaŭrore, ĉar tiam jam mateniĝis, ni afliktis unu la alian per vortoj kaj sen vortoj, mirinde kaj malpli mirinde, ĝis finfine vi enveturiliĝis kun mi, kaj kvazaŭ vi farus erareton kaj riparus la erareton dece, vi demandis, kion nun fari, mi estis jam tiel troŝarĝita, lacega, ke mi kaptis avide la okazon, kaj mi proponis la hejmeniron, kaj vi akceptis mian proponon, do ni faris tion, ke ni hejmeniris — dum la tuta vojo vi silentis, kaj mi konfesàs: mi preskaŭ ekkompatis vin, ja vi devas tiom silenti —, sed mi ne miskomprenis vin, al mi estis klare, ke la hejmeniro estas nur via manifestado, tute ne grandanima, sed eksterdube lojala (se nur ankaŭ poste vi estus estinta ĉiam tiel lojala), mi ne komprenis nur tion, kio sekvis hejme, nome: kiel vi kapablis tuj post la alia min amori, aŭ se vi volas, mi komprenis tute, tiel, ke min novecigis por vi la fakto, ke mi suferas pro vi, kaj efektive ne mi necesis al vi, sed la noveco, per kiu mi malnovecigis la alian, kiu tuj ordinariĝis, kaj tial vi ne rimarkis: dum mi streĉiĝis sur vin, senĉese mi sentis, ke ĉi-foje vi kokras min kun mi.

Tradukis: István Takács

Attila Kiss: Urboparto en Buda

La nomo de Reto Rossetti *fariĝis vaste konata per la poemoj, aperintaj postmilite en la tria periodo de Literatura Mondo. Li estis unu el la kvaropanoj, poste sekvis la novelaro* El la maniko *kaj la poemaro* Pinta krajono, *multaj valoraj tradukoj, imponaj antologioj. Ĵus aperis ĉe Hungara Esperanto-Asocio lia esearo sub titolo* Arto kaj naturo, *kiu estas ne nur riĉa pruvo pri lia profunda klero, sed — dank' al lia enviinde leĝera kaj menskaresa prezentmaniero kaj stilo — samtempe ankaŭ vere distra legaĵo. Per siaj eseoj — kiel vi spertos legante la suban pecon — li ne profesore lekcias al ni, sed vigle babilas, kvazaŭ en amika societo.*

Reto Rossetti
(1909 –)

La eternaj angloj

Kiel konate, la angloj loĝas en Anglujo. Ilin disigas de Eŭropo 40 kilometroj da markolo kaj alta monto da memestimo. Laŭ angla vidpunkto la homaro parolas du lingvojn: angle kaj fremde. La fremduloj iom post iom lernas la anglan lingvon, por kiu la ceteraj lingvoj estas surogato, kaj finfine la tuta homaro posedos la solan lingvon imageblan por ĝusta homo. Ĝi ankaŭ estas la sola lingvo, kiu skribas „mi" kun majusklo.

Tiu lingvo estas kompreneble perfekta. Inter ĝiaj amindaj ecoj estas tio, ke aŭdinte novan vorton oni devas serĉi en vortaro ĝian ortografion, kaj vidinte novan vorton oni devas serĉi en vortaro ĝian elparolon. Ĝi havas nek refleksivan pronomon nek subjunktivon, kaj la futuro kaj kondicionalo havas po du formoj, kiujn scias manipuli la sudaj angloj sed nek la nordaj angloj nek la skotoj nek iu alia. Mankas vorto por „homo" kaj „naski" sed kompense troviĝas tridek sep manieroj diri „ĉu ne?". La lingvo portas 22 vokalsonojn, la frazo havas fiksan vortordon, kaj la sama vorto povas esti substantivo, adjektivo aŭ verbo laŭ sia lokiĝo en la frazo. Tio ĉi kondukas al multaj amuzaj miskomprenoj kaj amasaj ebloj de vortludo.

Por aliaj lingvoj, kiuj estas fonetikaj, akcentregulaj, posedas refleksivon ktp. la angloj havus kompaton, se ili entute ion scius pri ili. La kelkaj angloj, kiuj lernas fremdan lingvon, sin sentas renegatoj, sed sian kulpon ili malpezigas, plibonigante la fremdan lingvon per angla prononcado kaj angla gramatiko. Tio faras ĝin pli kultura.

Al la pitoreska kaoso de sia lingvo la angloj aldonas aliajn ĉarmajn kaosojn. Oni povas diri entute, ke por kaoso la angloj havas specialan talenton.

Kiam temis pri poŝta kodo estis antaŭvideble, ke la angla genio atakos ĝin tute originale, kvazaŭ novan astron sur la monda firmamento. Kion fari, la angloj estis ĉie pioniroj: pioniroj de industria revolucio, de taksioj (ankoraŭ ĉiu taksio portas la oficialan nomon „ĉeval-kaleŝo" – hackney carriage), senkapigo de reĝoj, kaj rostita pano. Do ignorante la eŭropajn poŝtokodojn kun ilia mizera vico de dek cifer-simboloj, la angloj brile aldonis al tio la 26 literojn de la alfabeto, skuis ĉion en koktela miksilo, kaj elŝutis ĉion sur la britan mapon. La rezulto estas volapukaĵo riĉa je konfuzoj, kun 0 kaj 1 jen kiel ciferoj, jen kiel literoj, kaj karamboloj inter rapide skribitaj Z kaj 2, 5 kaj S. Nu tiu bunta artverko havas sian koston, ekzemple tion, ke ĝi venkas la plej saĝan komputilon. Bagatelo! Tutsimple oni sidigas en ĉiu poŝta centro homon kun skribmaŝino, kaj dum defilas antaŭ li la leteroj, li interpretas kaj tajpas la ĉifrojn, kiujn la komputilo jam scios digesti.

Simila ĝangalo estas la angla eduka kampo, kiu ampleksas dudek naŭ specojn de lernejo. Oni nomas tion „eduka sistemo" kaj, kun supera logiko, oni nomas la elitajn privatajn lernejojn „publikaj".

Aŭ rigardu la anglan valuton. Pri la klasika monsistemo ni jam ne parolas, ĉar fine oni ĝin ŝanĝis al dekuma aranĝo, dividante la pundon ne je cent, sed je ducent eroj: la ducentonon oni nomas duonpenco. Logike oni devus ĝin esprimi per trialoka decimalo, ekz. pundo 1,005: ĝeno, kiun la angla genio tuj solvis, skribante ĝin 1/2, kaj tiun frakcion oni kroĉis al la decimalo: iu varo povas do kosti pundo 1,99 1/2, matematika gulaŝo unike angla, kaj rafinita turmento por infanoj en lernejo. Nu, post 15 jaroj

da devaluo, tiu mizera duonpenco ŝrumpis mikroskope kaj oni ĵus dekretis kompateme ĝian estingon en 1985.

La angloj amas la bestojn kaj antaŭ ĉio la hundojn. Kiam la rusoj en 1957 suprensendis hundeton en sputniko, miloj da geangloj protestis furioze al la ĵurnaloj, deputitoj kaj rusa ambasado; sed kiam la usonanoj suprenpafis simion oni apenaŭ atentis, ĉar simio tro similas homon. La usonanoj tamen iom riskis kaj estonte ili farus plu prudente, ekspedante pigmeon aŭ orfon.

Oni scias, ke la angloj estas lakonaj kaj modestaj. Ili elokvente klarigas sian lakonecon kaj verve informas pri sia modesteco. Ili estas ankaŭ flegmaj, kaj tre ekscitiĝas, se tion vi ne volas kredi.

Ili amas la simplan anglan kuiradon, kiun ili manĝas tre rapide, ĉar estas iel nedece okupiĝi longe pri la sinnutrado. Ili same rapidas tra siaj stratoj kun urĝa celo, ekzemple al kontoro aŭ kinoteatro, kaj ili ne imagas, ke strato povas esti renkontejo, restoracio-babilejo, aŭ homaj interrilatoj grava tagokupo. Ankaŭ la restoracioj havas signon de urĝeco: oni rapide glutas sian manĝon kaj transdonas sian seĝon varma al la postveninto. Oni faras tion des pli volonte, ke temas pri simpla angla kuirado.

Oni tamen ne pensu, ke la angloj ne ŝatas Eŭropon. Ĉiam amase ili vojaĝas tien, kunportante en falango sian lingvan medion kaj gvidate al turistaj hoteloj, kiuj garantias la simplan anglan kuiradon. Multaj angloj verdire ankaŭ aventuras pri kontinenta kuirarto, indulge ĝuas ĝin, eĉ konsentas pasigi ĉe ĝi pli ok dek kvin minutojn, sed estas ja libertempo, kaj post la frivolo ili revenas al la sobra angla rutino aŭ, kiel ili sprite ĝin nomas, „vivmaniero".

Apartenas ankaŭ al la admirinda angla vivoordo, ke ĉiuj butikoj fermiĝas je la kvina, ĉar ankaŭ la butikistoj devas fari siajn aĉetojn, kaj ĉiuj drinkejoj kaj amuzejoj fermiĝas je la deka vespere, ĉar ties komizoj devas ankaŭ amuziĝi. Kiel ili faras tion estas profunda angla sekreto.

Alia aminda angla moro estas fermi ĉiujn drinkejojn inter la dua tridek kaj la sesa ĉiutage. Tio efektive ĝenus, se Anglujo havus varman, do soifigan klimaton, sed feliĉe, kiel ĉiu anglo vin informos, oni havas klimaton moderan. Pro tiu klimatomodero anglaj viroj promenas somere sen ĉapelo kaj ricevas sunfrapon. Kaj vintre ĉiu neĝofalo tuj kreas tutlandan krizon, ĉar oni ne atendas tion en nia milda klimato, kiun vartas ja la oceana fluo el la meksika golfo.

Estas angla aksiomo, ke tio, kion oni faras en aliaj landoj, reale ne ekzistas. Sekve ĝi ne helpas al anglaj problemoj, ekzemple ĉu gea edukado estas praktika. La fakto, ke delonge ĝi estas ĝenerala en Skotlando, nenion signifas, ĉar Skotlando estas parto de Fremdujo. Eĉ io farita en Anglujo de neangloj ne havas efektivan gravecon. La romianoj en la jarcentoj I—IV konstruis ĉi tie rektajn vojojn, sed ili evidente ne komprenis la indiĝenan animon, ĉar ĉiuj postaj vojoj zigzagis kaj serpentumis eĉ sur plej plata ebeno. Nur kiam la angloj mem faras ion, nur tiam ĝi eniras en la realon. Kiel en 1959 la unua angla aŭtoŝoseo apud Preston, tutajn 15 kilometrojn longa kaj kompreneble kurba. Al ĝi gravitis aŭtistoj el la tuta lando, por karuseli senbride sur la nova ludilo. Kun ĉarma arkaismo oni nomas tion „motorvojo" dum la angla logiko diktis por la eliroj la terminon „interŝanĝoj" kaj la mezan barilon aŭ strion oni baptis „centra rezervejo", kvankam tie ne loĝas indianoj.

Sed unue kaj laste la anglo estas tolerema. Tial mi povas verki senpune ĉi tiun artikolon. La angloj, kiuj ĝin legos, nur ridos senĝene, ĉar ili ŝatas la komplimenton esti temo de artikolo kaj la pinta enhavo ilin ne tuŝas, ĉar tio estas kutima petolo de humoristo. Kaj ili komprenas, ke ankaŭ humoristoj devas esti, same kiel fremduloj, rektaj aŭtoŝoseoj, metra sistemo kaj simila ekzotikaĵo. Ĉio tio kontribuas al la bunteco de la vivo, farante dekoracian kadron por la solida realo de la angloj en sia Anglujo.

Albert Papp: Virino kubutumanta

Ĉinaj bildlibroj – hungarlingve!

Ĉinaj bildlibroj jam depost jardekoj ravas la esperantistajn infanojn — kaj ne nur infanojn! — tutmonde. Ili apartenas kvazaŭ indiĝene al la Esperanta kulturo, ni rigardas ilin nia propraĵo, kaj ofte ili servas ankaŭ kiel la plej bonaj propagandiloj.

En la Eldonejo de HEA fine de 1988 lanĉiĝis la ideo provi reprodukti ilin hungarlingve. La ĉefa stimulanto de tiu ideo estis verŝajne la hungara merkato de infanlibroj, kiun tiam komencis inundi bildlibroj — *komiksoj* — tradukitaj el okcidentaj lingvoj, kun minimume dubvalora pedagogia enhavo. Male al tiuj, ĉinaj bildlibroj disradias t.n. tradiciajn virtojn, kiel modestecon, laboremon, kaj nepre ne malicon kaj agresemon.

Komence montriĝis aro da teknikaj problemoj, ja ni posedis nek la originalajn desegnaĵojn, nek la filmojn, ni devis reprodukti ĉion laŭ la posedataj libretoj, kies presado ne estis sufiĉe perfekta kaj unueca por tiu celo. Sed el pluraj kajeroj ni sukcesis finfine kunmunti tolereble taŭgan kompleton, kaj la laboro povis komenciĝi. Por reliefigi kiel eble plej bone la ĉarmon de la desegnaĵoj, ni elektis sufiĉe multekostan paperon, kaj la kovrilpaĝojn ambaŭflanke ni plastumis. Kaj aldone ni projektis ankaŭ emblemon kun la skribo „ĉinaj bildlibroj" — por signi, ke temos pri serio.

Tiel eliris la unua kajero: *Granda pando vizitas mian hejmon,* kiu en la hungara traduko fariĝis *Panda mackó vendégségben*. Ĝin sekvis baldaŭ *La fiera multkolora kateto*, kies titolo en la hungara lingvo aliteraciis jene: *A kevély kiscica kalandjai.*



Mi devas diri, ke ĉe la komenco la librokomercistoj ne montris tre grandan interesiĝon pri niaj novaĵoj: ĉ. duono de la presitaj po 35 ekzempleroj restis en nia deponejo. Tamen ni fidis. Kaj laboris kaj riskis plu.

Venis la vico de *Bela revulo* — en la hungara lingvo ĝi fariĝis *A rest kismadár*. Ĝin sekvis *Vostokonkurso* kun la iom longeta titolo *Miért van az állatoknak farka?* („Kial la bestoj havas voston?"). Sed tiuj jam nur en po 22 mil ekzempleroj. Kaj ni komencis prepari ankaŭ la kvinan kajeron, *Hejmoj de birdoj,* sub la hungara titolo *Hol fészkelnek a madarak?* („Kie nestas la birdoj?")

Kaj tiam sekvis la surprizo. La plej granda librodistribua firmao mendis de ĉiuj kvin kajeroj po pliajn dek mil ekzemplerojn. Ni estis embarasitaj, ĉar eĉ el la unuaj kajeroj ni ne povis kontentigi tiun mendon, ja intertempe en nia propra librobutiko ni vendis multajn ekzemplerojn. Ĉiukaze, la hungara traduko de *Hejmoj de birdoj*, kiu aperos komence de aprilo, jam presiĝos en 32 mil ekzempleroj.

Ĉar la serio iom post iom komencas vere esti konata en la hungara merkato de porinfanaj libroj, verŝajne eblos daŭrigi ĝin. Tio estos tre utila, ĉar tiamaniere tre multaj infanoj jam en tre frua aĝo renkontiĝas kun eldonaĵo de HEA, kiu komprneble portas la indikon, ke la libreto estis tradukita el Esperanto. Samtempe pruviĝos por la gepatroj, ke Esperanto estas vere portanto de realaj kaj akceptindaj kulturaj valoroj. Aliflanke, niaj ĉinaj samideanoj, kiuj jam depost jardekoj multe laboras por Esperanto sur eldona kampo, povos vidi unu plian frukton de sia penado.



ALBATOURS

„En la iama reĝa urbo nun reĝas la gastoj de Albatours"

HOTEL VARSA
Gárdony, Holdfénysétány 13.
Telefono: Gárdony 219
Telekso: 22-29-216
En la hotelo, staranta sur la lagobordo, troviĝas 32 ĉambroj. Ĉiu ĉambro havas banĉambron, telefonon, trinkaĵŝrankon, por servi la komforton de niaj karaj gastoj.
La restoracio por 150 gastoj elstare taŭgas por diversaj aranĝaĵoj, geedziĝaj festoj, kun la eblo ankaŭ loĝigi la gastojn.

Niaj servoj:

- monŝanĝo
- telefono, telekso
- mendo de taksioj
- propra restoracio
- trinkejo
- tenisludejo
- propra parkumejo
- pruntado de sportiloj
- vendado de fiŝhokistaj permesiloj
- rezervoservo de privataj domoj
- ebloj por akvaj sportoj, kun instruado

Oferto de programoj:

- Ŝipekskursoj
- Unutagaj ekskursoj per aŭtobuso al:
- Budapeŝto
- Balatono
- Székesfehérvár
- Puszta Party — ĉevalrajdado
- Koncertoj
- Termobanejo je 2 km

HOTELO AGÁRD
ATENDAS VIN LA LAGO VELENCEI!
En agrabla medio vi povas ripozi sur la suda bordo de la Lago Velencei en la Hotelo Agárd!
Nia hotelo funkcias dum la tuta jaro, 36 dulitaj ĉambroj (kompletigeblaj per kromlito) staras je la dispono de la gastoj. Eblo por matenmanĝi en la kafejo de la hotelo.

Niaj servoj:

- aparta salono kun kolora televidilo
- monŝanĝo, vendado de fiŝhokistaj permesiloj
- ludejoj de teniso kaj minigolfo
- ekskursoj per aŭtobuso al la ĉirkaŭaĵo kaj Budapeŝto
- ebloj por manĝado en la restoracio Nádas, situanta je 50 metroj

Ebloj por amuzo:

- akvaj sportoj (naĝado, surfotabulo, boatado)
- fiŝhokado
- teniso, golfo
- je unu km de la hotelo estas termobanejo kun saŭno
- sur la norda bordo de la lago, en Nadap troviĝas rajdolernejo por ŝatantoj de rajdado

Al la hotelo apartenas la KAMPADEJO NEMESKÓCSAG, ĝi atendas la tendumantojn en agrabla, natura medio. Krome la gastoj povas disponi lignodometojn kaj la hoteleton SZÁRCSA FOGADÓ (II. kat.).

KAMPADEJO PANORÁMA
Velence: Kemping út 2.
Telekso: 21-426
Funkcias inter 15 aprilo — 15 oktobro
La kampadejo kuŝas sur la bordo de la Lago Velencei. Ĝi havas 700 metrojn longan plaĝon, kun du apartigitaj porinfanaj basenoj. Ĝi povas akcepti samtempe 570 karavanojn kaj 150 tendojn. Krome tri lignodometoj servas kiel tranoktejo por 18 gastoj.

LA SERVOJ DE LA KAMPADEJO

- Lavejo kaj duŝejo kun varma kaj malvarma akvo
- Abundaj ebloj por aĉetado kaj manĝado
- Monŝanĝo
- Tenisludejoj
- Kuracista servo
- Frizisto
- Pruntado de akvosportiloj

Riĉa oferto de programoj
Servo por luado de privataj ĉambroj
— Vendado de fiŝhokistaj permesiloj

En la kampadejo eblas pruntepreni sportilojn:
- surfotabulo
- kajako
- kanuo
- akva biciklo
- plumopilko

NIAJ SERVOJ:
SERVO POR LUADO DE PRIVATAJ ĈAMBROJ
REZERVO DE TRANOKTEJOJ POR LA TUTA LANDO
VENDADO DE EN- KAJ EKSTERLANDAJ GRUPAJ VOJAĜOJ
AĈETADO DE VALUTOJ
VENDADO DE VALUTOJ
VIDEOREKLAMOJ
SERVO POR ARANĜAĴOJ
CERTIGO DE ENIRBILETOJ
MENDO DE MANĜOJ
ĈIĈEIRONADO
INTERPRETISTA KAJ TRADUKISTA SERVO
INFORMA SERVO
VENDADO DE ELDONAĴOJ



INFORMOJ ALBATOURS

ALBATOURS Turisma Oficejo en Departemento Fejér
H-8000 Székesfehérvár, Szabadság tér 6.
Telefono: (22) 12-818, 12-494
Telekso: 21-235
Telefakso: (22) 27-082
Ni informas niajn karajn hungarajn klientojn, ke nia Oficejo vendas ĉiun eksterlandan (okcidentan) ekskurson kontraŭ forintoj, certigante eĉ poŝmonon en valuto!

revuo de revuoj

Popoloj tra la mondo, mem la homaro havas unuavide tro multajn zorgojn, kiuj forte pli gravas ol la lingva interkomunikilo — kies porbatalantoj ni, esperantistoj, ja estas, nepre kaj memkompreneble. Tamen nek popoloj, nek registaroj povas preterlasi en la praktiko, la supre iom teorie, iom surface bagateligitan problemaron de la lingva interkomunikado. Politikistoj, ĵurnalistoj kaj aliaj decidpreparemaj „elituloj" plej volonte emas forgesi pri ĝi — kiu ja „ĝenas iliajn cirklojn". Premas ilin tro multaj kaj ŝarĝaj aferoj politikaj kaj ekonomiaj, kiuj plejaktuale „pikas" la loĝantaron, kaj postulas solvadon. Ili parolas, ekzemple, dume la plurcent milionoj da civitanoj plejparte ne kapablas interkompreniĝi; la personaj interrilatoj ne sufiĉe floradas; la uzo de la „naŭ lingvoj de EK" reduktiĝas eble nur al ties parlamento (ISRAELA ESPERANTISTO, 103.). Klaras — almenaŭ por pensantaj homoj, verŝajne ne „decidpreparaj" — ke la simplaj centmilionoj da Eŭropanoj devos adopti komunan lingvon, ĉar la ŝtatoj ne inklinas akcepti alian krom sian propran lingvon. Alimaniere la lingvaj baroj ne estas superitaj, kaj aperas ofte raportaĵoj (jam banalaj) de ĵurnaloj, en kiuj la supraĵa ĵurnalisto mencias senhonte: la demandita eksterlanda simplulo (aŭ aŭtoritato) ne konas la anglan (!), sekve la interparolo ne sukcesis. Pretere li silentas pri sia *propra* nescio de *aliaj* lingvoj, kiun probable la intervjuito *tamen* konas. Sed post tio legeblas *nenio* pri la racia bezono de internacia lingvo, kvankam jam centjara...

Io — mi ripetas: io — tamen okazas ĉi-kampe, por dispeli la nebulon de la mal-interkompreniĝo. La propran lingvon ja valoras disvastigi, instrui kaj instruigi alilande; oni ne forgesu, ke la negoculoj *ege bezonas* lingvan interkomprenon dum siaj traktadoj. Plurmiloj da Usonaj volontuloj laboras tiucele en 65 landoj, kaj ilia agado nun celas jam — antaŭe ne... — la pli malfermatajn merkatojn de Orient-Eŭropaj landoj. Tie ili („Packorpuso") propagandos kaj instruos la anglan (ne la aliajn lingvojn de EK, estu certa!), subtenate de pluraj Usonaj financaj societoj kaj kompanioj (NOV-ZELANDA ESPERANTISTO, 490.). Paralele ankaŭ Britio faras sian taskon, apude kurante en tiu konkurso. *Jozefo Major* redaktoro tamen ne konsideras ĉion ĉi tute malutila el vid-punkto esperantista, kaj lian rezonadon oni devas akcepti — laŭ mia modesta opinio. Nia lingvo ankoraŭ ne kapablas doni gravan helpon al teknika-scienca progresigo en tiuj landoj, sufiĉas aludi al la relative eta nombro de E-aj faklibroj, kaj ties kreskon ne eblas atendi pro manko de niaj financoj rimedoj. Dume la faka uzado de la angla lingvo apenaŭ atingos aliajn, ekzemple familiajn sferojn en tiu parto de Eŭropo; tie la fonetiko de la angla estas tiom fremda — aparte al hungaroj — ke ĝia instruado renkontos laŭ Major similan fiaskon, kian en Japanio, malgraŭ la jarcento-longa deviga instruado tie. Dume nia lingvo eminente taŭgas al ajna „ĉiutaga" uzo.

La fundamenta homara bezono interparoli kaj reciproke komprenigi sin kun alilingvanoj en certaj okazoj generis en la mondo vere miksajn lingvaĵojn, foje apenaŭ pli ol balbutaĵojn, kiujn oni kutime nomas *piĝino*. Temas fakte pri *novaj lingvoj* vastasence, kaj la multmerita *Régulo Pérez* klarigas (EL POPOLA ĈINIO, 12.) en eleganta eta studaĵo, kiel ili prezentas taŭgan materialon por trovi la faktorojn rudimentajn pri la *naskiĝo de la homaj lingvoj*. Eble ŝajnas, ke superflue mi skribis „homaj", ĉar animaloj malhavas lingvon; aliflanke tiu epiteto tamen gravas por turni la atenton al la *distinga* rolo de la lingvo — disde la bestoj. El la multaj edifaj pensoj de tiu artikolo mi preferas reliefigi la bedaŭrinde nesufiĉe konatan pri la ĉefa „kontraŭdiro" de Eo. Du komplementaj, ŝajne kontraŭefikaj procesoj donis kaj daŭre donas al Eo *koheran evolueblon*: jen la tendenco al simpleco kaj kontraŭe, la tendenco al riĉigo de nia nature sin esprimanta lingvo. Ververe, tie troveblas la sekreto de nia plezurdona lingvo, de ĝia potencialo, ankaŭ ĝia populareco.

LA BONA LINGVO — jam vaste legata libro de *Claude Piron* — ekigis tra nia gazetaro plezure surprizan amason de utilaj regaoj, plejofte en formo de recenzoj. Estus ne facile tie ĉi mencii ĉiujn. En ESPERANTO (2.) oni publikigis eĉ du recenzojn, kun interesaj *rimarkoj*, kvankam verdire ili inter si malmulte rimis, kaj arkoj interligaj apenaŭ troviĝis. Sed tiel estas bone; multfaceta libro kun vastaj laŭboj de ideoj ĉirkaŭ la fortika trunko Zamenhofa, elvokas nepre ebunde da reagoj, kaj miaopinie *ĝuste tio* estis intencita de la aŭtoro Piron. Do diskuton inaŭguri — mi certas — ĉar verda papo neniel bezonatas en E-ujo (ESPERANTO AKTUELL, 1.).

La legantoj verŝajne pardonos, ke post tiom da lingvo-aferoj mi saltas for al alispecaj. Eble — aŭ certe — pli amuzaj temoj, t.e. ne tiom seriozaj. Permesu al mia gusto trovi en „La nekredeblaj aventuroj en Ameriko" de *Ĵolo* (LA KANCERKLINIKO, 52.) multe da sprito kaj gaja ĝuindaĵoj, tra la lerte desegnitaj Amerikaj „scenoj", strange kaj stange fremdecaj al la bona franca samideano en la Nova Mondo de Frenezio, ĉe Detrojto. Indas ĝui plurajn aliajn buntaĵojn en la (ne nur de tiu ĉi) numero, sed mia kadrita — delonge rita — spaco ordonas halton — nu, alifoje! Ĉar nepras jam mencii la artikolojn kaj en SENNACIULO (3.), kaj en TEJO-TUTMONDE (44.), kies komuna temo estas la moderna pesto, *aideso* (AIDS). Sed en la junulara gazeto gajaj avertoj, apud senĝene, iom karikaturece desegnitaj generiloj de ambaŭ seksoj (!) bildstrie (de Arnaŭĉjo) helpas klarigi la minacon kaj la evitmetodojn seksologe laŭ la ĝusta devizo: *„Ek al sekso sekura kaj kreama!"* Gratulinda instrumetodo!

Ervin *Fenyvesi*

SEKRETAJ SONETOJ



Tiu ĉi libro antaŭ kvindeko da jaroj estis skandala — kaj ĝis nun ĝi mildiĝis klasikaĵo de la Esperanta literaturo, kvankam, kiel la subaj specimenoj pruvas, konservativaj legantoj eĉ nun povas ŝokiĝi pro ili.

Sed verŝajne ankaŭ ili ne kontestos, ke temas pri tradicie belaj sonetoj, kiuj ne nur ravas la sensojn kaj orelojn, sed samtempe ili estas ankaŭ riĉa fonto de la familiara-ama vorttrezoro de Esperanto; do ili estas ŝatindaj legaĵoj ne nur por poeziamantoj, sed ankaŭ por am-praktikantoj, kiuj volas posedi Esperanton plene, inkluzive ankaŭ la t.n. „malpermesitan" vortaron.

La erudicia postparolo de William Auld *lokigas en literaturhistoria kunteksto tiun ĉi popularan poemaron, kies nuna eldono — presita sur luksa papero, kun ilustraĵoj — estas la tria en la vico, kaj ĝi eniris sub la n-ro 4 la* Serion Esperantaj Klasikaĵoj.

XII

Mi iris al vi kun animo bola
por voki vin al nova kis-agap'.
Mi sonorigis. Via dolĉa kap'
aperis kun la blondo aŭreola.

Kaj ni eniris. Kaj vi estis sola!
Premiĝis mia kor' sub dolĉa frap'.
Ni kisis nin. Mi tiris al kanap'
vin lipsurlipe, kun perforto mola.

Kaj kuŝe jam, en arda sinforges',
ankoraŭ laste vi ekĝemis: „Ho ne!"
Sed mi la jupon ĉifis en frenez',

kaj jen albrilis min marmorkolone
la du femuroj kun la ombra mez'...
Kara! Vi min atendis senkalsone!

XXIX

Numero dolĉa: 69. Genuas
mi super vi, la kapo ĉe l' ingven',
kisinte longe ĝin, per langpromen'
tiklante, brulajn striojn mi tatuas

interne de l' femuroj. Nun mi gluas
la langon al la dig': per vibra tren'
mi ĝin kondukas supren, sur marĝen'
Edena, kaj, dum vin volupto skuas,

en mezan mezon mi ĝin mergas drone,
por leke ludi kun la eta ĉan',
kiu nun — mia lango sentas bone —

ekŝvelas, kiel la Ezopa ran',
kaj dum la pligrandiĝo, fanfarone
imagas sin kompleta virorgan'.

XXXV

Por la unua, dolĉa foj': deflori,
kaj poste: nupti, karnon miksi, trui,
seksumi, kaj koiti, kaj geĝui,
kopuli, kohabiti kaj amori.

Enpafi, ŝtopi, vosti, grotesplori,
palisi, kaj bambui, kaj geglui,
kunkuŝi, kaj interne intervjui,
bombardi sube, mini, lanci, bori.

Kaj broson brosi, glavon karnan ingi,
buteron kirli, sondi, piŝti, piki,
kamenbalai, inan ingon klingi,

surpingli, karnon planti, truon fliki,
la brulon per la akvotub' estingi,
tranajli, spili, ŝargi, farĉi, fiki.

XLII

En lit' vi bubviziton ne permesis,
rezigne flustris: „La monata sang'"
Sed malkvietis spite mia Stang',
vi ĝin karesis mole. Sed ne ĉesis

la ŝvelo, kompreneble, eĉ, impresis
jam obeliske. Nun kun brula vang',
vi proksimiĝis al ĝi kaj per lang'
kaj per la lipoj vi ĝin ekkaresis.

Kaj — nun eksuĉis vi entuziasme.
Ho, dolĉturmenta vibro en la nuk'!
Volupto torda, morda! Dum orgasme

en via buŝon ŝprucis arda suk':
barakte, ĝeme, senkonscie, spasme
mi mordis vin je l' alabastra pug'!

Nikolao STEPANOV

La vivo kaj morto de VLADIMIR VARANKIN (1902-1938)

„...Eĉ nia morto servu al la interesoj de l' batalo por la hela estonteco"...

Verŝajne multaj el la legantoj scias pri la ĉefa heroo de la romantika poemo de Maksim Gorkij — la fama DANKO, kiu disŝiris sian bruston kaj elprenis sian ardan koron, por ke ĝi lumigu la vojon por liaj teruritaj kaj laciĝintaj samgentanoj. La ekzemplo de Danko poste entuziasmigadis multajn homojn en diversaj landoj. Aliflanke, la vivo kaj la sorto de multaj homoj treege similis la tiuj de Danko. Pri unu el tiuj homoj mi volas nun rakonti.

* * *

„Manuskriptoj ne brulas"...

La supran aserton per la buŝo de unu el siaj herooj diris Mihail Bulgakov — fama aŭtoro de la senmorta romano „Majstro kaj Margarita". Tamen li mem ja ne eksciis, ke povas forpasi pluraj jardekoj, ĝis la „nebruligeblaj" manuskriptoj ekvidos lumon kaj trovos la vojon al la koro de leganto. Bedaŭrinde, tio validas pri sufiĉe granda kvanto da manuskriptoj kaj libroj de sovetianoj — aŭtoroj, „senleĝe" persekutitaj dum la jaroj de la „personkulto" de Stalin, aŭ pro tiu aŭ alia kazo forveturintaj el USSR...

Ĉi tie mi rakontos pri la vivo, sorto agado kaj morto de Vladimir Varankin — aŭtoro de la fama fomano „Metropoliteno" (Amsterdam, EKRELO, 1933, 200 p.). Malgraŭ ke la libro estas unu el niaj vere elstaraj kreaĵoj (fama brita fakulo pri literaturo William *Auld* nomis ĝin „forgesita ĉefverko", kaj metis ĝin en la liston de la 51 plej elstaraj Esperantaj originalaj literaturaj verkoj), la „vivo" de tiu ĉi romano estis missorta.

Ĝi estis verkita en Esperanto, kaj aperis en 1933 en Amsterdamo ĉe la kooperativa eldonejo EKRELO. Kiel oni singarde skribas sur la kovrilo de la dua eldono (Kopenhago, 1977), ...„sed pro politikaj cirkonstancoj kaj la baldaŭa malapero de la eldonejo la romano apenaŭ trovis la merititan eĥon" (W. Auld). Ĉu indas rememorigi al la nuna leganto, ke tiuj ĉi specifaj „politikaj cirkonstancoj" estis la faŝista puĉo en Germanio komence de 1933? La totalisma Hitlera reĝimo, kun sia patologia malamo al ĉio progresiva, rajte ekmalamis la internacian lingvon Esperanto, tiun ĉi, laŭ la esprimo de A. *Lunaĉarskij*, „latinon de la proletaro", kiu estis baptita de la Goebbelsaj „specialistoj de propagando", „lingvo de judoj kaj komunistoj". Kaj la esperantistoj mem sur la teritorio de la „miljara" Tria Regno kaj en la okupitaj landoj estis persekutataj eĉ pli ol komunistoj kaj reprezentantoj de aliaj opoziciaj partioj.

Fine de la 30-aj jaroj en Sovetio Stalin kaj liaj fihelpantoj disvolvis sangan buĉadon, en kiu pereis multaj elstaraj homoj. La amaran pokalon devis eltrinki ankaŭ la esperantistoj. Esperanto en Sovetio estis proklamita la „lingvo de cionistoj, kosmopolitoj kaj faŝistoj", kaj la tuta estraro de SEU (Sovetrespublikara Esperantista Unio) kaj multaj ties membroj estis arestitaj, parto de ili estis mortpafita, aliaj ĝismorte turmentitaj en malliberejoj kaj en koncentrejoj. La sama sorto trafis ankaŭ V. Varankin.

Ĝenerale, estis punitaj ne nur la „popolmalamikoj" mem kaj iliaj parencoj, sed ankaŭ iliaj verkoj. Ekde tiam do la libroj de esperantistoj estis malpermesitaj, oni forigis ilin el la bibliotekoj, parte ili estis neniigitaj, parte kaŝitaj funde la *„spechranoj"* (specialaj fakoj kun ege limigita aliro por legantoj). Pro tio, kiam en 1977 en Kopenhago oni aperigis la duan eldonon de la Varankina „Metropoliteno" — kun luksa ruĝa kovrilo, kompostita per bela literaro, sur bona papero — ĝi tuj trafis en *spechranon* kaj estis fakte neatingebla por la sovetiaj legantoj de nia lando.

Ankoraŭ ĝis antaŭ nelonge (antaŭ iom pli ol 6 jaroj — fine de 1983), kiam mi esperantistiĝis, mi aŭdis nek pri la romano, nek pri ĝia aŭtoro. Kaj eĉ malpli mi povis scii, ke la specialistoj rigardas ĝin unu el la ĉefverkoj de la Esperanto-literaturo. Tute hazarde iam en la Ŝtata Biblioteko V. I. Lenin mi trafis la romanon kaj decidis ĝin trafoliumi. Kaj jen la magia forto de aŭtora talento — ekde la unuaj paĝoj mi estis kaptita kaj per la enhavo, kaj per la lingvo de la romano.

Mi rakontu tute skize ĝian enhavon. La centra temo de la romano estas la konstruado de subteraj fervojoj en Berlino kaj en Moskvo dum la jaroj 1928-1929. Juna soveta inĝeniero venas en Berlinon — en la ĉefurbon de la tiama Vejmara respubliko — por studi tie la metodojn de konstruado de urba subtera fervojo: la metropoliteno. Li ne nur studas la metodojn de la konstruado, sed ankaŭ senpere observas la vivon de la giganta kapitalista urbego, la socion, ties kontrastojn, kaj krome eĉ partoprenas en demonstracioj kaj en la klasbatalo de la germana proletaro.

Samtempe li verkas aŭtobiografian romanon en formo de taglibro, kiun li volas eldoni en Germanio germanlingve, por montri al siaj germanaj geamikoj kaj gekamaradoj la specifecon de la problemoj kaj la malfacilaĵojn de kresko en la juna soveta respubliko, ĉar... Ĉar por li iĝas ĉiam pli klare, ke fakte ne lia iomete neperfekta lingvoscio, sed pli probable la sufiĉe granda diferenco de vivkondiĉoj, vivkutimoj en la du landoj estas la fonto de malkompreno inter la reprezentantoj de tiuj ĉi diversaj mondoj — kapitalisma kaj socialisma.

Antaŭ liaj okuloj image defilas lia duonmalsata infanaĝo, juneco, rusa vilaĝo detruita de milito, lia malsukcesa edziĝo kaj la eta, kredema estaĵo — lia filineto,

simila al fabela feino. Li vivece memoras sian duran batalon kontraŭ burokratoj kaj eĉ klasaj malamikoj, kiuj ŝtele englitis en la partion kaj en la organojn de la ŝtatregado; ili strebis draste malutili al la juna soveta respubliko, detruante ĝian regaparaton kaj la ankoraŭ malmaturan kaj ne restarigitan ekonomion. La batalo disvolviĝas pro konkreta demando — ĉu oni devas aŭ ne devas konstrui la metropolitenon en Moskvo? Burokratoj, konservativuloj kaj ankaŭ malamikoj maskitaj ege kontraŭstaras: ja ĝi forigos iliajn privilegiojn, senlaborajn profitigajn postenojn, kaj ankaŭ permesos radikale solvi la akran transportan problemon — tiun de la ĉiutaga transportado de 2-miliona amaso de laboristoj kaj urba loĝantaro. La troeluzita trama reto jam delonge ne permesas solvi la taskon...

Mi ne rakontos ĉi tie la tutan enhavon de la romano, nur atentigas, ke la nekutima verkmaniero donas al la romano unikan karakteron: en ĝi estas multaj kortuŝaj paĝoj, dediĉitaj al viveca priskribo de la personaj rilatoj inter la rolantoj: amo kaj tenero, scenoj de malfido kaj paciĝo, laborentuziasmo, barikadaj bataloj kaj kruela mortigo de laboristoj sur la Berlinaj stratoj. De tempo al tempo la rakonto iĝas vere detektiveca. Viglaj dialogoj kaj majstra pentrado de homaj sentoj kontribuas al la alta kvalito de la romano. La libro, laŭ mi, estas tute nuntempa (iom similas al la nuna periodo de „perestrojka"), kaj krome enhavas multe da interesegaj informoj pri la tiutempa vivo de Sovetio. Tamen, oni devas ĝin legi mem...

Mi ne multe parolu pri la romano mem kaj pri Varankin, kiel verkisto. Anstataŭ mi, tion faris jam, kaj eĉ ne unufoje, nia fama fakulo pri E-literaturo William *Auld*. Jen kion li diris ankoraŭ en 1962 („La Nica Literatura Revuo", 1962, 7, N°42, 221-225):

...„Verŝajne preskaŭ tute nekonata de la nuntempa esperantistaro estas la en nia lingvo originale verkita romano „Metropoliteno" de V. Varankin, eldonita en 1933 de EKRELO, Amsterdamo. Releginte ĝin lastatempe, mi konstatis denove, ke ĝi estas unu el la plej interesaj kaj maturaj el niaj originalaj romanoj kaj oni devus tre bedaŭri, ke ĝi jam ne estas aĉetebla. Ĝia relativa nekonateco verŝajne devenas parte de tio, ke ĝi naskiĝis en revoluciaj — kaj sekve neneŭtralaj — rondoj, dum la florperiodo de Esperanto inter la laboristaro. La aŭtoro estis sovetiano, certe ankaŭ komunisto (ĉu partiano aŭ ne, mi ne scias), kaj verkis sian romanon laŭ klasbatala vidpunkto. Estas vere, ke en la fino la malhonestuloj kaj stultuloj estas venkitaj ĉefe per interveno de la kompartio kaj la progresema popolo, kaj la problemoj moralaj kaj ekonomiaj estas solvitaj per la entuziasma laborforto de la socialismon konstruanta laboristaro; tamen oni nepre ne supozu, ke Varankin estis blinda adoranto de la postrevolucia sovetia socio, aŭ ke lia romano estas melodrama bildo en nigro kaj blanko, sen la grizoj. Kontraŭe, Varankin kreis homojn en realeca situacio".

Kiel mi jam diris, preskaŭ nenion mi sciis pri la aŭtoro de tiu ĉi romano. Nun kelkaj linioj sur la kovrilo rakontis pri tio, ke li „naskiĝis en 1902 en Niĵnij Novgorod (nuna urbo Grokij). Profesie li estis docento pri okcidenteŭropa historio kaj direktoro de Moskva Pedagogia Instituto por Fremdaj Lingvoj. Li lernis Esperanton en 1919, en 1921 fariĝis membro de la Centra Komitato de SEU, kaj en 1929 ano de la Lingva Komitato. Varankin verkis krome interalie la studon „Teorio de Esperanto" (Moskvo, 1929). En 1937, dum la persekutoj kontraŭ la sovetaj esperantistoj sub Stalin, li estis arestita. Li pereis en punlaborejo." (NB: nun mi ne komentas pri la ĝusteco de la citataj informoj; pli poste mi liveros la ĝustajn, t.e. strikte dokumentitajn informojn — N.S.)

Mi komencis serĉi informojn pri li en bibliotekoj, arkivejoj, mi sukcesis trovi liajn geparencojn. Feliĉe, ankoraŭ vivas ambaŭ liaj fratoj: *Jurij* (naskita en 1906) nun loĝas en Minsko (ĉefurbo de Bjelorusio), *Vjaĉeslav* (1916) — en Moskvo, lia filino *Feina* (1924) loĝas en la urbo Gorkij kune kun sia patrino (la unua edzino de Varankin). Ankaŭ vivas kelkaj de liaj junaĝaj geamikoj, ekzemple, Ivan *Baĵenov* (1901) — ĝis nun aktiva esperantisto, estro de la Gorkija regiona esperantista asocio, Tatjana *Lovcova* (nun Golubjeva) — ekssekretariino de Niĵnij Novgoroda Klubo de SEU en la 20-aj jaroj. Notinde estas tamen, ke ili ĉiuj komence estis treege silentemaj kaj ne emis rakonti pri sia fama parenco kaj amiko, kvankam tiu estis jam delonge (en 1957) rehonorigita... Kvazaŭ ili ĝis nun timus... Tamen iom post iom (po eroj malgrandaj) — mi sukcesis kolekti sufiĉe plenan bildon pri la vivo kaj agado de la talenta kaj energiplena homo, vera esperantisto:

Vladimir Valentinoviĉ Varankin, ruso, naskiĝis la 12-an de novembro 1902 en urbo Niĵnij Novgorod (nuna urbo Gorkij) en familio de malaltranga oficisto. Lia patro — *Valentin Jegoroviĉ Varankin* — ĝis alvoko al Ruĝa Armeo — estris ŝparkason, kiu ĝis nun situas en Gorkij en la sama strato, nun nomata Ŝverdlov. Li forpasis en 1921. La patrino de Varankin — *Nina Aleksejevna* (1882) — estis dommastrino kaj poste bibliotekistino (ŝi forpasis en 1953 en Moskvo). La kvinmembra familio loĝis en malgranda duetaĝa dometo kun antaŭdoma ĝardeneto en la strato Dvorjanskaja (poste — Oktjabrjskaja), n-ro 27. Du el la kvin malgrandaj ĉambroj okupis Niĵegoroda Gubernia Unuiĝo de Junaj Esperantistoj fondita de Varankin. (NB: Niĵegoroda estas adjektivo de Niĵnij Novgorod.) Dum lasta kurso de la urba gimnazio, n-ro 1, kiun li finis en 1920, kune kun kelkaj siaj geamikoj li eklernis Esperanton (lia instruistino estis fratino de tiutempe konata Niĵegoroda esperantisto Serebrovskij; ili estis gefiloj de loka pastro...).

Kune kun siaj same junaj geamikoj baldaŭ poste li fondis Niĵegorodan rondeton de junaj esperantistoj. En marto de 1920 ĝi funkciis je la adreso strato Studjonaja n-ro 53, ĉar la domon de la Varankin-familio en la strato Dvorjanskaja oni eksproprietigis. Poste la rondeto transformiĝis je Niĵegoroda Tutgubernia Unuiĝo de Junaj Esperantistoj.

Dum malpli ol unu jaro la Unuiĝo sukcesis organizi jam ses kursojn de Esperanto en la urbo mem, 40 ĉelojn en la tuta gubernio, kaj krome en kelkaj lokoj (kun helpo de lokaj esperantistoj-instruistoj) eĉ instrui la Internacian Lingvon en lernejoj.

La novbakita esperantisto vigle startis en la movado. Kune kun siaj amikoj (L. *Beljajev*, H. *Konovalov*, V. *Kalaŝnikov*, T. *Lovcova* k.a.) li dum apenaŭ du jaroj vaste evoluigis la E-movadon en Niĵnij Novgorod kaj en la Niĵegoroda regiono. Li organizis rondetojn, kursojn, tre aktive kaj tre diversmaniere propagandis la Internacian Lingvon. Precipe li ŝatis organizi spektaklojn kaj surscenigi malgrandajn 'agitprop'-teatraĵojn, kies tekstojn li mem verkis aŭ tradukis (interalie tiam li tradukis la plej popularan vodevilon „Ivanov Paŭlo"), aŭ prenis ilin el E-libroj aŭ el antaŭrevoluciaj E-revuoj (ekzemple, el „La Ondo de Esperanto"). Li mem bone kantis, dancis, ludis pianon, deklamis poemojn, pentris (ĉe ŝia filino en urbo Gorkij ĝis nun ekzistas la bildoj, kiujn li pentris!). Li aktivis tamen ne nur en la esperantista movado: kiam en la urbo oni organizis la unuan ĉelon de Komsomolo, li estis unu el ties kunfondintoj.

La ĉefa malfacilaĵo en la esperantista agado estis — absoluta manko de mono (ja la kursoj estis senpagaj), E-lernolibroj kaj E-literaturo. Ĉiuj provoj ekrilati kun la Moskva E-Societo kaj ricevi de tie literaturon kaj hel-

pon estis tute senrezultaj. Ĝuste pri tio skribas al Moskvo, al la tiama *narkomo* (popolkomisaro = ministro) pri klerigo A. V. *Lunaĉarskij* la juna, sepdekjara knabo. Kaj la batalema, konvinka letero de V. Varankin al la popolkomisaro konserviĝis en unu el la arkivoj de la ministerio (ruse: Narkompros), kaj ĝi bonege karakterizas la aŭtoron.

Dum tiu periodo evidentiĝis ankoraŭ kelkaj el liaj talentoj: li komencis eldoni la gazeton „Ruĝa Esperantisto" (Presorgano de N.-Novgoroda Klubo de Sovietlanda Esperantista Unuiĝo). La juna Varankin iĝis kaj la motoro, kaj la animo de la entrepreno: li estis ĉefredaktoro, ĉefa aŭtoro kaj kompilanto de la gazeto. En la gazeto (sub la pseŭdonomo 'Vol-Volanto' — hejme oni nomis lin karese 'Volja') li publikigas siajn versaĵojn kaj versaĵojn de siaj amikoj, artikolojn, tradukojn, anoncojn, rezultojn de demandadoj, kaj ankaŭ alvokojn al la landa kaj eksterlanda esperantistaro por helpi al la malsatantoj de la juna Soveta respubliko. (En la anoncoj li donis sian adreson: 9, Mironosickaja, N.-Novgorod, Rusio; kaj indikis, ke li interesiĝas „pri politiko, arto, literaturo, laborista problemo k.t.p. P.m. Pk. il.") Kaj en ĉiuj siaj verkoj la 20-jara junulo aperas kiel socie matura kaj politike klera homo. Dum la revoluciaj tempoj junularo tre rapide maturiĝis kaj tre rapide akiris politikan kaj socian maturecon.

Staru ĉi tie kiel ekzemplo la plena teksto de unu el liaj artikoloj — alvoko al la landa esperantistaro.

KION NI DEVAS FARI?

Ĉiu scias, en kian situacion trafis nun nia lando. Ekonomia senordo, kiun naskis la sepjara milito, detruis la tutan mastrumadon de Rusio, sekvigis malsaton kaj faris malebla ĉe tiuj ĉi kondiĉoj senprokraste efektivigi komunismon, kion intencis komence fari Rusa Komunista Partio kaj Sovjeta Registaro. Dum kelkaj jaroj Sovjeta Registaro insiste penis efektivigi sian programon, fordetruante ĝis fundamento ĉiun plej malgrandan detalaj on (evidenta preseraro; legu: detalon) de burĝa regnokonstruo kaj konstruante mondon de Komunumo. Ĉiu ruso scias, ke ĝi faris por ĉi celo ĉion kion ĝi povis. Tuta burĝa mondo komencis batali kontraŭ Sovjeta Rusio. Grandegaj armeoj atakis dum kvar jaroj malsatan kaj malriĉiĝintan Rusion. Kontraŭrevoluciaj konspiraĵoj faris al Sov. Registaro multege da klopodoj. Ĉion ĉi venkis la rusa popolo, suferanta kaj malriĉa, sed glorinda pro sia revolucia potenco. Sed la grandega kaj laciga milito prenis de l' rusa popolo tiom da fortoj, ke ĝi ne povis venki unu sian kruelan malamikon — ekonomian senordon. Kaj Sov. Registaro decidis: anstataŭ tute foriri de revolucia scenejo, anstataŭ cedi al burĝara atako kaj perdi ĉion, kion ĵus akiris por si la rusa proletariaro, estas pli bone provizore rifuzi de kelkaj revoluciaj almilitaĵoj, ne tiom gravaj, por ke poste iom post iom temen veni al komunismo. Tiamaniere estis komencita la nova ekonomia politiko, reaperiginta privatan komercon, industrion, mastrumadon k.t.p. Ĉiuj burĝaj gazetoj kantas nun al tutmonda proletariaro pri falseco de Sov. Registaro kaj multaj laboristoj kredas al ili. Do ĉu ne nia tasko, ĉu ne tasko de rusaj esperantistoj, havantaj nun tiom multe da korespondantoj inter eksterlanda laboristaro, estas klarigi al niaj postlimaj kamaradoj, kion signifas la nova ekonomia politiko de Sov. Registaro. Nur por sola, unika celo provizore rifuzis rusaj komunistoj en kelkaj punktoj de sia programo. — Por savi la landon de difinitiva ekonomia detruiĝo. Por restigi la ŝtatan regadon en laboristaj manoj. Por ne permesi al burĝoj tute reekkposedi la landon. Por havi povon post ŝtata ekonomia renaskiĝo reekonstrui laboristan komunumon. Do ne kredu, kamaradoj, al gazetaj artikoloj pro perfido de rusaj komunistoj al komunismo kaj la rusa popolo. Tute ne tio (sic!) akcelas la Sovjetoj, ŝanĝante sian politikon.

En la lando estas malsato. Terura malsato, falĉanta milcentojn da homaj vivoj. La Sovjetoj faras ĉion, kion ili povas por helpi al la malsatantoj. Super la lando pendas la krio: „HELPU AL LA MALSATANTOJ". Ĉiutage ĉiu urbo, urbeto, vilaĝo, fabriko kolektas monon, grenon kaj aliajn oferaĵojn por la malsatantoj. Ĉiutage en la lando estas farata grandioza laboro por la malsatantoj. Sed por venki la mizeron necesas centobligi la laboron. Do ĉu ne tasko de rusaj esperantistoj estas ankaŭ laŭeble helpi. Ne parolante jam pri senpera helpo de apartaj esperantistoj kaj esperantistaj organizaĵoj, ni devas en ĉiu eksterlanda letero, en ĉiu nia presorgano peti niajn eksterlandajn samideanojn pri la helpo. Se por ili ne estas malgravaj interesoj de tutmonda revolucio kies avangardo tamen estas kaj restos la rusa proletariaro, do ili devas subteni la rusan popolon, por ke ĝi estu kapabla daŭri la bataladon.

Ne plendi je indiferenteco de Sov. Registaro al esperantismo ni devas, ĉar tro okupita nun estas Sov. Registaro de plej gravaj problemoj, kaj tro malmulte da fakta helpo ni ĝis nun al ĝi faris, sed ĉiamaniere uzi nian movadon por celoj de rusa proletariaro, laciĝinta en la batalo, malsatanta kaj bezonata helpon de eksterlandaj kamaradoj. Tiamaniere ni ankaŭ pruvos, ke nia movado ne estas amuzo de intelegentuloj, ne havantaj aferon, ke ĝi meritas seriozan atenton, ke ĝi ne devas esti forgesata de Sov. Registaro."

V. V.

En la urbo Tverj (nun Kalinin) en la jaro 1925. Varankin tie estis instruisto de la „4a Kavaleria Internacia Lernejo „L. Trockij" de la Komandantaro", kaj disvolvis vastan propagandna laboron por Esperanto

Eĉ la gramatikaj eraroj, rusismoj kaj stilaj stumbloj ne povas nebuli la naturan elanon kaj aŭtentikan sincerecon de la artikolo.

Nuntempe oni miregas ke — en kondiĉoj de plena ĥaoso (detruo), manko de nutraĵoj, vestaĵoj, papero ktp. — li trovas kaj paperon, kaj monon, kaj presejon por la aperigo de 500(!) ekzempleroj de Esperanta eldonaĵo por dissendo tra la lando kaj eksterlanden (aperis entute almenaŭ tri numeroj de la gazeto). Kaj la gazeto havis ĉiujn kutimajn rubrikojn: redakcian artikolon, literaturan rubrikon, informojn („Pri esperanta movado en Rusio", „Rezultatoj de Tutrusia enketo, entreprenita de N.-Novgoroda Esperanta Informejo"), novaĵojn, anoncojn, korespondan rubrikon ktp. Krome, la redakcio provis peri abonadon de eksterlandaj revuoj, organizi la presadon kaj dissendadon de lernolibroj, vortaroj, propagandiloj ktp.

Sed Varankin kaj liaj geamikoj trotaksis siajn fortojn. Ili tiom kuraĝiĝis, ke eĉ provis organizi aŭtune de 1920 la III-an Tutrusian Kongreson de Esperantistoj, tamen pri tio ili fiaskis. V. N. Devjatnin ironie komentis tion en la revuo „Esperantista Movado", 1921, n-ro 1-2 (11-12):

MALKONGRESO

Sur la maldekstra flanko de l' duobla enirpordo estas fiksita tute senkoloriĝinta elpendaĵo kun surskribo: „Malsupra Societo Esperantista". Koplo sonoras, — silento. Korto sonoras, — silento. Devo sonoras, Korto frapas la pordon per la pugno. Sur la ŝtuparo aŭdiĝas paŝoj; la pordo malfermiĝas kaj aperas figuro de ia virino.

— Ĉu tie ĉi estas la Societo Esperantista?

— Esperantistoj? Ne, ne... ili loĝas pli supre, en la dua etaĝo. Jen tiu ĉi pordo maldekstre.

Koplo sonoras.

— Ne sonoru, ĉar la sonorilo estas difektita, — diras la virino, — frapu la pordon, sed pli forte, ĉar tre ofte la frapado ne estas aŭdata bone supre.

Al Koplo aliĝas Korto kaj ili duope komencas tamburadi la pordon. En dua etaĝo malfermiĝas fenestro, tra kiu elŝoviĝas ies kapo kaj krias: „tuj, tuj, atendu iomete".

Sur la ŝtuparoj aŭdiĝas rapidaj paŝoj kaj la pordo fine gasteme malfermiĝas. Aperas knabo, kiu ĝentile salutas la alvenintojn kaj esperante invitas ilin eniri.

La migrantoj supreniras krakantan lignan ŝtuparon, eniras en malluman antaŭĉambreton kaj laŭ montro de l' gentila knabo penetras en apudan negrandan ĉambron, en kies mezo staras longa tablo, ĉirkaŭ kiu grupiĝas kelkaj junuloj. Unu el ili iras renkonten al la alvenintaj kaj salutas ilin ankaŭ esperante kaj rekomendas sin:

— Mi estas Baranko, la prezidanto de ĉi tiea grupo Esperantista.

Devo, Koplo kaj Korto unu post la alia konatiĝas kun kamarado Baranko kaj kun aliaj ĉeestintaj, el kiuj nur du iomete parolas esperante.

— Bone, ke vi fine venis, — diris Baranko, — almenaŭ ni povas hodiaŭ malfermi la Kongreson.

— Kiel? Ĉu la kongreso ne estas ankoraŭ malfermita?

— Tute ne. Ni efektive devis malfermi ĝin ankoraŭ hieraŭ, sed, ĉar alveturis tre malmultaj kongresanoj, ni decidis prokrasti la malfermon ĝis hodiaŭa vespero, des pli ke ni estas atendantaj la alveturon de Moskvaj kaj Peterburgaj samideanoj.

— Sed ĉu multaj jam estas alveturintaj?

— Ho, jes: estas jam dekdu personoj.

— Dekdu?!

— Jes, jam dekdu, eble ankoraŭ kelkaj alveturos. Krom tio venos, verŝajne, ankoraŭ ses aŭ sep niaj esperantistoj.

Devo, Korto kaj Koplo rigardis unu la alian per larĝe malfermitaj okuloj kaj tute ŝtoniĝis. — Kiom do da personoj ĝenerale kolektiĝis al la kongreso? — demandis Devo, falante sur unu el la seĝoj apud la tablo.

— Proksimume dudek. Por la komenco estas sufiĉe, — gaje ridetante respondis Baranko.

Devo ekrigardis lin, kvazaŭ neviditan ĝis nun miraklon.

— Dudek esperantistoj, — li ekkriis, — por la Tutruslanda Esperantista Kongreso?! Kara kamarado! Kion vi diras?!

Korto kaj Koplo restis ŝtonigitaj, sensence rigardante ĉirkaŭ si, kvazaŭ ili subite trafis en la rondon de frenezuloj.

Sed Baranko konservis ridetantan vizaĝon kaj nur siavice esprimis miron je la Devo, kiu dume leviĝis kaj kun teruro kunprenis la manojn.

— Kamaradoj, — li diris, — ĉu vi komprenas, kion vi faris? Tio ja estas ne Tutruslanda Kongreso, sed Tutruslanda skandalo!... Ĉu ni traveturis mil verstojn por partopreni la kunvenon de dudek esperantistoj?!... Kian rajton vi havas tiel mokridi Esperanton?... Kiel vi kuraĝas nomi tion, kion vi aranĝis „Tutruslanda Kongreso"?!...

— Trankviliĝu kamarado, — diris Korto, — kompreneble ni ne povas konsenti, ke tio, kion ni nun ĉeestas, nomiĝu „Tutruslanda Kongreso"...

— Jes, — konsentis Koplo, — ni devas elpensi nomon por tiu ĉi... kunveturo... aŭ kunveno... Mi ne scias, kio ĝi estas!... sed ni devas savi la situacion.

Komenciĝis la konsiliĝo, kiun partoprenis ĉiuj ĉeestintoj, kaj, malgraŭ kontraŭdiroj de Baranko, baldaŭ estis decidite nomi la nunan kolektiĝon „Konferenco de rusaj esperantistoj", kvankam eĉ „Konferenco" ĝi ne povis esti nomita".

Tio okazis aŭtune de 1920. Kaj jen en junio de 1921 en Petrogrado dum la 3-a Tutruslanda Kongreso de Esperantistoj (reala kongreso!) estis proklamita la fondo de Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU), kies prezidanto oni elektis Ernest *Drezen*. Kaj inter 15 membroj de unua Centra Komitato de SEU estis juna Vladimir Varankin. Ekde tiu ĉi momento ili estis proksimaj amikoj kaj la vivo de 18-jara junulo, hieraŭa gimnaziano, ekde tiam por ĉiam estis kunligita kun SEU, kun la organizita E-movado en Sovetio.

Mi trafoliumas la gazeton „Ruĝa Esperantisto" (mi havas du numerojn: n-ron 2 (Decembro 1921, 4 p.) kaj n-ron 3 (Februaro 1922 8 p.), kaj sur la flaviĝintaj paĝoj kvazaŭ ekvivas la homoj jam delonge forpasintaj. Jen la „Novaĵoj de urbo Niĵnij Novgorod" (ekde 15 Oktobro ĝis 15 Decembro 1921). La teksto staras ĉi tie en la originala formo:

16/X — Organiza kunveno de junularsekcio de klubo.

1/XI — Komencis E-kurso ankoraŭ en 2 fakoj de Milita skolo de fizika klerigo; la instruisto — k-do Varankin.

3/XI — Komenciĝis vintra kurso de E-lernejo; 20 personoj; instruas k-do Konovalov.

6/XI — Komencis E-kurso en elektroteknikumo; 60 personoj; instruas k-do Beljajev.

10/XI — La 4-a kluba koncerto sur la kluba scenejo: 1) Instruita Mimikisto (de V. N. Devjatnin); 2) Krimintenculo (de A. P. Ĉehov, ruse); 3) Koncerto; surscenigis reĝisoro L. D. Beljajev.

14/XI — Malfermita spektaklo-koncerto en teatro „Rekord"; 1) Leciono (k-do Varankin); 2) Instruita Mimikisto; 3) „Pro museto" (ruse); 4) Krimintenculo; 5) Koncerto; reĝisoroj L. D. Beljajev kaj M. S. Vronskij.

28/XI — Malfermita spektaklo-koncerto en Kremljovskij klubo: 1) Leciono (k-do Ĥoĥlov); 2) Opero „Ivanov Paŭlo", traduko de Vol-Volanto (V. Varankin); 3) „Propono" (de A. P. Ĉeĥov, ruse); 4) Koncerto; surscenigo de V. Varankin kaj L. Beljajev.

I/XII — Laŭ ordono de Milita regiona kongreso lingvo Esperanto estas forigita de l' programo de milita skolo de fizika klerigo.

12/XII — Komencis E-kurso en la Laborista Fakultato; 137 personoj; instruas k-do V. Varankin.

— Apero de l' Artikolaro al utilo de malsatantoj „For Malsaton!", malgraŭ la materialoj estas pretaj, oni haltis ĝis nedefinita dato, pro subita treega altigo de kostoj.

— Librostorejo ekde 15/X ĝis 15/XII distribuis tra la gubernio pli ol 200 lernolibrojn, 30 vortarojn, 150 ĵurnalojn kaj 50 aliajn librojn. Nuntempe en la storejo restis nek vortaroj, nek lernolibroj.

— Oni ricevis pli ol 70 leterojn de eksterlando: de Aŭstralio, Aŭstrio, Anglio, Brazilio, Bulgario, Hungario, Germanio, Italio, Litovio, Meksikio, Pollando, Usono, Finlando, Francio, Svedio, Ĉeĥoslovakio, Estonio; ĵurnalojn: „Esp.-Laboristo" kaj „Esp.-Triumfonta".

— En la ĵurnalo „Niĵ. Kommuna" aperis pli ol 10 notetoj pri Esperanto; el ili tradukita de „Esp.-Laboristo" artikolo „Nuna Hispanio", noteto pri anarkistoj, revuo de leteroj el Usono ktp.

— La klubo translokiĝis al la centro de urbo: str. Mironosickaja, 9. La ejo estas tre bona. Sep ĉambroj, halo.

Anoncoj

1) Kamarado! Se vi deziras korespondi, interŝanĝi ktp. kun la eksterlanda esperantistaro, vi turnu vin al: Sovjetlanda Esperantista Servo (SES). Moskvo, Poŝtkesto 666. Ĉefdelegito k-do A. P. Radinkov-Neradof.

2) SES-a Adresaro de Sovjetlandaj Esperantistoj aperos komence de majo 1922; tial, kiu volas esti enregistrita postulu specialan prospekton de Ĉefdelegito de SES;

3) Oni petas ĉiujn ricevintajn de tiu ĉi numeron alsendu la supreindikitan ĝian prezon (2000 rub.; por eksterlando — 3 respkup.).

4) Oni petas ĉiujn organizaĵojn kaj privatulojn sendu al la Klubon E-literaturon, kiun ili havas (precipe — lernolibrojn kaj vortarojn) en la kvanto de 50 ĝis 100 ekzempleroj pagoŝarĝe aŭ ŝanĝe de niĵegorodaj eldonaĵoj.

5) Ĵus aperis de presejo E-teksto de l' opero „Ivanov Paŭlo". Traduko de Vol-Volanto (V. Varankin). Prezo 5000 rub. La mendojn adresu al la aŭtoro de l' traduko: N.-Novgorod, str. Mironosickaja, 9.

6) Baldaŭ aperos el presejo la jena E-eldonaĵo: Vol-Volanto „Versoj". Prezo: 5000 rub. La mendojn adresu: N.-Novgorod, str. Mironosickaja, 9. V. V. Varankin.

En N.-Novgorod
(Ekde 15 decembro ĝis 1 februaro 1922):

— Laŭ la cirkuliero de Glavpolitprosvet pri ĉeso de ŝtata provizado de E-Organizaĵoj, kondiĉoj de laboro por e-istoj en N.-Novgorod treege malpliboniĝas. Tamen oni proponis, ke neniuokaze oni ne ĉesu la agadon.

11/XII — Malfermiĝis la E-lernejo ĉe Artileriadeponejoj de Markomitato en u. Kanavin. Instruas k-do Ŝlosberg (la ĉefa mara komisaro de urbo). Ĉe la malfermo kun salutvorto elpaŝis prezidanto de l' Regiona SEU-komitato k-do Varankin.

25/XII — Spektaklo en konstruaĵo de Komkursoj: 1) Leciono (k-do Varankin).

2) „Fervojo" (Nekrasov, ruse). 3) Ivanov Paŭlo (opero, tradukis Vol-volanto). 4) Krimintenculo. La halo estis plena. La vespero estis grandega sukceso. Reĝisoro L. D. Beljajev.

26/XII — Komuna kunveno: 1) Informa raporto de k-do Konovalov pri E-movado en 1921. Oni konstatis grandan kreskon de la movado eksterlande kaj malkreskadon de ĝi, precipe fine de la jaro, en Rusio. 2) Pro nelaboremo de l' antaŭa Provizora Regiona SEU-komitato, oni reelektis ĝin; la konsisto de la nova komitato estas jena: Prezidanto — V. V. Varankin; Sekretario — T. V. Lovcova; membroj: V. Z. Ovsjannikov, S. V. Vinogradov, F. Sokolov. 3) Oni eklegis cirkulieron de Glavpolitprosvet pri la ĉesigo de ŝtata provizado de E-organizaĵoj. Oni decidis: a) laŭ la proponoj de Gubpolitprosvet, E-klubo ĉe la Gubpolitprosvet devas eniri en la laboristan klubon de Sverdlov, kiel la sekcio; b) oni konstatas la ekziston de la SEU-grupo en N. Novgorod, kiel memstara, ne ŝtata organizaĵo; c) elekti la estraron de la grupo en la jena konsisto: prezidanto — V. V. Varankin, vic-prezidanto — L. D. Beljajev, kasisto — H. A. Konovalov, sekretario — A. Ja. Kitajeva. 4) Oni aprobis la laborplanon dum periodo januaro-marto 1922.

30/XII — Oni ricevis la proponon de Kultura Komitato de Narkomato de ligiloj doni al ĝi la instruiston pri lingvo kaj literaturo.

31/XII — Novjarfesto. La 5-a klubvespero.

1/I — La sesa klubvespero (novjara).

9/I — Spektaklo en konstruaĵo de Komkursoj. 1) Frenezulo (trad. Vol-Volanto); 2) La Silento (vodevilo); 3) Fatala debuto (vodevilo); 4) Koncerto. Surscenigo de reĝ. M. S. Vronskij. La spektaklo donis 1 000 000 rub. de enspezo.

10/I — Unua post la duonjara interspaco kunveno de Literatursekcio sub gvido de k-do Konovalov. Analizo de lit. materialoj por la 3-a numero de „Ruĝa Esperantisto".

11/I — La sepa klubvespero.

— Gubprofsovet kaj Gubpolitprosvet aprobis decidon pri organizo ĉe laborista klubo de Sverdlov E-sekcion.

16/I — Komencis nova kurso de E-lernejo.

17/I — La spektaklo en konstruaĵo de Komkursoj. 1) Leciono (k-do Varankin) 2) Ivanov Paŭlo. 3) Vavilona kunamasigo (komedio, ruse). 4) Koncerto. Surscenigo de reĝ. L. D. Beljajev.

22/I — La oka klubvespero.

26/I — Gubprofobr decidis pri ŝtatprovizado de E-lernejo.

29/I — Spektaklo en la Kremljovskij klubo. 1) Boris Godunov (sceno en kelo) — traduko de V. N. Devjatnin. 2) Pro museto (vodevilo). 3) Sen protektado (vodevilo). Surscenigis reĝ. M. S. Vronskij.

— Oni ricevis 200 leterojn el ĉiuj ŝtatoj de Eŭropo, el Ameriko, Azio kaj Aŭstralio. Revuojn: „Sennacieca Revuo", „Katolika Mondo", „Arguso" „Esp. Triumfonta".

— Konekse al la transiro al memfinancado, ekde la 1-a januaro tuta agado de la klubo, simile al tiu de aliaj organizaĵoj, oni strikte kunordigas flanke de ekonomiaj postuloj. Rezulte de la politiko klubo enspezis dum la januaro 2 000 000 rublojn, kio donas konvinkon je la ebleco de memstara laboro.

Anoncoj.
Koresponda fako

— N.-Novgoroda Klubo de SEU intencas daŭrigi la laboron de s-ro Davidov je eldono de Titolaro de esperantaj verkoj. Tial ni petas kiel rusajn, tiel ankaŭ eksterlandajn samideanojn alsendi al ni informojn pri ĉiuj novaj (1914-1921) esperantaj verkoj. Originalaj, aŭ tradukitaj (Eldonitaj kaj ne eldonitaj).
— „Ivanov Paŭlo". Opero. Traduko de Vol-Volanto. Estas aĉetebla ĉe N.-Novgoroda Esperanta Librejo. Prezo 5 k. (orvalute)

(Rim.: Unu antaŭmilita rublo en februaro de 1922 egalis 150 000 Sov. rublojn.)

Tia viglega estis la agado de la N.-Novgoroda Klubo de SEU en la jaroj 1921-1922. Kaj la ĉefa motoro de la klubo estis la juna Vol-Volanto: Vladimir Varankin.

La ĉefa malfacilaĵo estis la absoluta manko de mono (ja la kursoj estis senpagaj), de lernolibroj kaj de literaturo. Ĉiuj provoj ricevi ilin de la Moskva E-societo estis vanaj. Precipe pri tio ĉi li skribas en letero en Moskvon al la tiama Popolkomisaro pri eduko A. *Lunaĉarskij*. Kaj la batalema, energia letero, kiun skribas la juna 17-jara knabo al la ministro (ĝi troviĝas ĝis nun en unu el la Moskvaj arkivejoj), plene karakterizas ĝian aŭtoron. Kaj supozeble, la letero al Lunaĉarskij eventuale efikis, kaj la Unio de Junaj Esperantistoj en Niĵnij Novgorod ricevas sufiĉe grandan financan subtenon. Ekzemple, en februaro 1921, kiel oni povas legi en la unua numero (oktobro) de „Ruĝa Esperantisto" (Presorgano de N.-Novgoroda Klubo de SEU) sur p. 8, la Gubernia Politkleriga Administracio „donis al ĝi nelimigitan krediton kaj ĉiuspecan helpon; ankaŭ al ĉiuj (10) aktivaj laborantoj de la Klubo, salajron kaj militan nutronormon. Same, la gvidantoj de Esperanto-kursoj estis salajrataj. (U. Lins „Sennac. Rev.", 1987, N° 115). Tutcerte, la kondiĉoj ne estis tipaj tiutempe. Kaj tiuj ĉi penadoj ne restis ne rimarkitaj. Kiam en 1921 en Leningrado okazis la III-a Tutrusia Kongreso de Esperantistoj, dum kiu estis fondita SEU (tiam Sovetlanda Esperantista Unio), kaj prezidanto estis elektita la 28-jara Ernest Drezen, en la membraron de la unua Centra Komitato de SEU eniris ankaŭ la juna Vladimir Varankin.

Tamen la tempoj estis ege malfacilaj. La Unua Mondmilito, la revolucio, la civila milito, la periodo de t.n. „milita komunismo" k.s. La ekonomio de la lando estis tute detruita, mankis nutraĵoj, vestaĵoj, hejtaĵoj ktp. En 1921 pro vundoj ricevitaj en la milito mortas lia patro. La patrino restis sola kun tri infanoj. Necesas serĉi pandonan okupon. Baldaŭ post la finiĝo de la lernejo (i.a. eksgimnazio) la juna Vladimir dum kelka tempo laboras en iu elektroenergia organizaĵo. Sed baldaŭ al la urbo portempe venis el la urbo Tverj (nun nomata Kalinin) la tiea kavaleria lernejo. Varankin tuj aliĝas al ĝi por servi tie. Li servis en la lernejo kiel politika kunlaboranto. Tio estis laboro ĝuste por li: li organizis politikajn mitingojn, lecionojn, surscenigis propagandajn spektaklojn, gvidis preparojn por la revoluciaj festoj k.s. Estante mem apenaŭ hieraŭa lernanto, li ŝatis kunesti kun la junularo (ĉefe laborista kaj kamparana, ofte apenaŭ legoscia), instrui ĝin, alkutimigis ĝin al la socia vivo, ktp.

Interalie, unu el la kursanoj tiutempaj (cetere, ne la plej bona), kiun li altiris roli en spektaklo, estis la posta fama soveta operkantisto Sergej *Lemjeŝev*. Jen kion la kantisto mem skribas pri tio en sia aŭtobiografio (S. Lemjeŝev „Putj k iskusstvu" (Survoje al arto). — Moskvo, 1968):

„La unu jaro kaj duono (ekde printempo de 1920 ĝis aŭtuno de 1921), kiujn mi pasigis en la lernejo, estis tre streĉitaj: ja 3-jara kurso de nia lernado egalis al normala altlernejo."

(Efektive, la lernejo, kiun gvidis *Zagoskin* kaj komisaro *Grinblat* (latvo), estis la forĝejo de elito de militaj kadroj kaj „tre fiere" nomiĝis: „La 4-a Kavaleria Internacia Lernejo „L. TROCKIJ" de la Komandantaro".)

„Al la vica abiturientiĝo la estro de klubo (t.e. V. Varankin, kiun nia kantisto, kompreneble, ne kuraĝas nomi) proponis trude al la kursanoj surscenigi tiutempe popularan vodevilon „Ivanov Paŭlo" (sic!) — kaj la rolon de ĉefrolanto oni proponis al mi. Ĉiuj havis la opinion, ke la rolo de Ivanov estas kvazaŭ por mi skribita!" Kaj li rakontas plu, kiel la klubestro (V. Varankin) savis lin de karcero, kien li trafis pro malpermesita foriro el la regimento — al knabinoj, certe, — farante lin la „neanstataŭebla" ĉefrolanto!

Tiu ĉi foto estis farita pri li la 31an de januaro en 1925 en Moskvo

Dume la kavalerian lernejon oni denove translokigis al la urbo Tverj. Kaj ankaŭ tie V. Varankin plu faras grandan laboron. Dank' al lia agado oni instruas Esperanton kaj en kavaleria lernejo, kaj en la lokaj kluboj, lernejoj, poŝtejoj ktp. Oni kunvokas mitingojn, konferencojn, surscenigas propagandajn teatraĵojn kaj spektaklojn antaŭ ĉia publiko. Oni malfermas oficialajn ŝtatajn urbajn kursojn, kies estro fariĝas li mem. Kaj li lekcias por la gekursanoj, verkas longajn artikolojn por la revuo „Meĵdunarodnyj Jazyk" (Moskvo), en kiuj li detale priskribas la plej efikajn metodojn de agitado kaj propagando por la disvastigo de Esperanto. (Se oni kolektus tiujn ĉi 5-6 artikolojn, ili tute sufiĉus por malg-

randa libro, kaj krome la signifo de la konsiloj, kiujn li donis en ili, ĝis nun validas. Estante la membro de CK de SEU, li samtempe gvidas Gubkomon (Gubernian Komitaton) de SEU, kaj en la agado lin firme subtenadas lokaj partiaj, komsomolaj (junkomunistaj) kaj sindikataj komitatoj. En la gubernio oni ege disvolvis Proletan Esperanto-Korespondadon inter la soveta kaj eksterlanda gazetaro pere de Esperanto, kaj ne unufoje oni gajnis pro tio premiojn de SEU. Oni insiste varbis novajn membrojn, oni fondis ĉe lokaj entreprenoj novajn ĉelojn de SEU, oni abonis kaj abonigis revuojn... Kaj konstante li ĉeestas inter la junularo, konstante li instruas, edukas, helpas, kontrolas, instigas... Kiam li poste forveturis de Tverj, li postlasis grandegan aktivularon kaj glate funkciantan E-entreprenon. Sed ni vidu iom pli detale lian agadon en Tverj.

★ ★ ★

Fruaj versoj de Varankin: Fonto: „Ruĝa Esperantisto," Dec. 1921. N°2, p.2.

Vol-Volanto
(V. Varankin)

Al la Nordo
(Originale verkita)

„Reĝo Frosto el sia palaco aĵura
Briliantojn de perloj disŝutis sur ter'...
En vualo aera princino Neĝer'
Estas juna kaj ĉarma kaj pura...
Se en sud', per ebria avido de vin',
De lazura turkis' de ĉiela kupolo
De glitado sur golf' en revema hondolo
Kaj de bronzopasia virin'
Per ardeco tropika de mar'-oceano,
Per rubena volupt' — ŝaŭmas viva pokal', —
Tie ĉi, en juvele kovrita neĝval',
En luksega arĝentsarafano —
Ĉio norda pli forte al si logas min:
Pro beleco de san' kaj ornam' perlamota
De parenca natur', de skarlata dorloto
De plej ĉarma, plej freŝa en nord', junulin'...

29/X-21.

I.Ionov

Kanto de l' komunanoj

Minacan vipon sort' al mi preparas
Kaj storma tromb' ataki volas nin,
Malfacilaĵoj vojon nian baras,
Sed la standardon ne mallevos ni!
Sen tim' renkontos ni la uraganon,
Ni komunanoj!...
Ni scias, ke sen lim' disfluos sur la tero
de la komunideoj forta ond',
Forflugos super ni la fulmotondr' danĝera,
En arda ruĝ' rebrilos horizont!...
Preparas punon ni al fort' tirana,
Ni, komunanoj!...
Ne devas havi ni ripozon dum batalo!
Ekbrilu glav' en laborista man'!
Do enviciĝu tuj por lukt' finala
Vi, juna laborist', vi juna laborist', kamparan'!
Trairos ja kun venk', tra fajra oceano
Nur komunanoj!

Elrusigis *V. Varankin*

El libro: Varankin V. i dr. Esperanto dlja raboĉiĥ. Uĉjebnik dlja kruĵkov i samoobrazovanija. Moskva-Leningrad, Gosizdat,, 1930, 80 s;, 60 kop.

István Bozsik: Skizo

TREZORO

Cent jaroj de la Esperanta novelarto 1887-1986
Redaktis: Reto Rossetti kaj Henri Vatré

151 noveloj kaj romanfragmentoj de 100 verkistoj

L. L. Zamenhof, A. Proĥoroviĉ-Koĉmarenko, K. M. Nordensvan, P. Lengyel, S. Meyer, P. Prodanov, Ciklari, K. Bein, V. Ŝeremetevskij. G. Bárczi, Ned Katryn, A. E. Styler, H. B. Hayms, T. Schwartz-Soros, H. A. Luyken, J. Baghy, E. Izgur, V. Eroŝenko, H. J. Bulthuis, R. Schwartz, D. Dambe, J. Forge, G. Avril, K. R. C. Sturmer, I. Ŝirjaev, M. Ljubin, Lidja Zamenhof, H. M. Ĥrima, V. Varankin, St. Engholm, Cicio Mar, Vs. Ivanov, L. N. M. Newell, H. Weinhengst, Verda Majo, M. Stuttard, K. Lindqvist, R. Rossetti, D. Richardson, F. Omelka, P. Thorsen, C. Rossetti, M. Boulton, J. Leser, Z. Takaĉ, J. H. Rosbach, J. Régulo Pérez, F. Szilágyi, J. Ribillard, P. Th. Justesen, St. Zodel, S. Szathmári, Ŝt. Urban, H. Baupierre, M. Ŝekerĝiev, J. Grum, C. Conterno Guglielminetti, J. Pióro, J. I. Francis, K. G. Linton, L. Bőti, S. Arandjelovič, M. Duc Goninaz, Lorjak, M. Miyamoto, E. Salovaara, B. Potts, L. Beaucaire, G. Konisi, L. Hajpin, T. Sekelj, J. Valano, L. Gabrielli, M. Ueyama, M. Walker, Yagi-Nihej, G. R. Correa, V. Glazunov, T. Tyblewski, Z.Heide, M. Nervi I. Nemere, M. A. Andriĉ, É. Tófalvi, J. H. Sullivan, J. Modest, D. Dorval, E. Tóth, A. J. Kajryté Kruz, B. Golden, J. S. Veen, E. Csiszár, S. Ŝtimec, J. Sárközi, I. Gudonyté, L. Dek, G. Kamaĉo, F. J. Moleón, M. J. Quesada.

Du volumoj, binditaj, kun ŝirmkovrilo. Entute 960 paĝoj. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio. Jubilea Eldonserio n-ro 4. Serio Esperantaj Klasikaĵoj n-ro 6. Prezo: 69,- ned. gld. (Por Hungario: 699,- forintoj.)

Antologioj havas gravan rolon en ĉiu nacia literaturo, tiom pli en la Esperanta, kies „popolo" malhavas grandan parton de la normala kultura substrukturo (lerneja reto ktp.), kaj mankas ankaŭ la rapidaj kaj efikaj kanaloj por la disvastigado de la libroj.

Post kelkaj ŝatindaj kolektoj de la antaŭmilita periodo (ĝis 1914) la Esperanta prozo havis sian unuan veran antologion nur en la jaro 1964 — tio estis 33 rakontoj, redaktita de Reto Rossetti kaj Ferenc Szilágyi. Tiu kolekto, kiel indikas la titolo, enhavis tridek tri rakontojn de 29 aŭtoroj. Nun, kvaronan jarcenton poste, aperis Trezoro (redaktita de Reto Rossetti kaj Henri Vatré) en du volumoj, kiuj prezentas al la leganto 151 novelojn kaj romanfragmentojn de 100 aŭtoroj el la unua centjaro de la Esperanta literaturo. La ĉisuba peco, ĉerpita el la impona kolekto, havas la senkaŝan celon veki vian intereson pri la unika verko.

Trezoro estas la ero n-ro 4 de la Jubilea Kolekto Jarcento de Esperanto, kaj la ero n-ro 6 de la Serio Esperantaj Klasikaĵoj.

Mauro Nervi (1959 —)

La legendo pri Marko Keller
(Eta apologio pri konservativismo)

Nuntempe oni larĝparte forgesis la epizodojn rilatajn al Marko Keller, la ĵonglisto; tia nepardoninda neglekto ŝuldiĝas verŝajne al la jam senhalta kaj neinversigebla degenerado de nia socio, kiu pro morkoruptoj kaj malkaŝa ribelemo al la aŭtoritato ne plu sukcesas regi sin sur la rekta vojo. Sed kio okazos estontece? Ĉu ni povas esti certaj, ke la historio fluos tiel same, kiel antaŭe, kaj nova erao ekfloros post la hodiaŭa dekadenco? Aŭ la destino de nia specio vere estas memdetruo, kiel kredigas al ni iuj pesimistaj intelektuloj? Nu, mi ne scias. Tamen mi opinias — kaj multaj kleruloj pravigas min —, ke nia jarcento estas senkompare pli laca kaj senkonsola ol tiu, en kiu vivis Marko Keller. Jen kroma paseisto — vi eble pensos. Sed vi eraras. Neniu ĝis nun pruvis, ke Marko Keller efektive vivis pasintece; eble li neniam vivis, do ankoraŭ ekzistas ebleco, ke post unu jarcento li frapos al niaj hejmpordoj kaj diros: jen mi. Oni absolute ne scias, ĉu li vivis en la paseo, aŭ en la futuro, aŭ ĉu li jam nun loĝas inter ni; kelkaj eĉ supozas, ke li ĉiam akompanis nin dum la tuta historio, sed ĉi-lastan teorion ne multaj subtenas. Ĉi tiuj kvereloj tamen interesas nur la erudiciulojn — kiel dirite, komunaj homoj jam forgesis la ĵongliston — kaj ankaŭ ili, pli lastatempe, iom post iom forlasas la demandon, kiu ŝajnas ĉiam pli sensignifa.

Sed mi ne povas akcepti ilian sintenon. Ĉi tie, en mia subtera biblioteko, mi ankoraŭ konservas dekojn da libroj el la tempo, kiam ankoraŭ ĉiuj parolis pri li; kaj volonte mi ankoraŭ kliniĝas — malgraŭ mia pli ol konsiderinda aĝo — super la flavaj kaj ĉifitaj paĝoj, kaj en la polva duonlumo mi malrapide deĉifras la antikvajn skribmanierojn, ĝis la aŭroro, kaj la konsekvenca aerhumidiĝo, devigas min al ripozo. Tiam mi elŝaltas la malfortan elektran lampon sur mia kapo, fermas delikate kaj ameme la jarpezajn librojn, kaj fine faligas miajn lacajn ostojn sur angulan pajlmatracon.

Kaj ja mi ne devas zorgi pri la manĝoj: ĉiutage fakte mia lasta disĉiplo — la sola, kiu restis al mi fidela — descendas ĉi-suben, kaj en argila telero ofertas al mi la malmultajn nutraĵojn, kiujn mi bezonas. Nu, li jam estas plenkreska — kaj mi ankoraŭ povas bone memori, kiam li en sia infanaĝo brurapidis ĉi tien, kaj per hela, senproblema rideto proponis al mi la teleron. Sed ankaŭ tio estas pasintaĵo, ĉu ne. Post kelkaj horoj, kiam li venos, liaj paŝoj sur la ŝtuparo estos malrapidaj, senentuziasmaj, kvazaŭ li devus plenumi konsciencan devon. Kaj enpaŝinte mian ĉambron, li staros apud la sojlo gravmiene, kun la piedoj en la larĝa kaj brila lumstrio, kiu lancas tra la ĉambro el la tegmenta luko. Ĉiam, kiam li venas, mi demandas lin pri la surfaca mondo; plaĉus al mi iom instrui lin — li ja estas mia disĉiplo —, aŭ, se tio ne eblas, eĉ nur mallonge interparoli. Sed li ne respondas, rigardas la pavimon, maksimume jesas aŭ neas per kapsignoj. Kion fari? Mi do ĉiutage memorigas lin pri la nomo de Marko Keller, por ke almenaŭ li ne forgesu, kaj tuj poste resendas lin al la socio.

Tiel pasas miaj tagoj, senŝanĝe. Foje, post kelkhora studado, mi sentas la bezonon promeni: kaj por tio ja ne necesas, ke mi alsupru la ŝtuparon ĝis la ekstera mondo — kiu scias? eble tie estas danĝero por mi —, sed sufiĉas eliri el la ĉambro, turni sin dekstren, kaj jam prezentiĝas eksterordinare vasta promenejo. Senfinaj koridoroj, malaltplafonaj galerioj, ogivaj rustiĝintaj portaloj ekaperas

sinsekve antaŭ mi; kaj mi ne devas timi pro mallumo, ĉar ruĝaj reguldistancaj neonlampoj bonvole iluminas la vojon antaŭ miaj ritmaj paŝoj. Ĉiuokaze, mi ne volas tro malproksimiĝi, ĉar perdiĝi en tia labirinto estus vera tragedio. Kaj mi jam estas tro olda por riski tiom sencele mian fragilan vivon.

La tago disfalas jam, la nokto estas jam proksima; mi devas leviĝi de mia matraco, malfermi libron kaj ree ekstudi. Mia librokolekto estas vere senelĉerpa: ankaŭ nun, el mia ripozejo, mi kortuŝite admiras la orpresitajn titolojn, kiuj sur la bretoj formas longajn, paralelajn vicojn. Kiu supozus, ke la plejparton mi jam diligente tralegis kaj deĉifris? Eble eĉ ne la aŭtoritatoj, kiuj ŝarĝis min per ĉi tiu tasko antaŭ multaj, multaj jaroj – mi ne plu klare memoras – povis antaŭvidi tian fervoron kaj sindonemon. Estas vero tamen, ke la senĉesan studadon forte vigligis mia daŭra intereso pri Marko Keller kaj pri liaj tempoj – nu, povas esti. En la unuaj tempoj fakte, se mia memoro ne trompiĝas, mi mem petis la permeson de la aŭtoritatoj, por memvole apartiĝi kaj trankvile, senzorge dediĉi min al analizado, deĉifrado kaj tradukado de la antikvaj runoj. Kaj, se paroli sincere, mi neniam pentis pri mia decido.

La libroj, kiujn mi legas en ĉi tiu subtera ĉambro, originas el tempoj jam perdiĝintaj en la nebulo de plena forgeso. Nur kompetenta spertulo povus, eble, difini la eraon, kiam oni verkis ilin, sed tion nuntempe scipovas nek mi, nek iu alia el la supra mondo; la intereso pri historiaj sciencoj forte malaltiĝis, eble eĉ malaperis. Ĉiu zorgas pri sia hodiaŭo, kaj tio sufiĉas.

Mi ne estas do historiisto; kaj cetere ankaŭ mia intereso al la antikvaj libroj estas nur hazarda. Iun tagon fakte en mia hejmo – ho, mi memoras: ĝi estis blanka, sunbatata kaj polvoplena – tie do mi trafis blukovrilan libron, sufiĉe malgrandan; nun mi scias, ke temis pri la plej eta formato. La paĝoj estis tre, tre subtilaj, dense ornamitaj per orkoloraj runoj, unuavide tute nekompreneblaj.

La dekriptado okupis multajn jarojn de mia ankoraŭ frua juneco. Ne mankis momentoj, dum kiuj la tuta afero ŝajnis al mi ega absurdaĵo, kaj tiam senkuraĝiĝo ekpenetris tra la fendoj de mia bonvolo; sed mia persisto, mia nevenkebla obstino rezistis al ĉiuj malhelpaĵoj. Miaj samaĝuloj rigardis min kiel strangulon, la gepatroj riproĉis min plurfoje pro mia apartiĝemo; mi mem foje hezitis, sed ĉe la unuaj sukcesoj en la tradukado mi komprenis, ke mia obstino estis tute prava. Finfine – ja post longa tempo –, la dolĉaj kaj orverdaj runoj malfermis antaŭ mi siajn pordojn, kaj antikva, delonge forgesita kulturo reviviĝis en la glimanta beleco de la lingvo pratempa.

Tiu junula amo al antikvaĵoj instigis min fordediĉi mian vivon al la kultivado de arkaikaj kulturoj. Post nelonge mi eksciis, ke sub la ĉefturo de mia urbo ekzistas tre malnova biblioteko, de ĉiuj forgesita escepte de du-tri kleruloj; kaj ankaŭ ili sciis pri ĝi nur malklare, evidente ili neniam vizitis ĝin persone. Nun, post tiom longa studado, mi povas diri tutcerte kaj tutprave, ke niaj kleruloj estas nur pala kaj forpasonta spuro de la iama civilizacio, kaj ilia vantemo ne valoras pli ol sapveziko. Ho, kiel flustre kaj singardeme ili parolis al mi pri la biblioteko, kvazaŭ ties loko estus privilegia sekreto! Sed certe neniu el ili legis eĉ nur unu libron, tion pruvas iliaj stumpaj argumentoj pri Marko Keller; verŝajne ili nur ripetas tion, kion ili heredis de siaj gepatroj, kiuj siavice lernis tiujn du-tri nociojn de siaj avoj. Sed la iama kulturriĉeco grandparte perdiĝis, ofte eĉ plenaj mensogoj miksiĝis kun veraĵoj, tiel, ke ne plu eblas distingi la ĝustajn informojn disde la trompaj.

Sed kiam mi povis atingi la originalajn tekstojn, ĉio estis al mi klara. La t.n. kleruloj ignoras veran klerecon; ili konfuze intuicias nur, ke pli da kono en la popolo estus nura damaĝo: malkleraj homoj estas pli facile regeblaj, ho jes, tion ili bone komprenas. Kaj tiel la riĉaĵoj de nia pasinta kulturo ĉiam pli perdiĝas, ĉiam pli dronas en oceano de totala, neevitebla, senrevena forgeso.

La nokto alproksimiĝas, mi devas ŝalti la elektran lampon. Kun nekutima laciĝo mi ekstaras, la kapo turniĝas dum momento; paŝon post paŝo, tre malrapide, mi trenas min ĝis la bretoj, por serĉi novan pristudotan volumon. Fine mi trovas unu, kaj senhaste – mi havas tiom da tempo – metas ĝin sur la tablon, sub la malfortan lumon de la lampo; ekstere la nigraj koridoroj jam bruas per la strangaj sibloj de la nokto. Ho jes, jes, mi ankoraŭ memoras, sed la demando estas: kiom longe?

László Cs. Kovács: Soldatoj de Stefano (la unua hungara reĝo)

RECENZOJ

Senriska puzlo

Daniel Moirand: Murdo en Esperantujo. Romano, serio „Stafeto", n-ro 5. Eldonis: Flandra Espernato-Ligo, Antverpeno, 1988. ISBN 90-71205-20-7. 172 p. 21 cm. Prezo: 21,00 gld.

Ĉu necesas pli atentovoka titolo, kara leganto, por kateni nin, tro plenajn de ĉiutagaj luktoj kaj streĉoj, al legado de libro? Murdo! Kaj en Esperantujo! Kaj super ĉio: sur la titolpaĝo ni vidas tablosocieton en mistera duonlumo, trastrekitan per sangmemoriga ruĝa diagonalo! Volonte do mi lasis min kaptiĝi de tiom da promesoj.

Bona marko ŝajnis al mi ankaŭ la fakto, ke la libro aperis kiel gemo n-ro 5 de la koliero „Stafeto", donacinta al ni i.a. tiajn krimlibrojn, kiel la Piron'a „Ĉu rakonti novele", la Deck Dorval'a „Kazinski venas tro malfrue", kiuj ravis min per siaj freŝeco, lingvaj scintilaĵoj, inventemo, kaj ne laste per la sprita komplikado de iliaj suĵetoj.

Jes ja, mi inklinas kredi, ke originale verkitaj krimromanoj avancas fariĝi tre efikaj motoroj de la lingva evoluo. Krimverkaj aŭtoroj opinias sin, eble iom subkonscie, pli plumliberaj pro la „malseriozeco" de la ĝenro, kaj pli aŭdace disstreĉadas ŝtoniĝintajn konvenciojn kaj paradigmojn.

Ĉi tiuj konsideroj kaj favoraj aŭguroj igis min devore eklegi sur la unua paĝo, „kie" (ĉu deziri pli efikan komencon?) abrupte ŝirapertiĝas la pordo de privatdoma ĉambro, kunvenejo de lokaj esperantistoj, kaj aperas junulo, kiu, post kelkaj ŝancelpaŝoj, falas morta antaŭ la konsternitaj samideanoj.

Mia interesiĝo kulminis. Kelkajn liniojn pli „malfrue" tamen komencis mordeti min unuaj dubetoj pri la versimileco de la okazaĵoj. Al neniu el la ĉeestantoj, cetere simpatiaj, brilmensaj samideanoj, ekfulmas ja la ideo, post la kvietiĝo de la teruriĝo, elkuri kaj almenaŭ okulkapti la fuĝantan fifarulon.

Kaj la duboj plunubigis la horizonton de mia malsereniĝanta humoro, kiam la alvokita inspektoro „forgesas" serĉi freŝajn spurojn ekster la domo. Tamen ne gravas, mi pensis en mi, ne domaĝe ja por leŭtenanto, kiu ironiaĉas pri Esperanto kaj la movado. Kaj kiu sen ajna kaŭzo tuj suspektas la kunagadon de Esperanto en la murdo!

Sed la estimata leganto ne devas prozorgi, li serĉas kaj pluserĉas, kvankam eĉ unu sekreton lian li ne lasas traliki al ni (verŝajne li eĉ ne havas). Rekompence ni ekscias el abunde fluantaj linioj, kiel prepariĝas fraga kremaĵo, kiel aspektas fonfiguretoj, ricevas Freud'an analizon pri personoj, neniel rilantantaj kaj influantaj la okazaĵojn, ni relegas la Bulonjan deklaracion kaj ekscias, ke Esperanto ne volas forpuŝi la naciajn lingvojn.

La afero estas fakte simpla. Por kuiri bone krimkukon, prenu krom iom da murdo kaj pli da Esperanto sufiĉe da amo kun necesa kvanto da amoro — kaj la efiko ne forrestos.

Jen la mirinda recepto de „Murdo en Esperantujo"! Manĝo vegetara, senspica, damaĝanta nenies stomakon. (Aŭ tamen?)

Kaj laŭ la fera logiko de la recepto la kontraŭ Esperantema inspektoro konvertiĝas al la ideo interna (ĉu venonta s-ano Scherlock Holmes kun pluraj daŭrigoj? en „Stafeto"?), la veraj geamantoj trovas sin, la murdinto milde puniĝas, li estas ja bona esperantisto.

Pro ĉi tiu romano la leganto ne bezonas tro nervoziĝi, ja tute mankas ĉiaj komplikaĵoj, surprizoj, pafoj kaj insidoj, kaj ricevinte la unuajn konkretajn informojn li mem facile eltrovas la murdinton en iu de la lastaj paĝoj.

La krimromano — kiel ajna ĝenro — estas tre serioza afero, se la aŭtoro respektas la rajton de la leganto je bona amuziĝo. El tio sekvas kelkaj postuloj.

Al mi pleje mankis la aŭtentikeco de la situacioj kaj protagonistoj. La figuroj estas nigre-blankaj kaj eĉ ene de ĉi tiuj koloroj(?) ili kondutas nekonsekvence, la aŭtoro devas doni fojfoje ŝvelantajn postklarigojn por iel kunkudri la interfremdajn ŝtoferojn de la suĵeto. Sen la patrema ĉiamapudo kaj reĝisora mano de la aŭtoro la figuroj ne povus fari eĉ paŝeton, la situacioj mem kolapsus. La senpera didakteca, primitiva propagando de Esperanto subfosas la ankoraŭ restantan ekzistorajton kaj motivitecon de la rolantoj. Mi demandus, ĉu la aŭtoro intencas varbi nin, esperantistojn por Esperanto, aŭ pli malbone: li esperas tradukigi sian verkon en naciajn lingvojn?

Mi pretus forgesi la mankon de homa aŭtentikeco, se min distrus streĉoj kaj misteroj, tiom karakterizantaj bonan krimromanon. Mi konfesas sincere, ke min movis en la senonda maro de okazaĵetoj kaj superfluaj priskriboj — nur la amora sceno en la 16-a ĉapitro, elleviĝanta kiel soleca monteto en la griza pejzaĝo de la libro.

Mem la teksto de la romano cetere facile legiĝas, la lingvaĵo estas polurita kaj — malkiel atendite — tradiciema, klasika, kun kelkaj „pubertaĝaj" neologismoj, nemultaj misvortoj („komfortigi" por „anime fortigi", „baro" por „verŝotablo") kaj insidaj akuzativoj, stumbligantaj anojn de senakuzativaj popoloj — kaj preskaŭ sen preskoboldoj.

Ŝajne kontraste al la supraj grumbloj mi tamen kuraĝas proponi la libron al tiuj, kiuj volas ekzerci sin per bonstila Esperantaĵo, sen tro streĉi dume la menson kaj nervojn, ludante — garantie senriskan puzlon.

József *Kiss Horváth*

Sur glata vojo al sennuba feliĉo

Manjo Austin: Vojaĝoj finiĝas, amantoj kuniĝas. Romano. — Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 1988. Serio „Stafeto" n-ro 6. — 128 p.

Apenaŭ oni atingas la duan alineon en la romano de Manjo Austin jam temas pri antaŭprepariĝo je teo-konsumado. En akvoboligilo blovas akvo, lertaj manoj pretigas la tasojn, oni filtras kaj sukerigas la teon, fine oni fintrinkas ĝin, intertempe ne forgesiĝas ĝentila regalado. Bone. Sed simila evento ripetiĝas ankaŭ en la dua ĉapitro, poste en la tria kaj ankoraŭ en ne kalkuleblaj kazoj. La eventovicoj de la romano tiel komenciĝas, ankaŭ ĉe la fino la leganto povas imagi sin en gaja societo, kie ĉiuj tenas en la mano glasojn — ne havante informojn — oni povas supozi, ke eĉ en la glasoj estas teo: tiu ĉi trinkaĵo en la romano ne povas elĉerpiĝi.

Relative oni ne tro ofte manĝas. Krome okazas sufiĉe da butikumado, foje vespera preĝo, familia vizito al preĝejo, ĉeesto — ne tutfamilia — en kinejo, mi pensas, ke nur dufojaj partoprenoj en baloj kaj okaze de la Kristnaska festo donaco-disdonado, ĉiuj ricevas la plej ĝustan donacon, jam de longe sopiratan. Jen la preskaŭ senmanka listo pri la elstaraj eventoj de la romano. Aldoniĝas nur la anima sfero de la vivo: sentoj kaj esperoj, planoj kaj unu la aliajn apogantaj opinioj. En la vivo de familio, sufiĉe multnombra, dum plena jaro okazas eĉ ne la plej-plej eta malagrablaĵo. La leganto vane

esperas, ke almenaŭ duonbriko falu se ne sur ies kapon, almenaŭ sur la trotuaron, aŭ verŝiĝu teo sur freŝe gladitan jupon, makuligu iomete teo-guto la tablo-tukon. Maliculoj ne legu tiun ĉi libron.

Atesti indas: el inter la roluloj neniu meritus sorto-baton nek primokon, nek ofendajn rimarkojn. Ne nur laŭaspekte, ankaŭ efektive: ĉiuj estas pli ol bonkondutaj. Senĉese strebas ĉiuj perfektiĝi, fariĝi eĉ pli bonkoraj, pli ĝentilaj kaj helpemaj ol antaŭe. Komprenemo elvokas komprenemon: neniu rilatas krude, ofendcele al la aliaj, nek per agoj, nek per vortoj. Stultaj aŭ blasfemaj esprimoj neniam aŭdiĝas, estas do surpriza unusola, tute escepta frazo, frato diras al sia propra, laŭsanga fratino: „Ne staru, kiel muta idioto!".

La elektita temo tirus la atenton. Patro mortis — jam antaŭ kvar jaroj —, sed patrino bonŝance estas lerta, modele laborema, ankaŭ 23 jara filo plenumas laŭdinde sian devon en la farmbiena agado, fine 16 jara filino — kiu jam finis sian lernejan studadon — kompletigas la — nur emocie mankohavan — familion. Spite al iama tragedio la familio eltenas, ekonomia katastrofo evitiĝas, por iom kolorigi la grizajn tagojn de la vivo bonvenas ĉiudimanĉa vizito al avino.

Parencoj faras siajn povojn, ĉar venis jam la tempo por restabiligi ankaŭ la emocian ekvilibron de la familio. Baldaŭ pruviĝas, ke solvo povas esti alirebla. Vilaĝa bankisto, kiu jam antaŭ pluraj jaroj entombigis sian karan edzinon (ne pensu al krimo), ekkonis — danke al parencoj — la, ankoraŭ allogan kaj amosopiran vidvinon. Amo reciprokas amon kaj decido ne tro malfruas: ne haste, ĉion prudente pripensinte, surbaze de plena interkonsento, do du familioj unuiĝas. La gefiloj kun la patrino — post la forvendo de la familia posedaĵo — translokiĝas en la hejmon de viro, kiu havas ne malpli ol kvar infanojn, du lernantojn kaj du plenkreskajn gefilojn.

Estus tre agrable vidi, sperti, travivi harmoniajn kunfandiĝojn de mankohavaj familioj, konstati, ke perdita feliĉo ne malofte estas rehavebla. Bedaŭrinde la efektiva vivo — eble eĉ en Irlando, eble eĉ antaŭ dudek-tridek jaroj — ne montriĝas tia.

Kiel la plej terura dia plago, tiom ege suferigas la socion la malstabiliĝo de la familioj. Fondi novan familian unuon sur la ruinoj de la jam — pro ia sorto-bato — disfaliĝintaj apartenas al la plej malfacile realigeblaj homaj klopodoj. Dume pleje suferas la infanoj, al la novaj cirkonstancoj adoleskuloj povas plej malfacile alkutimiĝi. Ankaŭ ekstera helpo — kiun liveras fakuloj: pedagogoj, psikologoj, sociologoj, juristoj — apenaŭ efikas. Do bagateligi tiun ĉi problemon taksiĝas kvazaŭ sakrilegio.

Verkisto memkompreneble rajtas elekti laŭplaĉe sian starpunkton kaj li rajtas esti fidela al ĝi. Estas laŭdinde prezenti honestan solvon, kvazaŭ sekvindan modelon, sed laŭeble oni ne forgesu mencii almenaŭ la bazajn kondiĉojn kaj oni ne forgesu priskribi la nepre elformiĝantajn, la laŭnaturajn konfliktojn. Oni ja devus kredebligi la eventojn, konvinki la legantojn.

La ĉefa fadeno en la romano estas amo inter 16 jara knabino kaj lia duonfrato, tiun ĉi amon kronas plena konsento de ĉiuj familianoj — gratuloj, tostoj, antaŭvidebla feliĉo.

Similaj romanoj lavange aperas nacilingve en la merkato, ne malmultaj homoj ŝatas legi similaĵojn. Eĉ tiuj, kiuj kutimas post kelksekunda informiĝo flankenmeti tiuspecajn nacilingvajn verkojn, eble eĉ tiuj ne bedaŭros dediĉitan tempon por la legado de „Vojaĝoj finiĝas, amantoj kuniĝas"

Certe ne la (jam ekde la komenco) bone antaŭvidebla sorto de la enamiĝinta knabino vekos la intereson, estas pli interesa — almenaŭ al legantoj, kiuj apartenas al foraj kulturrondoj — la priskribo de la socia etoso. Homoj, kiuj vole-nevole partoprenas en tro vigla vivo-batalo, kiuj senĉese kuradas, ĉagreniĝas, trompiĝas kaj fiaskas por tiuj

estas ripoziga momento alrigardi — kun ioma envio — al fora, sed vere ekzistanta loko de la mondo, kie oni ankoraŭ vivas sen troaj ambicioj, kviete, trankvile, kvazaŭ neniofare — do tute normale.

Ernő *Csiszár*

Diri „mava" — kaj mortigi sian patrinon...

Claude Piron, La Bona Lingvo, Pro Esperanto kaj HEA, Vieno kaj Budapeŝto, 1989, paĝoj: 111, ISBN 963 571 294 4, Prezo: 14,10 guldenoj. (Por Hungario: 70,- forintoj.)

Neniu san-mensa italo enkondukus en sian poemon aŭ en sian novelon la vorton aimo aŭ ome, por la internacilingva koncepto hejmo, ĉar, kiel italoj scias, la itala lingvo ne permesas distingi inter domo kaj hejmo. Same neniu san-mensa anglo pensus uzi la vorton magary en la angla, lingvo kiu, kiel italoj scias, ne povas koncize esprimi la italan koncepton magari, tio estas: kiel estus bele se...

Parolantoj de naciaj lingvoj sentas ke la lingvo estas io pli granda ol unuopulo, kaj sekve ili ne kuraĝas „inventi" novan vorton, ĉiam kiam ili ne tuj havas je dispono la ĝustan esprimon.

Kompreneble de tempo al tempo verkistoj lanĉas novan esprimon, sed tio okazas tre singarde, tre malofte, pri konceptoj iom apartaj, kaj ĉiukaze oni rigardas tiujn vortojn kiel fremdajn ĝis la tuta kolektivo akceptas ilin kaj aktive uzas ilin.

Neniam aliflanke iu kuraĝas tuŝi fundamentajn, lingvajn principojn (ŝanĝi la signifon de la verbo-tempoj) aŭ ataki normalajn, ĉiutagajn vortojn. (En la itala estas amaso da mal-vortoj, kiujn neniu poeto sentas kiel netaŭgajn. Mi celas, ekzemple, ĉiujn adjektivojn de la speco utile — inutile = utila — malutila).

Sed esperantistoj, kiam ili ankoraŭ luktas por kompreni la ekzercojn en la dua leciono de la lernolibro, kuraĝas opinii ke eble estus pli bele se oni dirus no anstataŭ ne kaj kirko anstataŭ preĝejo. Esperanto invitas tion, ĉar ĝi estas artefarita lingvo (do, se iu artefaris, oni opinias ke oni mem rajtas kontribui: Zamenhof ja estis genia sed ankaŭ mi havas miajn talentojn!) kaj por multaj ĝi neniam fariĝas vere uzata lingvo, vera komunikilo sendepende de ĝia formo. Por multaj ĝi restas ludilo. Ĉu nia plej granda poeto, Kalocsay, ne diris ke Esperanto estas por li nur „nobla hobio"?

Estas evidente ke per ludilo oni rajtas ludi. Vi neniam forprenus radon de via aŭtomobilo por vidi ĉu ĝi funkcias ankaŭ kun nur tri radoj, sed certe vi povas fari ion tian ĉe ludila aŭtomobilo. Neniu sisteme pensis reguligi la italajn helpverbojn kaj diri: ho andato, ho caduto, ktp. dum multaj eksperimentas per irintus kaj manĝitas.

Se vi, leganto de ĉi tiu recenzo, samopinias pri la ĉi-supraj asertoj, vi ja devas legi la libron de Piron, ĉar li klarigas per argumentoj kaj per ekzemploj, kial vi kaj mi pravas. Se vi ne samopinias, ne malesperu! Vi, tamen, ankoraŭ havas tempon por repripensi vian starpunkton kaj koni la veron. La libro de Piron estis verkita ĝuste por vi.

Aliflanke, kaj pri tio oni povas tute ĝoje konsenti kun Piron, Esperanto estas bona kaj bela lingvo por homoj, kiuj konas kaj uzas ĝin regule. Tiuj homoj, por kiuj Esperanto estas vivanta lingvo, neniam plendas pro la imagita problemo, kiun kaŭzus la foresto de aparta radiko por la antikvaj belgoj (ĉu ni diru belĝoj aŭ belgianoj?) Tiuj homoj neniam havas la senton ke ili parolas pri io varma, kiam ili diras ke io estas malvarma. Mi persone konis patrinon, kiu parolis en Esperanto kun siaj filoj ĝis la morto (do, dum jardekoj kaj jardekoj), kaj ŝi neniam sentis la bezonon uzi live por eviti la konfuzon, kiun kaŭzus maldekstre.

Normalaj parolantoj tuj sentis ke komputilo estas la vorto por komputilo kaj presilo estas la vorto por la ilo, kiu presas

tekstojn apud la komputilo. Ili neniam venus al la debato pri komputoro/komputatoro. Por ili Esperanto estas lingvo, kiun oni uzas por komuniki, ne por eksperimenti pri novaj eblecoj ne priatentitaj de Zamenhof.

Se oni inventas ion, oni ĉiam instinkte sekvas la neskribitan deksepan regulon: elturniĝu per kunmetado de radikoj kaj ĉiuj komprenos. Hungara lingvisto, kiu mem parolas Esperanton kun siaj gefiloj, asertis al mi ke infanoj komprenas tre frue ke ĉi tiu elturniĝemo estas parto de la internacia lingvo-kulturo-kutimo kontraste al tio, kio okazas en la hungara (fakte, en ĉiuj naciaj lingvoj). Eble pro tiu jam akirita regulo kvarjara infano diras maltute, kiam li volas diri parte. Eble pro la sama regulo oni diras picejo, pic-vendejo, pic-manĝejo anstataŭ la monde internacia pizerio aŭ picerio.

Inventado, libereco de esprimado estas esenca parto de Esperanto-parolado. Mi sentas min tre pli libera en Esperanto ol en la itala lingvo, kaj same sentas sin miloj kaj miloj da esperantistoj, kiuj ĉiumomente eluzas la grandan elastecon de la radik-kunmetado. Permesu al mi citi unu plian personan ekzemplon. Temas pri la tiel nomata beb-lingvo, tiu lingvo-variaĵo, kiun patrinoj uzas kun beboj. En kiu alia lingvo de la universo vi povas diri al bebo, kiu malrapide manĝas spinacojn: ,,Vi manĝas kiel spinac-manĝanto kaj ne kiel spinac-manĝisto"?

Evidente por senti tiun liberecon, oni devas esti kaptinta la spiriton de la lingvo kaj, bedaŭrinde, oni devas individue strebi por akiri tiun spiriton, ĉar ĉiuj lernolibroj (almenaŭ tiuj en okcidenteŭropaj lingvoj, kiujn mi havis la okazon vidi) instruas Esperanton kvazaŭ ĝi estas la latina aŭ la angla. Same PAG, la Plena Analiza Gramatiko, klopodas doni al ĝi aristokratan veston per amaso da adjektoj kaj konjunktivaj subpropozicioj, kiuj estas tute fremdaj al la libera spirito de la internacia lingvo. La devizo de tiuj gramatikistoj estas pli malpli la jena: ,,Lingvo kun gramatiko pli facila ol la latina ne estas vera lingvo!" Kaj aliflanke oni preterlasas tion, kio donas al Esperanto ĝian unikecon. Provu diri en la latina aŭ en la franca: ,,Mi tra-mamutas la vojon." Tiujn eblecojn devus klarigi la lernolibroj kaj ne la neekzistantajn akuzativajn adjektojn.

Tiuj gramatikistoj agas kiel tiu pastro, kiu verkis gramatikon pri amerika lingvo, en kiu oni povas legi ke en tiu lingvo la kazoj nominativo, genitivo, dativo, akuzativo, vokativo kaj ablativo ĉiam havas la saman finaĵon kaj tiu finaĵo restas senŝanĝa kaj por viraj kaj por inaj kaj por neŭtraj vortoj. Alivorte tiu lingvo ne konis la distingon laŭ seksoj de la latina kaj ne havis kazojn, sed la bedaŭrinda pastro ne sukcesis preteriri sian mensan skemon pri lingvoj.

Se vi, leganto de ĉi tiu recenzo, samopinias... (relegu la supran alineon ĝis:... estis verkita ĝuste por vi.).

Ĉu nur la francoj kaj la franca prilingva pensado kulpas pri la misuzo de Esperanto, pri la traktado de Esperanto kiel okcidenteŭropa lingvo?

Mi, malsame ol Piron, dirus ke ne.

Persone mi konas amason da uzantoj de la okcidenteŭropa fuŝ-variaĵo de Esperanto, kiuj estas italoj, germanoj, ĉeĥoj aŭ hispanoj. Kalocsay mem certe ne estis franco. Prago ne estas la ĉefurbo de franclingva lando. Kaj-tiel-pluaj ekzemploj abundas.

Mi opinias ke kulpas difinita bildo pri la mondo, kiu estas sekvo de difinita personeco. Ne estante psiĥologo, kiel Piron, mi ne aŭdacas esplor-tuŝi ĉi tiun terenon, sed mi intuicie certas ke multaj homoj ŝatas ĉion, kio igas Esperanton pli respektebla en la okuloj de mezklasikaj okcidenteŭropanoj. Do, ĉio, kio similas prestiĝajn lingvojn, estas bonvena. Reglamento estas pli bona ol regularo kaj descendi pli bona malsupreniri. Same tre respektindaj grekdevenaj sciencaj vortoj kiel pediatro estas senkompare pli bonaj ol la komprenebla infan-kuracisto.



Alia bedaŭrinda miskompreno igas kelkajn normalulojn pensi ke ili povas iĝi poetoj en Esperanto nur se ili ludas per la lingvo (ne per la ideoj). Tial, estante normaluloj kaj ne poetoj, ili ludas en la plej facila maniero, enkondukante novajn radikojn anstataŭ kombini ekzistantajn radikojn laŭ la postulo de la lingva spirito. La olda damo descendis estas por ili ĉefverka verso, dum la maljuna sinjorino malsupreniris estas nur banalaĵo. Bedaŭrinde kelkaj eĉ teoriumas pri tio ke oni bezonas plurajn nivelojn en la lingvo, ktp. Evidente ili estas tute sensciaj pri tio, kio estas poezio en normalaj naciaj kulturoj. Ili similas tiujn universitatanojn, kiuj opinias ke sufiĉas verki nekompreneble por akiri sciencan rekonon.

Tria (kaj lasta pro mia maldiligenteco plupensi) speco de ŝatantoj de malbona Esperanto estas homoj, kiuj subkonscie volas konstrui por si lokon en la historio, se ne en la ĝenerala historio almenaŭ en la historio de la Esperanto-movado. Tiuj homoj, kiuj ŝatas titolojn kaj honor-postenojn, estas la plej danĝeraj, ĉar ofte ili ankaŭ havas la necesan persiston kaj labor-energion por iĝi akademianoj kaj, se estas abrupta manko de kandidatoj, ankaŭ prezidantoj de la Akademio aŭ eldonantoj de literaturaj revuoj kaj fondantoj de ,,skoloj". Ili uzas snoban lingvo-variaĵon por imponi la normalulojn kaj ade lanĉas reformprojektojn aŭ investas novajn teoriojn por reguligi la land-nomojn.

Se vi, leganto... (vi jam komprenis, ke la refreno estas ĉiam la sama).

Mi pardonpetas la aŭtoron de la recenzita verko, ĉar mi disbabilis (cetere, diru tion en la hispana, se vi kapablas) anstataŭ serioze okupiĝi pri la pozitivaĵoj kaj preserarojj de lia verko. Mi same pardonpetas tiujn legantojn, kiuj ne samopinias kun Piron kaj mi. Ili certe ofendiĝos kaj rimarkos ke mia recenzo estas nur okazo por liberigi miajn emociojn. Iusence ili pravas. Mi ne kapablas bridi min, kiam mi vidas aĉan traktadon de nia kara lingvo. Mi tute ne estas neŭtrala pri Esperanto en sia fundamenta formo, kaj subkonscie mi estas konvinkita ke iu, kiu kapablas intence diri mava anstataŭ malbona, ankaŭ kapablus mortigi sian patrinon, se tio montriĝus avantaĝa por li.

Ĉiukaze legu la libron. Esperanto meritas tion.

Rentato *Corsetti*
(Italio)



GAJA PAĜO

Ĝentileco

— Ankaŭ miaj gepatroj dungas servistinon, kaj traktas ŝin kiel familianon.

— La miaj kondutas pli modere, ili estas tre ĝentilaj al ŝi.

Ĝentila adiaŭo

La eksiĝanta direktoro ĉirkaŭiras la lastan fojon. En la kontoro li vidas iujn kalkuli super monbiletoj. Strange!

— Ni kolektis iom — klarigas oficisto — por dece adiaŭi vin, ĉefo!

— Tre ĝentile! — diras laŭde la direktoro. — Kaj kiam okazos la festeno?

— Hodiaŭ, tuj post via foriro.

Ĝentila fileto

— Paĉjo! — karesas ĉarme la fileto. — Aĉetu al mi harmonikon!

— Lasu jam min trankvile, fileto. Vi certe ege ĝenos min dum miaj hejmaj laboroj.

— Nenion timu, paĉjo! Mi ludos per la harmoniko nur dum via dormo.

Ĝentila hundo

— Ĉu via hundo lasos min alproksimiĝi al si?

— Kompreneble. Alie kiel ĝi povus mordi iun ajn?

Ĝentila edzo

La novedzineto fiere mencias al sia edzo:

— Sciu karega, mia panjo instruis min kuiri eminentan flanon kun persiko, ankaŭ bovaĵon „por ĉasistoj". Nu, ĉu bongustas?

— Memkompreneble, mia anĝeleto! Diru: el tiuj nun kiun mi manĝas?

Ĝentila junulo

— Do vi aprobas vian patrecon, sinjoro? — demandas juĝisto.

— Tion mi tute ne volas nei.

— Kaj kion vi pensas pri la pagado?

— Bagatelo, sinjoro juĝisto! Neniam mi deziras monon por tia servado...

Problema feliĉo

— Fine mi decidis, Joĉjo! Mi vizitos vin sabate por esti la via!

— Momenton, karulino, sabate ne konvenos! Venu dimanĉe, ĉar sabate mi edziĝos.

Senproblema feliĉo

— Mi aŭdis, ke viaj abeloj alportas multe al vi. Vera feliĉo, ĉu ne?

— Ho, jes! Tamen laste ne per mielo, sed pikinte mian bopatrinon naŭfoje.

Feliĉa retrovo

La knabo ricevis komputilon ĉionscian. Li provas demandon:

— Kie estas nun mia patro?

— Li fiŝkaptas ĉe Balatono.

— Aĉa komputilo kun eraraj respondoj! Li jam mortis antaŭ jaroj!

— Eraras vi! Tiu estis la edzo de via patrino.

Por feliĉa reveno

— Terure, kiel rapide vi stiras, Laĉjo! Ĉu vi freneziĝis?

— Nia bremso ne funkcias! Mi do rapidas atingi nian hejmon, antaŭ ol okazos al ni ia akcidento!

Tuja feliĉo I.

Miĉjo ne apartenas al la kuraĝaj viroj. Por trovi „feliĉon", drinkejon vizitante li alparolas iun el la tieaj feinoj:

— Ĉu vi akceptus inviton de viro ankoraŭ nekonata?

— Certe ne — olda amiko!

Tuja feliĉo II.

En la vestiĝejo de la virina pilk-teamo la kapitanino vokas la novicon:

— Kiam ni akceptis vin antaŭ semajno, vi aŭdis ke ni ĉiuj amas nian trejniston. Ĉu ne?

— Jes, mi rememoras. Kaj?

— En ordo! Hodiaŭ venis la vico al vi!

Seniluziiĝo

— Kiam la akuzato logis min promeni en la parko — deklaras Silvia antaŭ la tribunalo — mi antaŭsentis, ke tie eble okazos io... Sed mi eĉ ne imagis, ke anstataŭ tio, li kaptos mian mansaketon kaj tuj forkuros!

Sen iluzioj

— Ho, fraŭlino! Haltu jam por momento! Ĉu vi volas infanon de mi?

— Kia fripono! Senhontulo!

— Nu bone. Se ne, do ne. Eblas ankaŭ sen infano!

„El orienta florbedo"

— estis titolo de poemaro de japana esperantisto *Kenĵi Ossaka*. En la enigmo ni kaŝis aliajn sep titolojn de Esperantaj eldonaĵoj el orientaj landoj. (Ensendendaj linioj: H. 1., 10., 45., 79. kaj V. 1., 8., 15.) Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.
Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo.

Horizontale: 1. Kolektaĵo de popolaj rakontoj el Ĉinio, 10. Revuo de samnoma spirita movado el Japanio, 16. Azia ŝtato, 17. Rizbrando, 19. Ekz.: ruĝa, blua (R), 20. Subspecio, ekz. de hundoj, 21. Alproprigi, malutile al aliaj, 23. Interhelpi, 24. Femalo, 25. Etap', 26. Leda strio, 28. Unu — angle, 29. La unuaj vokaloj, 30. Tuto de la disĉiploj, 31. Lobo! 33. La materia parto de homo (R), 35. Sufikso por femaloj, 36. Usona monunuo, 37. Demandvorto, 39. Posttagmanĝa dormeto (R), 40. Interjekcio, 41. Ago sin movi, 42. Ĉarmaj Aŭstraliaj bestoj 44. 90 grada, 45. Japana libro, eldonaĵo de Amo Akademio, 48. Latina diino de la ĉasado (sen fino), 50. Pastra kunveno, 51. Miksata membro (!), 52. Komparativa konjunkcio, 53. Sovaĝaj porkoj, 55. Malgrandegulo, 56. Nenorma (R), 57. Artikolo, 59. Reen: ujo el teksaĵo,, 61. Julian Tuwim, 62. Patro de patro, 63. Meritanta ion, 64. Pli granda ol vilaĝo (R), 66. Alterna ripetado de du tonoj (R), 68. Manĝebla frukto, 69. Reen: poseda pronomo, 70. Pli granda ol lago, 72. Vera karulino, 74. Virina nomo, 75. Antikva greka monereto, 77. Sanktulbildo, 78. Subtera kanal', 79. ...kaj fabloj: libro de Liem Tjong Hie el la jaro 1924. 80. Verba finaĵo — reen.

Vertikale: 1. Rakontoj el la pasinto kaj nuntempo de Vjetnamio, 2. Teksoretaj artikuloj, 3. Aereca fluidaĵo, 4. Parto de H. 77., 5. Samspecaj de H. 62. 6. Rabobesto, 7. Okazas dum promeno, 8. Popolaj rakontoj el Ĉinio, 9. Akcidento estas tio, 11. Numeralo, 12. Reen: frukt', 13. Grasa likvaĵo, 14. Metallaboristo, 15. Kolektaĵo de tradukitaj Sanskritaj, Ĉinaj k.a. fabeloj kaj legendoj, eldonita en 1913 de merithava gazeto en Moskvo, „La ondo de Esp." 18. Reen: motoro de la korpo, 21. Pseŭdosufikso por maŝinoj, 22. Reen: ion aŭdeblan estigi, 25. ...bo: sankta koleoptero de Egiptoj, 27. Kantbirdon, 30. Amaso de slipoj, 32. Rakonta poemo, 34. Kelkŝtupan antaŭpordejon, 37. Tiaj estas la Babiloniaj skriboj, 38. Rondeca elstaraĵo de organo, 42. Fil' de Adamo, 43. Prepozicio, 46. Reen: sincere religiema, 47. NS, 49. Tagon finas ĝi (R), 51. Ekde la ovo — latinaĵo, 52. Aranĝas ion sisteme, 54. Kvar-sezona, 56. Patrinon de patro, 58. Semida lingvo, 60. Kvazaŭ „paralela" (R), 62. Spaceto ĉe komenco de skriblinio (R), 63. Tabelvorto, 65. Haroj super la okuloj (R), 67. Hejma servist', 69. Ekstremaj flankoj, 71. Unu el ĉi-tiuj — reen, 73. Antikva vira vestaĵ', 74. Kolonero! 76. Kiel H. 40. 78. Konsonantoj de muzulmana juĝisto.

I. Z.

Solvo de la krucenigmo en la n-ro 1989/4:
Granda heroo kaj idealo de posteuloj — brila dekoro de Hungario, vivu en koroj!

(Pri Sándor Kőrösi Csoma, de Ferenc Jáki)

Premion gajnis per lotumado:
D-ro Vidor *Csiky*, Miskolc, H; s-ro Max *Hillebrand*, Jablonec n.N. CS; s-ro Oleg *Naumov*, Poltava, SU.



EKZAMENO SEN RISKO

Ekzamenanto: Márton Fejes

Vi povas morti nur dufoje
de István Nemere

La plej nova romano de la konata verkisto estas daŭrigo de la jam vaste konata „Vivi estas danĝere" (eldonis HEA, 1989.).

1. Kiun novan nomon elektis por si mem la protagonisto Danny Skagen?

2. Kio estis la profesio de Pierre Lavit?

3. El kiu lingvo estis la vortoj: „kikomo" kaj „mwe nye kufunga!"?

Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo. Solvoj de la demandoj en la n-ro 1989/4:

1. Prajunulo Ron; 2. Batamio; 3. Kantista, Recitista, Esperantista Versaĉama Organizo = KREVO.

Premion gajnis per lotumado: s-ro Roger *Colney*, Gap, F; s-ro Jens *Merker*, Cottbus, GDR. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj. Gratulon!

Korespondi deziras

Kaŭkazian marŝadon, supreniĝojn planas dum julio E-klubo Edelvejso, 10 tagojn, krome 3 tagojn en Moskvo, bonaj E-istoj, piedirantoj urĝe prezentu sin por partopreni: *Moskvo*, ul. 2-Siniĉkina 19, SU-111020. — E-klubo Sub Verda Stelo petas alskribojn por letervespero dum majo. *Walbrzich*, ul. Broniewskiego 65A, PL-58-309. — Instr. de matematiko Zofia *Struŝ* (40) kun gefiloj (17, 19) kun familioj, pri turismo, kulturo. *Poddebice* ul. Krasickiego 1/18, PL-99-200. — *Infana E-grupo* (10-15) pĉt, interŝ. bk, kalend., insignoj, E-aĵojn por ekspozicio. Szkola Podstawowa 7, *Tychy* ul. Tolstoja 1, PL-43-100. — Kursaninoj de E-klubo (lernantinoj, studentinoj, inĝenierinoj k.s. — pri div., (popolkutimoj, psikologio, muziko, literaturo, bk, fotado, pentrado. Indikante aĝon, profesion k.a. karakterizu nian respondonton dezirotan. Vilniusa E-Klubo, *Vilnius* a.d. 178, Litovio SU-232.000. — S-ro Gruianu *Petre* (33) kun junuloj el H, CS, SU pri E, movado, interŝ. pm, E-eldonaĵojn. *Buzau* B-d Unirii, Bl.2/B, ap. 24. RO-5100. — Lernantino Ewa *Nazimek* (17) ktm. *Bielawa* ul. Zeromskiego 44, PL-58-260. — Instr. Eva kaj Ĉeslav *Pietraszewscy* (28) ktm, leterŝanĝi, *Zmudz*, Leszczany, PL-22-114. — F-ino Marika *Pajula* (18) pri filmoj, literaturo, kol. poŝkalend., E-literaturo. *Ambla*, Jóe 17, Estonio SU-202.830. — Oficistino Jadwiga *Dunynska* (25) ktm, pĉt. *Ostráw*, str. Král. Jadwigi 9E/m29 PL-63-400.

— *Ĉinan* medicinaĵon k.a. varojn ofertas el Orienta Farmacia Fabriko de Shenyang: s-ro *Wang* Huai Yu, 9-hao, 17-li, 2-duan, Guilin-jie, *Heping*, Shenyang, Ĉinio-110002. — Asistantino Jolanta *Kavaliauskaité* (20) de biol. labor., ktm kun biologoj, studentoj. *Vilnius* Architektu 53-58, Litovio SU-232.049. — Instr. stud. Karena *Kucharska* (22) pri literaturo, historio, konfesioj, kol. pm, bk. *Kalisz* str. Górmoslaska 37/24. PL-62-800. — Sciencisto Viktor A. *Makarenko* (36) kaj filo Alekso (13) kol. neuzitajn pm pri maraj animaloj (vivo). *Kiev* P.O.B. 472, SU-252.023. — S-ro Aleksandr *Blohin* ktm pri Nordamerikaj indianoj, vojaĝoj. *Ivanovo* ul. Ivanovskaja d. 56. SU-153-003. — Ekonomikistino Barbara *Janus* (25) pri turismo, filmoj, Eo. *Sokolina*, Stropieszyn 11, PL-23-503. — Instr. Agata *Zieba* (30) pri turismo, kulturo. *Poddebice*, ul. Przejazd 16/9. PL-99-200. — Inĝ. Anatolo *Guk* (40) ktm, pĉt. vojaĝoj, vizitoj. *Taganrog*, Glavpoĉ ab.k.43, SU-347.900. — S-ino Grazyna *Byczkowska* (35) kol. bk, int. turismo. *Poznan-Kiekrz*, ul. Podjazdowa 6, PL-60-480. — Kuracistino Alma *Ŝlamaité* (30) ktm, pĉt. *Panevezys*, Puŝyno 51, Litovio SU-235.306. — Poŝtistino Urszula *Lozinska* (35) pri literaturo, vivkutimoj. *Bierutów* ul. E. Plater 13. PL-56-420. — Junulara

LETERKESTO

S-ro John A. SPENCER, London, GB: Dekunu internaciaj helpagentejoj agantaj i.a. en Kamboĝo alarmis la britan kaj aliajn registarojn — skribas nia leganto konsternite, ĉar la popolon parte eksterminta ,,Ruĝa smero"-trupoj denove minacas la jam teruriĝantan Kamboĝan popolon. Kaj rememorante ilian regadon, kiam skribilo aŭ okulvitro sufiĉis por esti mortpunita kiel intelektulo, la aldonitaj britaj gazet-eltranĉaĵoj atestas pri ega timo de la loĝantoj pro reveno de la ,,Pol-Pot-registaro". Britaj kampanjanoj eĉ demonstracie fastas, protestante kontraŭ subtenado de Pol-Potanoj fare de Usona, Brita kaj Ĉina registaroj (kio okazas per armiloj, nutraĵoj kaj mono, krome interne de UN). — Kun granda maltrankvilo ni legis tiujn raportojn de la Kamboĝon vizitintaj personoj. — Vi agis vere brave, sendinte al nia redakcio (certe ankaŭ al aliaj), tiajn konigojn pri tiu tre fora, *tamen surtera* danĝero, minacanta nun (post foriro de la Vjetnamaj trupoj) tiun multe suferintan landon. Sinceran dankon ankaŭ pro viaj tradukaĵoj.

S-ino Svetlana POGORELEJA, Kiev, SU: Ni konsideris tre kompleza vian sendaĵon kun fotoj kaj eta raporto pri la multajn naturamantojn alloganta evento ĉiujara, la Turismaj Tagoj en Zilina (Fatra-montaroj en Ĉeĥ-Slovakio). Tiu internacia E-aranĝaĵo plenrajte entuziasmigis vin — ankaŭ pluraj redakcianoj akiris tie multajn plezurojn. — Do ni plene konsentas, kiam vi rekomendas al ,,ĉiuj" (komprenu: marŝantoj) partopreni la tie zorge preparitajn, tre ĝuindajn montajn ekskursojn, gvidatajn de niaj fervoraj slovakaj samideanoj.

S-ro Josef FISCHER, Nordwalde, FRG: Malgraŭ viaj laŭdoj koncerne la enhavon kaj regulan alvenon de H.V., ni devas kun ega bedaŭro ,,konfesi", ke tion lastatempe ni ne meritis — sed tion jam ,,bone" rimarkis ĉiuj niaj abonantoj. Daŭros eble tutan duonjaron, ĝis nia presejo, same la distribuejo, revenos al la bonaj reloj, kaj per akcela ritmo reakiros la normalan. Ni esperas, ke ankaŭ venonte vi same scivoleme kaj kontente legos nian revuon kiel ĝis nun vi ekŝatis ĝian ,,plurfacetan kaj ekzemplodonan" enhavon kaj lingvaĵon. Ni volonte transdonas al via korespondamiko, d-ro István *Szabó* en Eger (H) vian dankon pro la grandanimaj samideanaj gestoj, i.a. pro la abonado de H.V. Dankon pro la ŝercoj senditaj al ,,Gaja Paĝo"!

S-ro Ferdinand SIMON, Bruselo, B: Kiel malnova leganto, vi povis jam observi, ke ni tre malvolonte, aŭ tute ne emas enmiksiĝi en troblovitajn lingvajn kverelojn, kia estas ankaŭ la afero de iuj landnomoj. Intence ni menciis pri kvereloj, ĉar jam delonge ne temas pri tiaj diskutoj — prefere disputoj — kiuj almenaŭ etpaŝe antaŭenigas nian aferon. Personaj gustoj kaj naciaj preferoj kolizias nun tiurilate, kvankam ili apartenas kompreneble al malsamaj ,,etaĝoj", do samnivele ili ne estas juĝeblaj. Aliaj farendoj atendas nin en Esperantujo!

HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO • Ĉefredaktoro: Vilmos Benczik • Teknika redaktoro: Rózsa Vad • Redakta Komitato: Szilárd Bálint, Stefan MacGill, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, d-ro György Nanovfszky, Péter András Rados, Sándor Révész, Zsuzsa Varga-Haszonits. • Ĉefkunlaborantoj: Mihály Gergely, Alfons Pechan, Aurél Ponori-Thewrewk • H-1368 Budapest, pk. 193. Telefono: 156-0244. Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. • Respondeca eldonanto: Oszkár Princz. • Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (HELIR, Budapest XIII. Lehel u. 10/a. H-1900) senpere aŭ per poŝtmandato. • Abonprezo por jaro (ses numeroj) 11,- USD aŭ egalvalora sumo en alia valuto.
Indexszám 25 377 0018-7704, ISSN 0018-7704.
Készült a MESZ Nyomdában

K3: La tegolfabriko en Csorna

K4: Model-tegmentoj el Csorna

Gropa konustegolo
(ankaŭ por klaŭstro-tegmentoj)

Specioj:
Kastorvosta segment-tranĉa
Kastorvosta duoncirklo-tranĉa
Kastorvosta sesangul-tranĉa
Kastorvosta ogiv-tranĉa t e g o l o j
ankaŭ en duonformoj.



Gropa eg-tegolo
(ankaŭ por klaŭstro-tegmentoj)

Laŭdezire ni volonte fabrikas ankaŭ mendatajn varojn. Ni liveras la varon laŭdezire sur norma platformo, pakitan en moderna plastofolio.
Pri niaj tradiciaj kaj novaj produktaĵoj, pri la teknikaj karakteriziloj kaj uzebloj de ĉiuj niaj varoj petu detalan informon kaj dokumentadon de nia Komerca Sekcio, kiu rapide servos per tiuj.
Fidindaj kvalitoj markas niajn varoj!

KASTORVOSTA TEGOLO
(S-tegoloj)

SUR PLETO NI OFERTAS AL VI
LA SORTIMENTO DE
LA ELEKTRONIKAJ
PECOJ DE
REMIX
REMIX